

L. SINHA:

HINDO RIGARDAS SVEDLANDON

HINDO RIGARDAS SVEDLANDON

DE

LAKSHMISWAR SINHA

Instituto de Dro Tagore, Santiniketan, Hindujo

STOCKHOLM 1936

ELD. SOC. ESPERANTO — FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO U. P. A.

ANTAŬPAROLO.

La aŭtoro de tiu ĉi libro estas disĉiplo kaj helpanto de la glorfama poeto kaj pedagogo bengala Rabindranath Tagore. Lia gepatra lingvo estas tre proksime parenca al la plej maljuna kulturlingvo el la lingvofamilio hindo-eŭropa, kiun oni kutimas nomi sanskrito. Lakŝmiswar Sinha do apartenas al la elito de antikva kulturpopolo.

Sinha restadis du tri jarojn en Svedlando kaj li uzis bone sian tempon. Travagadinte ĉiudirekte la landon, li konas ĝin ekstere kaj interne. Lia libro tiel abundas je faktoj, ke eĉ la plimulto da naskitaj svedoj certe trovos en ĝi sufiĉe da instruo. Kio nin frapas plej multe, legante liajn priskribojn, tamen ne estas la riĉeco de interesaj objektivaj informoj, sed lia mirinda kapablo kapti kaj desegni la esencajn trajtojn en la spirita fizionomio de fremda popolo. Hindujo kaj Skandinavio — jen du kontraŭaj ekstremoj de la plej granda kontinento de la tero. Klimato, temperamento kaj tradicioj estas ja tute aliaj en Svedlando ol en Bengalujo. Tamen ni svedoj je nia surprizo devas konstati la portretan similecon de la bildo, kiun desegnis de ni tiu ĉi juna bengalo. Sincereco ordonas al ni ankaŭ sciigi ke la portreto estas retuŝita je nia plibeligo. Sed la retuŝo evidente neniel estas intenca. Ĝi rezultas el tiu sama senantaŭjuĝa simpatio humana, kiu ebligis al la aŭtoro intimiĝi kun ĉiuj homoj, renkontitaj de li dum lia restado kaj liaj migradoj en

Svedlando. La reciproka simpatio disŝiris la ŝirmkurtenon de apudpolusa ceremoniemo, kaj la malproksimvojaĝa fremdulo povis enrigardi ne nur en la psiĥon de la sveda popolo, sed ankaŭ en la malfacile atingeblajn karakterizaĵojn de la multaj svedaj provincoj.

Io en ĉi tiu libro kondukas mian penson al tiu Kim de Rudyard Kipling. Lakŝmiswar Sinha fariĝis la amikĉjo de tuta Svedlando. Mi deziras, ke lia libro akirigu al Svedlando multajn novajn amikojn ĉie en la vasta mondo.

Björn Collinder.

La aŭtoro kiel gasto en sveda hejmo.

Dufoje mi vizitis Nordeŭropon. Dum la unua vizito mi restis de la monato majo 1928 ĝis la monato aŭgusto 1931. Tiam, inter la jaroj 1929-30, laŭ la invito de Sveda Esperanto-Federacio sub sistema aranĝo de ĝia sekretario, mi faris peresperantan prelegvojaĝon tra la tuta Svedlando de ĝia plej suda urbo Ystad ĝis la norvega urbo Narvik, tra la plej nordaj svedaj urboj Kiruna kaj Abisko. Tiu longa vojaĝo ebligis al mi vidi la varian naturon de la lando. Tiam min kvazaŭ ebriigis la riĉa kaj varia naturbeleco kaj mi aŭdis kiel studanto kun intereso ĉion, kion oni rakontis al mi en diversaj lokoj. Sed antaŭ ĉio tre interesis min la popolo — ĝia pens- kaj vivmaniero. Dank' al Esperanto multaj svedaj hejmoj malfermiĝis al mi kaj mi povis sperti, kiel la popolo vivas.

En 1933 mi revenis rekte el la hejmlando denove al Svedlando, ĉifoje por studcelo. De tiu tempo mi restis en

la lando ĝis 1936 kaj faris multajn vizitojn en lokoj de diversaj landpartoj, eĉ du semajnojn mi vivis inter la fiŝistoj en fiŝista vilaĝo de Bohuslän ĉe la okcidenta marbordo, sed plejparte tamen mi restis en la ĉefurbo Stockholm kaj prilaboris en mia gepatra lingvo verkon pri Svedlando. Entute mi forestis nur kelkajn monatojn kaŭze de vojaĝoj en Norveglando, Danlando, Färö-insuloj kaj Islando por kompletigi mian scion pri la naturo de la tuta Skandinavio.

Nur en Svedlando mi estas veturinta ĉirkaŭ 20.000 kilometrojn kaj vizitinta pli ol 200 lokojn. De eksterlando mi ofte skribis al la hejmanoj pri miaj observoj kaj studoj dum la vojaĝo. Serio da artikoloj de mi skribitaj aperis dum jaro en la plej granda bengala literatura revuo Prabaŝi. Vero estas, ke mi unue venis al Svedlando por ekleri ni slojdon, mian ĉefintereson, sed mia vojaĝo kaj kontakto kun multaj personoj vekis en mi la intereson pri la diversaj homkulturaj aferoj kaj gvidis min al laŭpova studado. Kelkaj el tiuj leteroj skribitaj al la hejmanoj kaj artikoloj aperintaj en la supre menciita bengala revuo nun aperas en libroformo tute reskribitaj esperanten. Mi ŝuldas dankon al menciitaj kaj nemenciitaj sed neforgesitaj multnombraj svedoj kaj speciale al la svedaj esperantistoj, kiuj malavare montris al mi afablecon kaj gastamecon. Nun estas bona okazo por mi esprimi mian sinceran dankon per tiu ĉi verko unue al la esperantistaro kaj due al la lando, kiu longe gastigis min. Al kelkaj personoj mi speciale esprimas mian dankon, nome mia altŝatata amiko rektoro Jansson, kiu donis netakseblan helpon al mia studado pri Svedlando; al sinjorino Lovén, kiu gastigis min en sia hejmo; al gesinjoroj Engholm, kies hejmon ofte mi vizitis kaj kie oni ĉiam lasis min senti tute kiel en propra hejmo, kaj de kies persona kontakto multon mi lernis speciale pri la sveda spirito; al sinjoro Malmgren — la sekretario de S.E.F. — kiu lerte aranĝis miajn rondvojaĝojn; kaj mian sinceran dankon al ĉiuj, kiuj afable trarigardis la manu-

skripton de tiu ĉi libro kaj faris necesajn ŝanĝojn. Al la karaj legantoj — ĉu svedaj ĉu alilandaj — mi petas memori dum la legado, ke la sekvantaj ĉapitroj, skribitaj de vojaĝemulo, kiu akiris multan ĝojon per vojaĝoj kaj deziro de kono pri la viva homnaturo riĉa en varieco kaj kolornuancoj, enhavas nur superrigardon pri la pritraktitaj temoj. Sed la sekvantaj ĉapitroj aldone postulas ian enkondukon kun kelkaj ĝeneralaj informoj pri la lando.

ĜENERALAJ INFORMOJ PRI SVEDLANDO.

La longa Svedlando historie estas dividita en tri grandaj partoj. La plej norda estas N o r r l a n d; el ties plej norda regiono, Lappland, pli ol duono kuŝas norde de la polusa cirklo. La areo de tiu ĉi parto ampleksas 261.300 kvadratkilometrojn, pli multe ol la tuta cetera Svedlando. La meza parto nomiĝas S v e a l a n d, 85.100 kv.km. granda, kaj en ĝi kuŝas la bela ĉefurbo Stockholm, la fieraĵo de la popolo. La plej suda parto nomiĝas G ö t a l a n d, ampleksanta 92.600 kv.km. Se oni volas ekkoni la areon de la tuta lando, oni ankaŭ aldonu la suman areon de tri grandaj lagoj, nome Vänern, Vättern kaj Mälaren kune 9.100 kv.km. La lando estas dividita en 24 provincoj, sed administracie en 24 gubernioj kaj la ĉefurba gubernio de Stockholm, kiuj ne tute koincidas kun la provincoj. Laŭnature la diversaj provincoj multe varias unu de la alia pro la longeco de la lando. La lando estas unu el la plej malnovaj ŝtatoj en Eŭropo, 1.200-jara. Dum tiu tempo ĝi ĉiam estis reĝolando. La nuna formo de konstitucio estas tiu de limigita monarkio.

La sveda flago konsistas el du koloroj, flava kruco sur blua fono. La nacia kaj komercista flago havas rektangulan formon, dum la milita kaj mara flago estas trilanga.

La sveda popolo apartenas al la skandinava branĉo de la ĝermana familio de la t. n. arja raso. La svedoj entute nombras 8 milionojn, kaj iom pli ol 6 milionoj formas la enlandan popolon. La plimulto el la resto loĝas en Finn-

lando kaj Usono, kien en tempo pasinta multaj svedoj elmigris. En Svedujo mem troviĝas pli ol 30.000 finnoj, kiuj vivis tie dum jarcentoj kaj nun svediĝis, kaj krome pli ol 7.000 laponoj. Laŭ kalkulo ĉirkaŭ 60.000 personoj de diversaj aliaj nacioj loĝas en la lando. Tio klarigas la bildon pri la sveda popolo, ke ĝi etnografie estas homogena.

La lando ampleksas la orientan parton de la skandinava duoninsulo kaj kuŝas inter unuflanke Norveglando kaj aliflanke la norda parto de Finnlando kaj Botnia Golfo. Ĝiaj suda kaj sudokcidenta partoj estas lavitaj de akvo de Balta maro, Öresund, Kattegatt kaj Skagerack. Ĝia preciza situo estas la jena: 55° 20' ĝis 69° 4' N. latitudo kaj 10° 58' ĝis 24° 10' longitudo, oriente de Greenwich.

La formo de la lando estas proksimume rektangula, laŭlonge 1.574 kilometrojn de la plej norda ĝis la plej suda parto, kaj la plej larĝa parto estas 499 kilometrojn. Do ĝi estas unu el la plej grandaj landoj de Eŭropo, nome 4,7 % de tiu kontinento.

Dank' al la varma Golfa fluo Svedujo ĝuas relative favoran klimaton, kiam oni konsideras ĝian nordan situon. Dum vintro la influo de la Golfa fluo varmigas la bordan regionon, sed la longo de la plej norda ĝis la plej suda parto faras grandan diferencon en la vintraj temperaturoj. Dumsomera temperaturo estas relative pli malpli unuforma, escepte en la regionoj de altmontaro, sed la somero estas mallonga. La somero estas kvarmonata en la suda kaj trimonata en la meza parto, dum ĝi en la plej norda regiono diferencas inter du monatoj kaj du semajnoj. La pluvo tre varias en diversaj regionoj.

La plej grava fonto de riĉeco konsistas el arbaro kaj ferminaĵo.

Ĉirkaŭ 59 % de la tuta lando konsistas el arbaro, plejparte el pinoj kaj abioj. La klimato ĝenerale favoras la kreskon de la arbaro, kaj tial la kvalito de lignaĵo sveda

estas bona. Svedujo staras en la unua vico inter la landoj, kiuj kulturas arbarojn kaj produktas lignaĵon.

La ferminaĵo en la lando eble estas la plej granda en la tuta mondo. Oni kalkulas, ke la lando enhavas 2.240.000.000 tunojn da kruda fero kun enhavo de pura fero de ĉirkaŭ 9.000.000.000 tunojn, kaj en tio oni ne enkalkulas malpli konatajn sed grandkvantajn ferminaĵojn en diversaj partoj. Krom tio troviĝas minejoj de kupro kaj sulfuro. Lasttempe oni ankaŭ eltrovis orminejon en Norrland en la loko Boliden. Kiom riĉa estas la orminejo mi ne scias.

Malmultaj landoj estas tiom riĉaj je granito kiel Svedlando ĉar la lando ja konsistas el rokoj, kaj krom tio la lando posedas konsiderindan kvanton da kalko kaj sablo-ŝtono kaj same ankaŭ argilo por fabriki brikojn kaj aliajn objektojn.

La lando posedas longan akvobordon kaj krom tio en la lando mem kuŝas multaj lagoj kaj riveroj kun enhavo de certa kvanto de fiŝoj, sed la fiŝkaptado en la maro estas la plej grava. La plej grava estas la kaptado de haringoj ĉe la okcidenta bordo kaj haringosimila malgranda fiŝo, en sveda lingvo »strömming», en la Balta maro. Komprenеble oni kalkulas kapton ankaŭ de aliaj fiŝoj.

Karbo troviĝas nur en la provinco Skåne. La minejojn en Höganäs kaj en Bjuv mi vizitis, sed la kvanto da karbo estas tre malgranda kompare al la bezono de la lando. En la lando kuŝas multaj torfejoj kaj oni konstante provas utiligi la torfon kiel brulaĵon.

Alia aspekto de landa enhavo estas la multnombraj riveroj, akvofaloj kaj lagoj, el kiuj oni ĉerpas elektran forton, tiu »blanka karbo», kiu fakte plenigas la mankon de nigra karbo. Dum miaj vojaĝoj mi vizitis du el la tri plej grandaj elektraj stacioj, nome en Trollhättan kaj Älvkarleö. Oni nuntempe utiligas nur 1.500.000 el 15.300.000 ĉevalpovoj akireblaj.



La grandioza elektra stacio de Trollhättan.



Trollhättan: Ejo kun 13 generatoroj je po 12.500 ĉevalpovoj.

La bestaro de la lando varias multe en somero kaj vintro pro la granda varieco de klimato, speciale la birdoj. Multaj el ili formigras al pli varmaj regionoj dum vintro, sed kelkaj bestoj ekzemple leporoj, sciuroj, vulpoj ŝanĝas sian someran felon en blankan aŭ grizan vintran kostumon. En Lappland speciale notindaj estas la boacoj (nordaj cervoj), la sola vivrimedo de la laponoj, kaj krome en la nordo troviĝas ursoj, vulpoj kaj lupoj. En la tuta lando amase troviĝas alkoj, eĉ apud la limoj de Stockholm oni povas de temp' al tempo renkonti ilin, promenante en la arbaroj.

La kreskaĵoj estas tre variaj pro la diferencoj de klimato kaj alteco de la longa lando. La montara regiono ampleksas la plej nordan parton kaj la plej altan parton de la lando. La plej alta limo de kreskaĵoj estas ĉirkaŭ 500 metroj en Lappland kaj en la norda Dalarna ĉirkaŭ 1.500 metroj super la marnivelo, sed la kreskaĵoj en la plej alta regiono tute sub la senarbara limo konsistas el montaj betuloj malgrandaj, dum la plej granda parto sube kaj sur ebena tero estas plejparte okupita de pinoj kaj abioj. Tiuj arbaroj kovras la plej grandan parton de la lando kaj donas al ĝi specialan karakteron en ĝia naturbeleco.

La arbarlandon oni povas dividi en du partojn kun limo ĉe la rivero Dalälven. Norde de tiu rivero ne troviĝas »kverko kaj nobelo». Tiel diras sveda proverbo, kaj en ĝi estas certa grado da vereco. Entute troviĝas abunde arboj kiel betuloj, kverkoj, tremoloj, alnoj kaj multaj aliaj kaj krome multspecaj arbustoj. En la sudokcidenta parto troviĝas fagoj. Krome marĉoj abunde kovras la landan terenon speciale en la norda regiono.

Laŭ la esploroj oni kredas, ke homoj loĝis en Svedlando jam antaŭ 10.000 jaroj, sed oni scias nenion al kiu raso apartenis tiu popolo, sed la nuna popolo loĝis en la lando dum la lastaj 5.000 jaroj, kaj en tiu rilato oni konsideras

la svedojn — escepte de la danoj kaj norvegoj — kiel la plej malnovajn loĝantojn en sia lando en tuta Eŭropo.

Miaj rondvojaĝoj konvinkis min, ke la svedoj kaj entute la skandinavoj laŭnature estas idealistoj, grava fakto al kiu multe respondas la natura kaj historia evoluo.

La sveda ŝtato moderniĝis dum la lasta duonjarcento, kvankam la fundamento de la nuntempa evoluo estis preparita dum multaj jarcentoj antaŭe. Depost 1814 la lando neniam aktive partoprenis en militoj. La disiĝo de la frata Norveglando en 1905 okazis sen militkonflikto, kaj en la lasta mondmilito Svedlando kune kun la frataj landoj Norveglando kaj Danlando restis neŭtralaj malgraŭ diversaj malfacilaĵoj interne kaj ekstere de la lando. Ĝis la jaro 1879 la lando plejparte dependis de sia terkulturo. Sed de tiu tempo komenciĝis la industria evoluo favorata de la enlandaj naturtrezoroj abundaj, kiujn oni sisteme ekspluatas. En 1870 pli ol 50 % de la tuta popolo vivtenis sin en unu aŭ alia maniero per terkultura laboro; malpli ol 10 % okupiĝis en fabriklaboro kaj nur 2 % en komerco kaj transporto. En 1920 la respektivaj procentoj ŝanĝiĝis al 38,4, 31,4 kaj 12,8. Abunde kreskis la nacia prospero kaj altigis la vivnivelon de la popolamaso. Tion klare montras la fakto, ke inter la jaroj 1871—80 la meznombra infanmorto ĉiujare inter la unua kaj tria jaroj estis 33,35 po mil kaj en 1922 tiu cifero malaltiĝis al 8,44 po mil.

Nuntempe, kiam multaj eŭropaj ŝtatoj trovas sin en politika krizo kaŭze de ekonomiaj kaj kontraŭaj politikaj fortoj, la sveda ŝtato tamen tenas sian demokratian konstitucion kun rekta kapo kaj gloro — fakto kiu per si mem montras la bonstaton, ĉu materian ĉu kulturan, de la sveda popolo.

STOCKHOLM, LA ĈEFURBO, KAJ ĜIA ĈIRKAŬAJO.

Post ĉiuj vojaĝoj en Eŭropo mi ĉiam kaj ĉiam revenis al Stockholm. Fakte ĝi fariĝis al mi laŭdira Romo, ĉar ĉiuj vojoj kondukis min al Stockholm. Estas la urbo, kiu al mi plej multe plaĉis jam en la unua vizito kaj kie mi plej longe vivis kaj sentis min hejme. En la mezo de la urbo la granda lago Mälaren strecas siajn brakojn kaj kvazaŭ ĉirkaŭbrakas la malnovan urboparton kaj renkontiĝas kun la Balta maro. La akvo de la Balta maro kvazaŭ engrimpas en la landon kreante nekalkuleblajn diversformajn insulojn. La svedoj nomas la ĉefurbon »la reĝino de Mälaren». La urbo posedas tian varian kaj unikan naturon ke mi timas, ke mia plumo ne sukcesos doni al vi imagon pri ĝia beleco. La malnova urboparto estas interesa pro la malnovegaj domoj inter mallarĝaj stratetoj, sed la plej karakteriza trajto, kiu plej multe ravis min, estas la naturscenoj de la urbaj ĉirkaŭaĵoj. Dum la unuaj monatoj mi preskaŭ senescepte sabate aŭ dimanĉe suriris unu el la multaj tipaj ŝipoj, kiuj trafikas inter la insularo, nur por vidi virgan naturbelecon. En la somertagoj mi prenis aŭtobuson kaj iris eksteren nur por ĝui la naturon ekster la urbo. Plej forte impresis min la urbo dum la somero. Ĝis malfrua nokto ofte mi promenis kaj ne malofte forlasis la liton en frua mateno kaj promenis sur la senhomaj stratoj de la dormanta urbo nur por rigardi la ludon de sunlumo super la urbo.

La nerezistebla beleco de la ĉirkaŭaĵo somere eltiras la loĝantaron el la urbo al la ĉirkaŭa naturo. Granda nomb-

La Urbdomo de Stockholm.

ro de la loĝantoj posedas propran somerdometon ekster la urbo kaj tie kutime ili pasigas la somertagojn kaj tiuj, kiuj ne havas, en libertagoj ekskursas al arbaro, lago aŭ marbordo.

Ĉie en la urbo regas miriga pureco kaj bonordo. Komfortaj estas la loĝejoj, preskaŭ en ĉiuj hejmoj oni havas

La reĝa kastelo.

telefonon, multaj posedas aŭton kaj motorboaton. Dum monatoj mi loĝis en la suda parto de la urbo ĉe la bordo de Mälaren. Ĉe la suda bordo kuŝas multegaj motorboatoj kaj oni havas la impreson ke preskaŭ ĉiu loĝanto aŭ familio posedas motorboaton! Ofte en frua mateno mi staris ĉe la fenestro en mia loĝejo por ekvidi la sunleviĝon super la urbo kaj la lago Mälaren. Kia serena estas tiu vidaĵo, kiam la suno aperas kaj ŝprucigas siajn radiojn sur la oran

Granda Hotelo kaj Nacia Muzeo.



La Urbdomo. La blua halo.

turon de la bela urbdomo, kiu sin levas kvazaŭ el la akvo de Mälaren. Arĥitekture la urbdomo kun ĝiaj artistaj haloj sur grandaj kolonoj estas unika eble en la tuta Eŭropo. Oni bezonis 12 jarojn por ĝin finkonstrui kaj oni inaŭguris ĝin en 1923 je la kvarcentjara datreveno de la tempo, kiam »la patro de la nuna Svedlando» Gustav Vasa eniris en la urbon. Stockholm estas urbo el granito sur granita fundamento, tamen la urbdomo kontraŭ la kutimo estas kon-

La reĝa operdomo.

struita el ruĝaj brikoj. Ĝia tegmento estas el kupro, donaco de la loĝantaro de la urbo, kaj ĉiu plateto de kupro tenas la nomon de donacinto. La urbdomo, granda fieraĵo de la popolo, estas monumento pri svedaj arto kaj metiista lerteco. Ĉiu detalo estas originalaĵo. La arĥitekto, Ragnar Östberg, ricevis multajn komplimentojn pro sia grandioza verko, al kiu li dediĉis la plej grandan parton de sia vivo.

Kiam oni konstruas domon en la urbo, oni elprenas la materialon per dinamito por la fundamento kaj la kelkonstruaĵo el la grundo mem. Ĉiuj publikaj kaj komercaj domoj posedas seriozan sed tre sobran aspekton kaj donas impreson kvazaŭ ili estas konstruitaj por eterno. La vorto

Stockholm signifas »la insulo de arbotrunko», sed oni ne plu vidas lignajn konstruaĵojn kvankam la prospero de la urbo same kiel de la tuta lando grandparte dependas de la arbarkulturo. En pasinta tempo staris lignaj domoj, sed la teruraj bruloj konvinkis la loĝantaron ke la plej sekura

"La sunkantanto" de C. Milles.

materialo por domkonstruaĵo kontraŭ brulo kuŝas sub iliaj propraj piedoj, kaj tial la moderna Stockholm estas urbo el granito sur granita fundamento.

Dum la lastaj 700 jaroj Stockholm estis la ĉefurbo kaj centro de ĉiuj politikaj kaj sociaj movadoj. La granda verkisto August Strindberg, kies nomon vi konas, vivis tie ĉi kaj en liaj verkoj oni legas mirindajn priskribojn pri la

"La funebra procesio de Karl XII" de C. Cederström.
(Pentrajo en Nacia Muzeo.)

La nobelara domo.



La Teknika Altlernejo.



La Koncerta Domo.

urbo kaj pri la loĝantaro de la urbo. La nacia poeto Bellman — la poeto en la kortego de la reĝo Gustav III — kantis siajn eternajn kantojn pri Stockholm. Apud la bela reĝa palaco staras la plej malnova preĝejo, Storkyrkan. Ĝian internon ornamas inter alie mezepoka lignoskulptaĵo »sankta Georgo kaj la drako» kaj krome multaj interesaj



La Urba Biblioteko.

arĝentkandelingoj kaj orumita predika katedro. En la malnova urboparto, okaze de miaj vizitoj en lernejoj, mi trovis lernejon — moderna en aspekto — sur fundamenta konstruaĵo de malnova monaĥejo. Interese estas vidi, kieĩ la malnova konserviĝas sub la nova.

La parlamenta domo kaj la sveda ŝtata banko staras solaj sur insuleto inter la reĝa palaco kaj la norda urboparto. Pontoj kunligas en ambaŭ flankoj. Ofte mi sidis ĉe la malalta bordo sub la stratnivelo antaŭ la parlamenta domo apud bela statuo, kiu per malfermitaj brakoj salutas la sunon. De tie unuflanke oni vidas la belan ŝtatoperon — tre gracia estas la operdomo — kaj en ĝia kelo kelkfoje mi

manĝis kun amikoj por ĝui la belan muzikon. Kaj ambaŭflanke la akvofluoj de Mälaren renkontas la Baltan maron. Oni klare povas vidi la diversecon de la akvoniveloj. De tie oni vidas aliflanke la grandajn konstruaĵojn de Granda Hotelo kaj de la Nacia Muzeo, kiu enhavas grandan arkeologian kolekton, laŭdire unu el la plej interesaj



La liceo de Östermalm.

en la tuta mondo, kaj krome artgalerion kun vasta kolekto da pentraĵoj, skulptaĵoj kaj manlaboraĵoj el en- kaj eksterlando.

Inter la multnombraj rimarkindaj konstruaĵoj speciale menciindaj estas: la koncertdomo, la domo de nobeloj, naturhistoria muzeo, botanika muzeo kaj apud ĝi botanika ĝardeno, la urba juĝejo kaj la domo de teknika altlernejo. En tiuj domoj esprimiĝis la talentoj de grandaj svedaj arĥitektoj.

Jam en 1928 mi partoprenis en la nobelpremia festo en la granda bela koncertsalono. Bela estas la koncerthalo kaj mirinde bona ĝia akustiko. Antaŭ ĝi troviĝas vendoplaco, kie oni vendas florojn, fiŝojn kaj legomojn. La

stokholmanoj estas grandaj floramantoj kaj la mastrinoj multnombre vizitas la vendoplacon ĉiutage.

Dum pli ol duonjaro mi loĝis en la orienta parto de la urbo en hejmo de s-ino Lovén. De mia loĝejo mi povis atingi en kvin minutoj insulon nomatan Djurgården, kie en unu flanko kuŝas la mondkonata liberaera muzeo Skan-

Skansen: Domoj el provinco Halland.

sen kaj krome kvar aliaj muzeoj. Skansen donis al la urbo specialan allogon. Ĝi estas naturparko kaj en ĝi kuŝas malnovtipaj domoj, kiuj demonstracias la formortintajn pasintajn kutimojn, morojn kaj vivmanierojn en la lando. Cetere la parko enhavas multajn birdojn kaj bestojn de nordaj landoj. Grandaj popolfestoj okazas tie kaj altiras la loĝantaron de la tuta urbo. La Norda Muzeo kaj Skansen faris la nomon de ilia fondinto d-ro Arthur Hazelius senmorta en la kulturhistorio de Svedlando.

Cetere la naturparko de Djurgården kun grandegaj multaĝaj arboj, speciale gigantaj kverkoj, posedas ian neoftan belecon. En la parko ofte mi promenis kaj meditis.

Alia granda faktoro de la urba beleco laŭ mia opinio estas la multnombraj belaj pontoj, kiuj kunligas diversajn urbopartojn. Prave oni povas nomi Stockholm »la urbon inter la pontoj» — nomo, kiun oni kutime donas nur al la plej malnova urboparto.

La stokholmanoj estas grandaj sportamantoj kaj la ĉefsport- kaj ludplaco estas la Stadion, kiun oni konstruis en 1912 okaze de la internacia Olimpiaj ludoj, sed al mi la plej interesaj estas la vintraj sportoj: skikurado, skisaltoj kaj la glitsporto sur glaciiĝinta akvo. En januaro kaj februaro la febro de vintraj sportoj atingas la plej altan gradon.

Vintra sporto floradas en la ĉirkaŭaĵo de Stockholm.

DALARNA, LA KORO DE SVEDLANDO.

Multfoje mi vojaĝis en Dalarna kaŭze de miaj oftaj vizitoj en la hejmoj de miaj amikoj. Sendube Dalarna estas la plej karakteriza el ĉiuj svedaj provincoj; ĝi enhavas scenojn de preskaŭ ĉiuj aliaj landpartoj: altmontaroj, valoj, arbaroj, grandaj lagoj, riveroj k.t.p. Foje mi ankaŭ vojaĝis tie — tute sen intenco pri vizito, nur por vidi la naturon.

La rivero Dalälven fluas tra la lando kaj la bordaj regionoj estas tre fruktodonaj. En ĝia norda parto la kulturitaj kampoj formas kvazaŭ mallarĝan, longan strion somere tute helverdan laŭ la arĝenta rubando de la rivero. La ĉefurbo de la provinco estas Falun, kie mi loĝis dum du semajnoj kaj faris paroladojn en diversaj lokoj ĉirkaŭe laŭ la aranĝo de la distrikta esperantoasocio. En la urbo mi vizitis la muzeon de la kompanio Stora Kopparberg. Feliĉe la oficisto, kiu gvidis min tra la muzeo, iam vizitis Hindujon por esplori la merkaton tie. Li montris zorge al mi la tutan muzeon, la grandan oficejon de la kompanio kaj parton de la minejo. La muzeo i. a. enhavas modelojn de preskaŭ ĉiuj teknikaj maŝinoj kaj aparatoj el la plej frua tempo ĝis nun eltrovitaj por la mineja laboro. Eble vi aŭdis, ke la kompanio estas la plej malnova de sia speco en la tuta mondo, kaj ĝi ankoraŭ funkcias. Ĝia dokumento el la jaro 1288 ankoraŭ kuŝas en la muzeo. La kupra minejo pasinttempe estis tre produktiva. De la mezo de la 17-a jarcento oni ĉerpis el la minejo 500.000 tunojn da kupro, pli



Dalarna kaj najbaraj provincoj.

ol unu tunon da oro kaj 15 tunojn da arĝento. La subteraj minejaj galerioj kune estas 120 kilometrojn longaj, kaj la plej profunda parto de la minejo kuŝas pli ol 340 metrojn sub la tersurfaco. Nuntempe la minejoj ne donas multe da kupro, sed la sama kompanio ankoraŭ staras en la unua vico inter la grandaj industriaj entreprenoj posedante la plej grandan fer- kaj ŝtallaborejon en apuda loko Domnarvet, grandan paperfabrikon en Kvarnsveden, kelkajn kilometrojn malproksime de Domnarvet, kaj krome la grandan segejon en Skutskär, pri kiu mi poste skribos. En Domnarvet mi faris prelegon en Esperanto dufoje antaŭ plenplena salono. Ĝi kuŝas sude de Falun ĉe la rivero Dalälven, kaj ĝia industria parto mem formas urbeton. Gastigis min afable instruistino ĉe la mezlernejo f-ino Bodén.

En la muzeo de Falun i. a. troviĝas grandega kolekto da moneroj, kiuj kune pezas 80 kilogramojn. Oni montris al mi grandan kuproplaton. En tempo pasinta oni trancîs pecon post peco de tiu aŭ similaj grandaj platoj kaj donis kiel pagon al la laboristoj. Krome la muzeo ekspozicias produktaĵojn de ĉiuj fabrikoj, kiujn posedas la kompanio.



Flugfotografaĵo de urbo Hedemora en Dalarna.

Post la vizito en la muzeo oni gvidis min en la oficejon de la kompanio, grandega domo kun multaj ĉambroj. Ĝi posedas belan halon uzatan kiel kunvenejon kaj dancejon, kaj ĝi havas sur siaj muroj portretojn de multaj svedaj gravuloj. Entute ĝi estas tre vizitinda.

Ne estas nur la kupra minejo, kiu portis riĉecon al la provinco, sed en la suda parto kaj en la distrikto ekster la suda limlinio troviĝas en longa ĉeno ferminejoj, kiuj postlasis signon de prospero en tiu parto de la lando. Tiujn riĉajn ferminejojn oni eltrovis jam en la mezepoko, kaj tio ne nur faris la provincon kaj la provincanojn prosperaj, sed la provinco mem fariĝis trezorprovizejo de la sve-

da ŝtato. La plej granda kvanto de ferminaĵo estas trovita en lokoj ĉirkaŭ la konata ferindustria loko Grängesberg, kaj tiuj minejoj estas la plej riĉaj el ĉiuj en meza Svedlando, kie entute troviĝas pli ol 500 apartaj minejoj. Do en Dalarna krom Domnarvet estiĝis multaj aliaj ferfabrikoj. En la lokoj Smedjebacken, Ludvika kaj Avesta troviĝas fabrikoj. En Ludvika la granda ASEA-kompanio posedas ankaŭ elektroproduktejon kaj elektro-



La 800-jara kuprominejo de Falun.

inĝenieran laborejon, kiun dum la lastaj jaroj vizitis pluraj studantoj el nia lando. Avesta estas vaste konata pro sia senrusta ŝtalo.

Espereble la supra mallonga priskribo donos al vi imagon pri la prospera materia kulturo de la provinco. Kiel vi scias, la popolo, nome la dalekarloj, ludis grandegan rolon en la historio de Svedlando. La montotrezoroj — minejoj kaj arbaroj — portis prosperon al la popolo, kaj ili ĉiam estis tre sendependaj kaj liberamaj. Estis tiu provinco, kiu naskis Engelbrekt, kiu vokis la dalekarlojn liberigi la landon el sub la jugo de la dana reĝo. En 1435 Engelbrekt alvokis la reprezentantojn de la tuta lando al Arboga por kunsido — fakte la unua parlamenta kunsido en moderna senco de la eŭropa kontinento kaj la dua

"Lisbeth".

Pentrajo de Carl Larsson.

laŭ aĝo post la angla parlamento. Sed la fina venko de libereco alvenis post ĉirkaŭ cent jaroj, kiam la junulo Gustav Eriksson de konata sveda nobelfamilio, en la historio nomata Gustav Vasa, persekutata de la dana reĝo vagadis tra la tuta lando kaj petis protekton de la dalekarloj, kaj kun ilia helpo li fine liberigis la landon el la subpremo de la dana reĝo.

La preĝejo de Rättvik.

Dum mia restado en Falun mia amiko s-ro Aspenström el Österå apud Falun veturigis min per sia aŭtomobilo al la vilaĝo Sundborn, kie situas la hejmo de Carl Larsson, unu el la plej gravaj artistoj de la lando († 1924). Survoje mi rekonis la naturmotivojn, kiuj troviĝas en la verkoj de Carl Larsson. Sundborn kuŝas ĉe la lago Toftan, kaj ĉirkaŭ ĝi tie kaj tie kuŝas multaj malnovaj biendomoj. Proksime al Sundborn en la paroĥo Stora Kopparberg troviĝas du interesaj biendomoj, kiuj ankoraŭ portas la tipan malnovan stilon el la komenco de la 19-a jarcento. Dum mia vo-

Interno de kamparana domo en Rättvik.

Ĉe la bordo de lago Siljan.

Leksand. En la kuirejo de malnova domo.

Leksand. Paŝtista sceno. En la fono "la somermeza stango".

Knabino en paroĥa kostumo de Leksand.

jaĝo mi vizitis ankaŭ la paroĥojn Svärdsjö kaj Enviken, aliflanke de la lago Toftan, ambaŭ tre fruktodonaj kaj pure terkulturaj.

Eble neniu alia sveda artisto sukcesis pentri svedan hejmon kaj familian vivon kun tiom varma sento kiel Carl Larsson. Lia pentrarto estas plena de beleco kaj ŝerco, tamen funde tre serioza. Atingante Sundborn mi tuj povis rekoni la hejmon de la artisto. La konstrua maniero de ĝi memorigis al mi la loĝejon de nia poeto kaj artisto Tagore.



Maljuna edzino en paroĥa kostumo de Leksand.

Al la ĉefkonstruaĵo la artisto tiam kaj tiam aldonis novajn ĉambrojn kaj por la infanoj en stilo malnova konstruis apartajn domojn ĉirkaŭ la ĉefa.

Unue ni eniris tra koridoro lian laborejon, nuntempe muzeo, kie troviĝas pentraĵoj de li kaj aliaj. Apud ĝi estas sidĉambro en speciala artista stilo. La domprizorganto gvidis nin en ĉambron de la supra etaĝo. Tie kuŝis en ŝrankoj granda literaturaĵo pri artoj de diversaj landoj, eĉ el oriento, ĉinaj, japanaj k.t.p. En tirkesto kuŝis multaj lignoklišoj faritaj de la artisto kaj krome ĉe alia flanko

malnovmoda lito kun pordoj, sur kiuj la nomoj de liaj gastoj estas enskribitaj. Poste ni eniris ĉambron en la teretaĝo. Ŝajne tiu parto estas poste aldonita. Mi tuj rekonis la internon de la ĉambro laŭ la pentraĵoj, kiujn mi antaŭe vidis. Sur ĉiuj pordoj la artisto pentris siajn infanojn. Dum mi legis nomon sub unu el la portretoj, la edzino de mia amiko flustris en mian orelon, ke tiu portreto estas de nia gvidanto. Mi tuj turnis min al li kaj miaj okuloj



Malnova bieneto en Djura, Leksand.

demandis: »Ĉu vi estas la filo de la artisto?» Li ridetis kaj mi havis la respondon.

Poste ni vizitis la preĝejon kaj la komunuman domon de Sundborn. La internon de la preĝejo ankaŭ pentris Carl Larsson, kaj sur la muroj de la komunuma domo pendis multaj portretoj pentritaj de la fama artisto.

Multajn reproduktaĵojn de la pentraĵoj de Carl Larsson mi jam antaŭe vidis, eĉ posedas mem, sed la vizito en lia hejmo klarigis al mi, kiel anime riĉa kaj granda estis la artisto kiel homo. Li pentris la variecon de la vivo de infanoj — la trezoroj en kies manoj kuŝas la estonto de la lando. En lia peniko fariĝis viva la studpenado de infanoj, iliaj banado, fiŝkaptado, ekskursoj, remado, neĝludado, la

rilato de la infanoj kun la hejmaj bestoj, kaj la dolĉaj blondharaj knabinoj, kiuj laŭ virina instinkto patrinece zorgas siajn malpurajn bubogefratojn. Estas interese por vi scii, ke la genia artisto pentris multe per akvokoloroj.

La suda kaj speciale sudorienta parto de la provinco konsistas el tipaj minejoj kaj industriaj entreprenoj, kaj

Rättvik. Tipa kampara domo.

tial tiu parto estas dense loĝata, sed la plej interesa estas la meza parto, kie kuŝas la bela lago Siljan, ĉirkaŭ 290 kv. km. granda. Sur ĝiaj belaj verdaj bordoj kuŝas multaj historiaj vilaĝoj, kies loĝantoj ankoraŭ konservas multon de la pasinttempa kampara kulturo en kostumoj, arto, manlaboro kaj ĉiutaga vivo. Mi ĝojas ke mi povis dufoje viziti tiun regionon. La forto de ĝia malnova kulturo estis granda, kaj tial kulturmodo moderna ne povis tute detrui ĝin, male la moderna kulturo en interesa maniero asimiliĝis kun la malnova. La plej grandaj paroĥoj ĉirkaŭ Siljan estas Rättvik, Leksand kaj Mora. Atingante Rätt-

vik ĉe la orienta bordo de la lago mi tuj sentis, ke mi estas en alia mondo, kaj forte impresas min la specialaj trajtoj de domkonstruaĵoj kaj kostumoj. Tie mi vidis sinjorinojn en la apuda hotelo, kiuj portis fortkolorajn, malnovmodajn sed tre belajn popolkostumojn. La muroj de la hotelo interne estas pentritaj de popolartistoj, tre deko-

Leksand. Tipa antikva bienkorto.

racie. Multaj el la figuroj estas el la biblio kaj la popolvivo, kaj la ornamaĵoj plejparte floraj iom similas al orienta stilo. La ruĝa, la verda kaj la brilblua koloroj forte regas la pentrarton. La lertaj popolartistoj de Rättvik estas konataj de malnova tempo, speciale en dekoracia murpentrado. Multaj artistoj pentris la kadrojn de la famaj Mora-horloĝoj.

De tie ni promenis al la granda preĝejo, tre bele situanta ĉe la lago. Apud ĝi, sur altaĵo ĉe la akvo, oni starigis grandan monumenton je memoro de Gustav Vasa. La monumento estas unika en tiu rilato, ke ĝi estas en run-

ŝtona stilo. De tiu loko la vidaĵo de arbaroj kaj montoj aliflanke de la lago estas tre grandioza. Revenante al la stacidomo mi vizitis la vendejon de la hejmindustria asocio. Multspecaj estas la laboraĵoj kaj speciale interesis min la belaj teksaĵoj kaj brodaĵoj. Entute la regiono ĉirkaŭ Siljan krom la bela naturo interesis min ĝuste pro tio ke

Leksand. Virina slojdo.

la artista manlaboro ankoraŭ vivas kaj vivas forte ĉe la popolo. En la vendejo ni vidis laboraĵojn el aliaj paroĥoj, kaj speciale la objektoj el Ål kaj Gagnef altiris mian atenton. La preĝejon de Ål ornamas belaj lignoskulptaĵoj. Ankaŭ en tiu laboro la dalekarloj estas tre lertaj.

Okaze de mia vizito en malluma vespero en la vilaĝo Insjön apud la samnoma lago miaj okuloj kaptis elektran lumon sur izola, malproksima altaĵo. Mi demandis al mia gastiganto pri la loko, kaj oni rakontis al mi, ke tie kuŝas la konata tekslernejo Sätergläntan. Postan tagon frumatene mi aŭtomobilis tien. La homoj ankoraŭ dormis, do ni devis veki ilin. Aperis la estrino, kiu afable akceptis min

kaj montris al mi la tutan lernejon kaj la laborajojn de la lernantoj. Estus domaĝe se mi ne estus vizitinta la lernejon, ĉar tie oni teksas laŭ la modeloj de diversaj konataj paroĥoj de Siljan kaj ili estas ege belaj kaj interesaj. Cetere multaj malnovtipaj lignaj dometoj, loĝejoj de la lernantoj, ĉirkaŭ la ĉefkonstruajo ornamas la lokon, kaj la vidajo ĉirkaŭe — vasta valo kun arĝentkolora rivero kaj malproksime la konturo de montoj — estas mirinde bela.

Mi parolis antaŭ granda publiko en Leksand, alia granda paroĥo sur la suda bordo de Siljan. Inter la aŭskultantoj troviĝis multaj sinjorinoj, kiuj portis siajn paroĥajn kostumojn, kaj ili altiris mian atenton tiel ke foje mi forgesis daŭrigi la paroladon. Post la prelego la lernejestro de »Siljansskolan» veturigis min per aŭtomobilo al Tällberg. La ĉefkonstruajo de la lernejo tie, laŭ malnova dalekarlia stilo, estas interesa kun ĉiuj modernaj komfortajoj.

La postan tagon matene ni kune eliris por rigardi la ĉirkaŭajon. Ne malproksime, tuj apud Siljan, kuŝas ege interesa kaj malnova hejmo de konata artisto Gustav Ankarkrona, kiu dum sia tuta vivo agitis inter la popolo de Dalarna por konservi la belajn festajn kutimojn kaj la valorajn trajtojn de malnova kulturo. Nun li ne plu vivas, sed li testamentis sian loĝejon al la landa slojdasocio.

Kia hazardo! Apud la domo de Ankarkrona kuŝas la hejmo de svedo s-ro Silfverhjelm, la eksĉefkonsulo sveda en Calcutta. Li estis la unua svedo, kiu afable donis al mi ĉiujn deziratajn informojn antaŭ mia vojaĝo al Eŭropo. Mi volis saluti lin, sed li forestis de la hejmo kaj loĝis en ripozhejmo kaj hotelo en alia flanko de la lago en loko Persberg apud Rättvik.

Post la vizito en la hejmo de Ankarkrona ni pli ol horon promenis tra la vilaĝo kaj inter bienaj hejmoj al arbara altajo, sur kiu staras alta turo. Ni grimpis ĝis kaj de supre — kia grandioza vidajo ĉirkaŭen! La tipaj terkultu-

raj kampoj dividitaj en longaj pecoj sur deklivoj, kaj tie kaj tie la malgrandaj kamparanaj domoj donis al la naturo specialan karakteron, por kiu tiu regiono estas konata. Oni montris al mi de tie la hejmon de Karlfeldt en Folkärna. La nomon de Karlfeldt, granda poeto antaŭ kelkaj jaroj mortinta, konas ĉiuj. De Tällberg per trajno ĝis Rättvik kaj de tie per aŭtomobilo al Persberg. Interesa estas la ripozhejmo kaj hotelo en Persberg. La festa halo ankaŭ estas pentrita de la lokaj artistoj kaj estas tre interesa.

Ĉirkaŭ la lago Siljan kuŝas multaj paroĥoj, kaj ĉiuj tenas siajn proprajn kutimojn kaj morojn pli malpli en ĉiutaga vivo, kaj tial ili estas vizitindaj. Paroĥoj kiel Yttermalung, Äppelbo, Järna, Nås, Floda, Gagnef, Sollerön estas tre konataj. »Jerusalem», unu el la ĉefaj verkoj de Selma Lagerlöf, eternigis la nomon de Nås. La verko sin bazas sur historia fakto kaj la aŭtorino mem loĝis en tiu paroĥo kaj studis la popolon de proksime. La bieno »Ingemarsgården», la komenca kaj ĉefa scenejo de »Jerusalem», ankoraŭ ekzistas en Nås. Bildojn el la paroĥo Floda oni trovas en ĉiuj vendejoj. Floda estas konata pro siaj hejmaj teksaĵoj, brodaĵoj kaj ne malpli pro la paroĥaj kostumoj. Ĉiujare en julio okazas tie granda popolfoiro, kiun oni nomas »somermeza bovina foiro». Tiam homoj de proksime kaj malproksime grandamase kolektiĝas tie en naciaj kostumoj kaj dancas kaj ludas ĉe akompano de malnovaj melodioj. Inter la dancoj fama estas la »hupp»-danco, kiun oni multe dancas.

Mi finis mian vojaĝon ĉirkaŭ la lago Siljan en la konata Mora, kiu kuŝas ĉe la plej norda bordo de la lago. Tie staras monumento de Gustav Vasa, farita de la mondfama Mora-artisto Anders Zorn. Mi vizitis la grandan sonorilejon, la preĝejon kaj ia faman »Gammalgården» de Zorn. La muzeo de »Gammalgården» konsistas el tipaj dalekarliaj kamparaj dometoj kaj en ili la malnovaj metiaĵoj. En

la mezo de la korto eĉ estas malnovstila puto. Aliflanke ekster la korto ĉe la bordo kuŝas la domoj por hejmaj bestoj, eĉ domoj kun iloj, per kiuj oni kaptis sovaĝajn bestojn. Duhora studado de la objektoj en la muzeaj dometoj instruis al mi multe pli pri Dalarne kaj dalekarloj ol kion mi estis lerninta per libroj. En la muzeo kuŝas du longaj boatoj, kiujn oni antaŭe uzis sur la lago por preĝejaj vizitoj. Nuntempe tiu kutimo preskaŭ formortis, kaj nur okaze en speciala festotago la sinjoroj en malnovaj kostumoj remas la boaton por partopreni en religiaj festoj.

Zorn naskiĝis en Mora kaj travojaĝis la tutan mondon kaj akirinte universalan famon kiel artisto reekloĝis en Mora. Li estis realisto kaj impresionisto. Neniu pentristo pentris la naturon de kamparanoj en pleneco kaj tuta forto kiel Zorn. Multajn liajn pentraĵojn kaj reproduktaĵojn de ili mi vidis jam antaŭe. Multe li skizis kaj pentris nudfigurojn, sed liaj nudpentraĵoj de kamparaj knabinoj estas produktoj de natura senafekta vivo. Apud »Gammalgården» staras popolaltlernejo. La domo estas donaco de Zorn. En brila suntago de la surtegmenta turo de la lernejа konstruaĵo mi vidis la ĉirkaŭaĵon, la malproksimajn montecajn kampojn, kaj ili vere estas imponaj. Mora estas historie konata kaj tial tre studita loko, kvankam ĝia situo ne estas tre alloga.

De Mora per aparta fervojlinio mi vojaĝis al Orsa. La loko Vårmhus, paroĥo najbara al Mora kaj Orsa, kuŝas ĉe la lago de Orsa. La kontrasto inter tiu lago kaj Siljan estas tre granda. La lago de Orsa impresis min kvazaŭ ĝi kuŝus inter montoj. La altaĵoj ĉirkaŭe estas montecaj kaj pli koloraj. Sur unu monto mi vizitis la somerpaŝtejan domaron. Ĝi estas ege interesa kaj multaj tiaj ne plu troviĝas en la lando. Mi plej multe memoras Orsa pro tio, ke en iu vespera kunveno konata kantistino, edzino de esperantisto, regalis min per multaj belaj popolkantoj. En ŝia voĉo la kantoj estis sublimaj. En Orsa kaj Mora mi kom-

preneble vizitis la vendejojn de la slojdasocio. Ambaŭ lokoj havas sian manieron en teksarto. En Mora oni ankaŭ fabrikas sonorilojn.

La aŭtoro kaj Kalle libertempas en Nyberget.

Mi finas mian priskribon per kelkaj linioj pri loko en suda Dalarna, nome Nyberget. En somero mi vagadis tie en montaroj kaj kolektis berojn, kaptis fiŝojn en lago kaj naĝis, en vintro ludis per neĝo kaj promenis tra arbaro kaj sur lago. Tie mi akiris krom miaj afablaj gastigantoj, ge-

Malnova "preĝejboato" sur Siljan.

sinjoroj Engholm, multajn aliajn konatojn, eĉ inter la infanoj, kaj tagon post tago mi ludis kun ili.

Dalarna estas provinco, pri kiu mi povas diri laŭ mia propra sperto: »Tiu, kiu iam lernis koni vin, sopiras reen al vi».

Maljuna dalekarlo.

ĈIRKAŬ LA LAGO MÄLAREN.

Unikan ĉarmon kaj pozicion donas al la ĉefurbo la nekalkuleblaj insuloj multformaj inter la maro kaj la urbo. La insularo okupas 125 kilometrojn laŭlonge de sudo ĝis nordo. Facile oni povas atingi la rokinsularon — vera paradizo de trankvilo kaj ripozo — for de la bruo de la civilizacio. Dank' al amikoj multajn somertagojn mi pasigis en vel- kaj motorboatoj sur la mara akvo inter la insularo en ĉiuj direktoj kiel en labirinto.

Multaj el tiuj insuloj estas konataj pro specialaĵoj. Mi vizitis S a l t s j ö b a d e n, loko atingebla per duhora ŝipveturo. Ĝi estas vilaurbeto kaj centro por vintraj sportoj kiel ankaŭ de la velboatsporto somere. Sur alta monto oni vidas novan observatorion.

Alia loko estas D j u r s h o l m, atingebla en duonhoro per elektra trajno de la ĉefurbo. En ĝi loĝas plejparte bonhavaj personoj, kaj ĝi estas unu el la plej belaj kaj modelaj antaŭurboj. Leginte rakonton de Strindberg mi vizitis la insulon V a x h o l m. En ĝi staras malnova fortikaĵo kaj ĉiuj ŝipoj survoje al kaj de Stockholm preterpasas ĝin.

Iom pli malproksime de Stockholm kuŝas la loko S a n d h a m n. Somere la vivo tie estas tre vigla pro la grandaj, ofte internaciaj velboatkonkursoj.

Apud Stockholm troviĝas loko en la lago Mälaren, pri kiu mi ĉiam memoros, nome D r o t t n i n g h o l m. Ofte mi ekskursis tien. La ĉefa intereso de la loko estas kompreneble la reĝa palaco de Drottningholm, konstruita laŭ franca stilo en 1662, kiu enhavas multajn artistajn kaj tre



Karto pri lago Mälaren kun ĉirkaŭaĵo.

valorajn pentraĵojn, tapiŝojn kaj aliajn objektojn. La palaca parko, la plej purstila parko de la lando, estas mirinde bela. En unu flanko kuŝas teatro kaj apud ĝi teatra muzeo konstruitaj de la reĝo Gustav la III:a, la granda amanto de literaturo kaj muziko. Tie iam kantis en la reĝa kortego la nacia poeto Bellman, kies plej popularajn kantojn scias parkere ĉiu svedo. En alia flanko de la parko

Velboata konkurso en Sandhamn.

kuŝas tre originala somerpavilono de Gustav la III:a, miksitaj rokoka kaj ĉina stiloj, kaj tial oni nomas ĝin »ĉina palaco». Ĉirkaŭ ĝi en arbaro ofte mi sunbanis min en senhomaj lokoj sen kostumo.

Lastjare en la festotago de somermezo mi kun kelkaj stokholmaj amikoj traveturis laŭlonge la tutan lagon de Mälaren al la malnova historia urbo A r b o g a, kie antaŭ nelonga tempo okazis la granda jubilea festo de la 500-jara datreveno de la sveda parlamento. Laŭ kutima maniero la ŝipo estis ornamita per betulbranĉetoj. La kunveturantoj estis ebriaj pro festoĝojo kaj ludis kaj kantis

Kastelo Gripsholm.

kaj faris grandan bruon dum la tuta vojaĝo. En tiu ĉi lago kuŝas ĉirkaŭ mil insuloj kaj ili memorigis min pri la pejzaĝo de la Balta insularo, sed ĝiaj bordoj kun malhele verdaj kutimaj pinarboj kaj arboj alispecaj de sudlanda karaktero kaj cetere tie kaj tie la kulturitaj bienoj donis aspekton pli molan.

En Arboga mi estis gasto en la patrina hejmo de s-ro M. Ĝi kuŝas kiel multaj aliaj tuj apud la Arboga-rivero, sur kies rapide fluanta akvo ripozeme naĝas la cignoj. Tiu ĉi malnova historia urbo, kie okazis la unua sveda parlamento, havas nekutiman idilian karakteron. Dum ravaj somermezaj tagoj mi naĝis kun amikoj en la rivero dum multaj horoj kaj nokte dormis sur herbokorto apud la rivero in-

La kastelo de Uppsala.

ter abundaj florkreskaĵoj. La somera travivaĵo estas unu el tiuj neforgeseblaj de mia vivo.

Vizitinda estas ankaŭ la kastelo G r i p s h o l m, konstruita en la 16-a jarcento sur insuleto apud la malgranda urbo Mariefred ĉe la suda bordo de Mälaren. Mirinde bela estas ĝia situo kaj interesa ĝi estas kiel konstruaĵo. Dekoracias ĝiajn plankojn en stiloj diversaj de historiaj periodoj multnombraj tapiŝoj, kaj ĝia portretgalerio enhavas 1900 valorajn portretpentraĵojn.

Estas kelkaj aliaj urboj, kiujn mi vizitis ĉirkaŭ la lago Mälaren. Unu el ili estas U p p s a l a, la plej malnova universitata urbo de Svedlando. La universitato estas fondita en 1477 kaj ĝi okupas gvidantan pozicion en la intelekta vivo de la lando. Inter la konstruaĵoj rimarkindaj estas la katedralo. Ĝia grando estas 118 metrojn longa kaj same ankaŭ la alto de la turo. Multaj grandaj homoj, kiel

Pratempaj reĝotomboj ĉe Malnova Uppsala.

la reĝo Gustav Vasa, la mondfama botanikisto Linné kaj la konata filozofo Svedenborg estas entombigitaj tie. Inter la interesaĵoj estas la kolektoj de teksaĵoj kaj arĝentkaj orujoj el la mezepoko. En la halo de la universitato parolis nia poeto Tagore al la universitatanoj. La universitata biblioteko posedas 400.000 librojn kaj 15.000 tre malnovajn manuskriptojn. Ĝia plej granda trezoro, kiun oni montris al mi, estas »Codex argenteus», traduko de la Nova Testamento en la 5-a jarcento. Apud la universitato staras impona kastelo. Tie ĉi mi partoprenis la enlandan esperantan kongresan ekskurson en jaro 1930. Alia interesa domo estas la Linneanum, kie vivis la sciencisto Linné, sed la plej interesa estas tamen la Malnova Uppsala

(Gamla Uppsala), kie kuŝas malnova kalkŝtona preĝejo sur loko, kie staris la templo de Odin en pagana tempo. Antaŭ ĝi kuŝas tri altaĵoj el la kvara ĝis sesa jarcentoj — tomboj de reĝoj. Antaŭ nelonga tempo oni esploris la altaĵojn kaj trovis multajn trezorojn el la pagana tempo kaj tiutempa kulturo.

Strängnäs kun la malnova katedralo.

Apud tiuj tombaltaĵoj troviĝas restoracio, kie mi ĉiufoje estis regalita de amikoj per speciala trinkaĵo, kiun oni nomas »mjöd», biersimila miela trinkaĵo; oni trinkas ĝin el tre malnovaj kornoj ornamitaj per arĝento.

Apud Uppsala mi vizitis la lokon H a m m a r b y, kie kuŝas la iama hejmo de Linné. En unu ĉambro de lia loĝdomo estas muzeo kaj en alia lia skribtablo, sur kiu ankoraŭ staras de li uzitaj inkujo kaj plumo. Mi sentis min tie kiel pilgrimanton. Granda estis Linné kiel sciencisto — precipe botanikisto — granda li ankaŭ estis kiel homo. Mi sentis saman feliĉon, kiun sentas la hindoj en templo de Benares, kaj mia kapo kliniĝis al lia loĝejo. Granda homo

vivis tie en simpla domo! Ofte mi cerbumis, ĉu la vivspertoj de la grandaj homoj ne similas unu al la alia. Mi memoris eldiron de Linné, kies proksimuma senco estas jena: »Mi vidis la Senlimecon — ĉiosciantan ĉiopovan Dion malantaŭe — movante sin antaŭen, kaj mia kapo turniĝis. Mi sekvis liajn piedsignojn sur la naturkampo kaj ĉie trovis postsignojn de liaj piedoj, de lia senlima saĝeco kaj potenco! Mi vidis, kiel ĉiuj vivantaĵoj estas nutrataj de la kreskaĵoj de la tero; kiel la terglobo turniĝas tagnokte ĉirkaŭ la suno, kiu donas vivforton ... Se oni nomas lin la Sorto, oni ne eraras, ĉar ĉio pendas sur lia fingro. Se oni nomas lin la Naturo, oni ankaŭ ne eraras, ĉar ĉio venas de li. Eĉ oni pravas, se oni nomas lin la Providenco, ĉar laŭ lia volo ĉio estiĝas kaj moviĝas.» Mirige estas, kiel la konkludo de scienculoj pri la mondo kaj homa vivo similas al tiu de grandpensuloj hindaj kaj alilandaj. Dum mia vizito tie mi pensis, ke estas inde veni al Svedlando nur por viziti la hejmon de Linné.

Alia interesa urbo malnova estas S t r ä n g n ä s, atingebla en tri kaj duona horo per ŝipo kaj en tri horoj per trajno de la ĉefurbo. Strängnäs situas tre bele kaj havas nur kvin mil loĝantojn. Interesa estas la malnova katedralo, konstruita en la 13-a jarcento. La pedelo de la katedralo montris al mi la riĉajn, malnovajn predikkostumojn de la pastroj. Ne malproksime de Strängnäs kuŝas la industria urbo E s k i l s t u n a kun pli ol 30.000 loĝantoj. Mi loĝis tie dum kelkaj tagoj. Tie ĉi kuŝas multaj fabrikoj, kie oni speciale produktas diversspecajn metalobjektojn, kaj oni povas nomi la urbon »la Sheffield de Svedlando». Eĉ nia lando Hindujo konsumas grandan kvanton de la produktoj de la Eskilstuna-fabrikoj. Plej multe frapis min la pureco de la urbo malgraŭ la multaj fabrikoj. La kutima fumoplena malbonaero de fabriko tute forestas tie kaj nenie troviĝas »slum»-kvartaloj. Male, mi mem estis gasto en modesta laborista hejmo, modesta laŭ

sveda cirkonstanco, sed bela kaj pura. Malgraŭ la granda industria evoluo la lando bone zorgis pri la bonstato — eduka aŭ materia — de la laboristaro, kaj tio estas granda feliĉo por la tuta popolo.

Apud Stockholm en la provinco Uppland mi piede vagadis kun stokholma amiko kaj rigardis tie kaj tie en la naturo multajn runŝtonojn. Tiuj ŝtonoj kun runliteroj kaj artistaj desegnaĵoj troviĝas en arbaro, apud vojo, en



La antikva kastelo de Örebro.

preĝeja korto, kaj oni montris al mi eĉ du ŝtonojn en la muro de preĝejo. Antaŭ nelonga tempo mi vidis artikolon pri tiuj ŝtonoj, kaj oni supozas nuntempe, ke origine iliaj literoj, volvaĵoj kaj figuroj estis kolorigitaj.

Okcidente de la lago Mälaren kuŝas alia pli malgranda lago, nome H j ä l m a r e n, 480 kv.km. granda. Sur ĝia bordo kuŝas la bela urbo Ö r e b r o havanta 30.000 loĝantojn. Tie mi vizitis la imponan malnovan kastelon. La esperantistoj montris al mi de ekstere grandan ŝufabrikon, laŭdire la ĉefa ŝufabriko en la tuta lando.

Mi loĝis en loko Y x h u l t, iom malproksime de la urbo. Mia gastiganto s-ro Carlén estas esperantisto kaj posedanto de brik- kaj marmorfabrikoj. En lia bieno kuŝas granda interesaĵo, nome dumiljara tombejo. Samspecan tombejon mi vizitis ankaŭ en la proksima arbaro. La tomboj konsistas el ŝtonkadro kaj en ĝi estas du ĉambroj, unu granda kaj la alia malgranda. En la meza muro estas truo. Oni supozas, ke en malnova pagana tempo oni kredis je spiritoj kaj kuŝigis la kadavron en la grandan ĉambron kaj metis de tempo al tempo manĝaĵon en la malgrandan ĉambron por la spirito de la mortinto.

GOTLANDO, LA REĜINO DE LA BALTA MARO.

Mi ĵus venis al Stockholm post semajna ekskurso en Gotlando. Mi vojaĝis de tie ĉi per ŝipo kune kun konato, esperantisto s-ro Malmgren kaj dudek de liaj lernantoj. La ŝipo veturis senhalte dum la tuta nokto. La vento estis sufiĉe forta sur la maro, sed la vidaĵo de la marborda insularo de Stockholm estis tiom bela, speciale en la maja krepuska lumo, ke estis malfacile iri en la liton por dormi. Dum pli ol horo mi staris sur la ferdeko kaj poste eniris en mian kajuton kaj ekkuŝis por ne senti la marmalagrablaĵon. Mi kuŝis ĝis la kvara matene, kiam amiko vokis: »Jen Visby videbla!» Rapide mi vestis min kaj iris sur la ferdekon. En la trankvila matenlumo aperis subite antaŭ la okuloj seriozaspektaj solenaj turoj — la turoj de la giganta muro de Visby. Oni turnis mian atenton al la alta katedrala turo, kiu eldistance aspektis gracia. La leviĝanta suno dume ŝprucis siajn radiojn sur la urbon kaj la turoj parte estis prilumataj, kaj en tiu trankvila mateno mi trovis min en tute nova mondo de longe sopirata — Visby, la urbo de ruinoj kaj rozoj. Dume la ŝipo proksimiĝis al la kajo kaj la serĉemaj okuloj sur la ferdeko kaj sur la kajo renkontiĝis kaj oni reciproke salutis per mangestoj. Inter la akceptantoj estis ankaŭ esperantistoj, konatoj de s-ro Malmgren. Fine ni metis niajn piedojn sur la teron de Gotlando. La konatoj de M. varme nin akceptis. Surbordiĝante, ĉu pro matena marvento ĉu, mi ne scias, pro iu alia kaŭzo, mi apenaŭ povis stari kun malfermitaj okuloj —

tian grandan dormemon mi sentis. Do, laŭ interkonsento, ni unue piediris dum dek minutoj al bela hotelo, iom izole kuŝanta ĉe la marbordo, kaj petis al la esperantistoj reveni post du horoj por kune viziti la urbon. Plej unue altiris miajn okulojn la abundaj rozoj en la matena brilo. Ni eniris ĉambron kaj mi penis iom dormi, sed ankaŭ tio ne

La urba murego de Visby.

estis ebla; regis min granda ekscito, do mi kuŝis kun fermitaj okuloj eble dum horo. Poste ni iris en la sidĉambron kaj trinkis kafon. Dume revenis la gvidantoj kaj ni kvar kune eliris por rigardi la urbon.

Komence ni iris laŭ la urba murego. Jen grandioza malnova murego el la meza epoko, ĉirkaŭ 3 mil metrojn longa kaj en ĝi tridek sep turoj de dek kvin ĝis dudek metroj altaj staras firme kaj fiere. Ni staris tie kaj tie sur la murego kaj malproksime la domoj,stratoj, ruinoj estis videblaj. Kaj miaj pensoj rapidege kuris en la malnovan pasintan tempon kaj al diversaj sortoplenaj teruraj kaj ro-

mantikaj okazintaĵoj. Antaŭe mi estis iom leginta pri Visby, kaj miaj okuloj serĉis diversajn lokojn, kaj malmulte mi atentis, kion rakontas la gvidantoj. Gigantaj ŝtonoj, kiel kuriozformaj figuroj kun strangegaj gestoj, foje kvazaŭ dancantaj, staris ĉe la marbordo, kaj la grandioza murego kun la turoj kvazaŭ elstaris el la verdaj belaj

Tipa antikva domo en Visby.

herbejoj. La tuta sceno estis tiom fantazia, ke komence estis malfacile por mi kredi miajn proprajn okulojn!

La gvidantoj kondukis nin de la murego ekster la urbon. Survoje ni vidis kelkajn bienojn. La verdriĉa tero kun kulturitaj kreskaĵoj kaj la arbaroj aspektis kvazaŭ loko en iu suda lando. Subite ni haltis en loko, kie staris sub arboj ŝtona kruco, ĉirkaŭita de ferbarilo. Oni nomis ĝin Valdemar-kruco, kaj apud ĝi estis granda elfosejo antaŭ ne longe farita. Jen tiu portas memoron pri milito decidinta la sorton de la urbo. Nome en la jaro 1361 la dudek-

sepan de julio, la dana reĝo Valdemar Atterdag invadis la urbon. En tiu milito falis tri mil kamparanaj soldatoj de la insulo, kaj ilin oni poste entombigis tie ĉi. Sescent jaroj pasis de tiu tempo, la tempo kiam la gloro de la prospera Visby finiĝis. Sur la kruca ŝtono la jeno estas skribita latine: »En la jaro de nia Sinjoro 1361, en la tria tago post la Sankta Jakobo, falis la gotlandanoj ĉe la pordoj de Visby en la manojn de la danoj. Tie ĉi ili kuŝas entombigitaj. Preĝu por ili.»

La apuda elfosejo estis kovrita de gudrotuko, do ni ne havis okazon enrigardi ĝin. Laŭ la informo de la gvidantoj, la sveda arkeologo d-ro Thordeman en ĝi trovis centojn da skeletoj — sendube de la falintaj soldatoj; sur multaj el ili oni trovis eĉ la kirasojn kaj aliajn militkostumaĵojn en bona ordo. Kaj krome sakon kun kvar cent danaj kaj svedaj moneroj el la meza epoko. Laŭ esploro oni konkludis, ke la soldatojn masakris la tre akraj glavoj de la malamikoj.

De tie ni denove turnis nin al la murego. La gvidantoj klarigis pri la murkonstruaĵo, pri ĝiaj turoj kun enirejoj. La muro certe ne estis konstruita en unu sama tempo, sed en diversaj tempoj oni aldonis kaj altigis ĝin tie kaj tie. Jes, tio estis tute videbla. Ĉar ĉiu turo kaj interesaj enirejoj portas propran nomon kaj legendon kaj historion! En unu loko oni montris al ni la punkton ĉe la muro, tra kiu Valdemar eniris la urbon kun siaj soldatoj.

Poste ni atingis lokon, kie ĉe la maro staris la nudaj muroj de multaj grandegaj preĝejoj, entute dek unu ruinoj. La vidaĵo de la ruinoj estis tiom impona, ankaŭ parte pro la apudaj kreskaĵoj kaj la rozoj, ke antaŭ ol eniri mi devis halti kaj rigardi ilin de ekstere. Nur unu preĝejo el la mezepoko, nome tiu de Sankta Mario, la nuntempa katedralo, ankoraŭ staras en ĝusta ordo. Sed en la sama loko staris la unua preĝejo de la urbo aŭ verŝajne de la tuta in-

sulo kaj ni vidis parton de ĝia fundamento. Interesa kaj bela estas la Sankta Mario!

Ho, kiom povas paroli ruinoj preĝejaj! Je la unua rigardo la konstruaĵo de Sankta Katarino altiris miajn okulojn. Kiel bela ĝi estas! Ĝiaj graciaj altaj kolonoj ankoraŭ tenas la grandajn arkojn, same kiel ĝi faris en tempo,

Visby. La katedralo kaj preĝejaj ruinoj.

kiam oni konstruis ĝin antaŭ sepcent jaroj. Tutcerte ĝi estis konstruita per manoj de grandaj artistoj por la disĉiploj de Sankta Francisko de Asisi kaj dediĉita al la memoro de Sankta Katarino el Aleksandrio.

Mi eniris en ĝian internon, kie estas du sidbenkoj. Rigardinte murojn kaj kolonojn mi sidis sur benko. Malplena ĝi estas nun, kaj rigardante supren oni vidas nur la ĉielan plafonon. Mi fermis miajn okulojn, kaj mia penso kuris en tempon, kiam la piaj homoj plenigis la preĝejon kantante religiajn kantojn kaj himnojn ĉe akompano de orgeno. Kiel vibris la melodioj! Nun regas tomba trank-

vilo kaj paco. Herboj kaj rozoj kovras la plankon kaj ekstere staras la arboj, kaj aŭdiĝas de tie la ondobatoj ĉe la bordo, la sola melodio nuntempa. Jes, jes, Visby estas urbo de ruinoj kaj rozoj nekompareblaj!

Poste ni eniris en la ruinon de Sankta Nikolao! Ĝi aspektas impona. La gvidanto rakontis, ke ĝiaj fenestroj siatempe estis ornamitaj per juveloj, jes, en tempo de ĝia gloro tiuj fenestroj montris lumon kaj donis orientiĝon al la maristoj de malproksimaj ŝipoj sur la maro. Ni grimpis ĝian muron kaj atingis la supron, de kie la vidaĵo estis mirinda. Unuflanke la kurioza mezepoka urbo, aliflanke la trankvila maro! Kaj ni ankaŭ vidis la malplenajn suprojn de la apudaj preĝejaj ruinoj — tiuj de la Sankta Spirito, Sankta Hanso kaj Sankta Petro, Sankta Larso kaj Drotten! Mi devis mediti, kaj al mi subite venis la demando, kial oni konstruis tiom da preĝejoj en unu loko. Mi ja bone povis imagi, kiel riĉa devis esti la urbo en la malnova ora tempo! Kaj tion mi spontane ankaŭ murmuris al mi mem. La gvidanto tion aŭdis kaj aldonis: »Jes, iatempe la urbanoj estis tiom riĉaj, ke ili ornamis eĉ la fenestrojn de la hejmoj per pura arĝento.»

Sed denove venis la sama demando: Kial do oni bezonis tiom da preĝejoj? — »Jes, estas klare, ke la religiaj movadoj en tiu tempo, kiam oni ilin konstruis, floris tie ĉi, kaj la preĝejoj estas la eksteraj simboloj de tiutempa stato de la loĝantaro.» La gvidisto iom haltis kaj poste daŭrigis: »Tiam, en tiu ora tempo, ankaŭ ĵaluzemo regis en la familioj de riĉuloj kaj laŭdire du fratinoj de samaj gepatroj ne ŝatis sidi sub la plafono de unu sama preĝejo, do oni devis konstrui apartajn preĝejojn por ili.»

Ĉio sonis kvazaŭ fabelo, kaj post rigardo en la ruinojn ni sidis kune sur deklivo apude ĉe la marbordo, kaj la akompanantoj jen unu jen alia daŭrigis la rakontadon.

Poste ni eniris en la malnovan parton de la urbo. Mi ekhavis kuriozan senton, kvazaŭ mi estus en la malnova

tempo. La mallarĝaj stratoj, ofte kurbaj kaj ondecaj, estis misteraj, kaj kelkaj portis la nomon de germanaj hansaj urboj. Abundaj kreskaĵoj kovris la dommurojn, rozoj, rozoj, rozoj! Ĉie nur rozoj! Multaj el la malnovaj domoj ankoraŭ staras en same bona ordo sen gravaj ŝanĝoj. Oni montris la hejmon de la urbestro. Malnova domo el la mez-



La ruino de Sankta Nikolao.

epoko, sed iom renovigita en 1671. Poste oni montris alian domon, kiu portis la nomon »Mahognyhus» (Mahagona domo). Tia ligno ne estis videbla en la domo, sed tamen ĝi portas tiun nomon. Kurioza kaj interesa estis la interno. De tie tra stratoj kaj stratetoj, kvazaŭ en labirinto, ni eniris en la muzeon de Gotlando, »Gotlands Fornsal». Ĝi tenas abundajn memoraĵojn de la ŝtona epoko ĝis nia tempo. Amaso da runŝtonoj kun motivoj bestaj kaj geometriaj, mezepokaj lignoskulptaĵoj vere tre artaj, plejparte preĝejaj, kaj moneroj! Kaj multaj aliaj objektoj!

Mi deziris resti tie pli longan tempon, sed ni devis rapidi.

De tie survoje ĉiu montris la deziron trinki kafon. Jes, la kafo ankaŭ sur tiu insulo estas la kutima trinkaĵo, same kiel la teo ĉe ni. Do, ni trinkis kafon en iu kafejo. Kaj poste ni denove daŭrigis, ĉifoje al la norda parto iom ekster la urbo. Tie troviĝis novaj konstruaĵoj. Oni montris al ni la ruinon de Sankta Georgo (Göran), kaj proksime tri izolajn kolonojn el ŝtono! La malbonulojn kaj krimulojn oni pendigis tie, eble kun pompa bruo, en la pasinta tempo! Mankas al la kolonoj la lignaĵoj, kiuj kunligis ilin, alie ĉio restas, kiel oni konstruis ilin.

Returne ni iris denove al la urbo kaj la gvidisto konstante donis klarigojn pri diversaj lokoj. Plenplena de impresoj posttagmeze ni reiris al nia hotelo kaj tagmanĝis.

Poste mi sola iom vagadis en la trankvila urbo. Mia kapo estis tiom ŝarĝita per la impresoj de la tagaj vizitoj en la urbo! — Jen la giganta murego, malnovaj domoj, preĝejaj ruinoj kaj miloj da objektoj en la muzeo — kion rakontas ili? Jen aŭdu iomete pri la sortoplena historio de la insulo kaj Visby! Ĝi estas pli interesa ol iu romano, kaj iom ekkoni ĝin signifas ekkoni la historion pri la nordaj landoj kaj ĝiaj civilizo kaj kulturo.

LA HEJMO DE VIKINGOJ KAJ KOMERCISTOJ MEZEPOKAJ.

Pri Gotlando de la malnova tempo la nebula tradicio rakontas historion, notita en »Gutasaga», verkita en la komenco de la dektria jarcento. Iam la popolo kreskis tiom multe, ke la insulo ne plu povis teni ĉiujn, do oni kolektis unu trionon de la tuta loĝantaro kun iliaj havaĵoj por ilin forpeli. Sed ĉar ili ne estis emaj forlasi la insulon, ili iris en la fortikaĵon de Tor kaj defendis sin tie. Ĉar la lando ne volis havi ilin, oni forpelis ilin ankaŭ de tie. Tiam ili iris

al Fårö kaj vivis tie, sed eĉ tie oni ne lasis ilin vivi. Do ili foriris al la insulo Dagö ĉe Estonio, kie ili konstruis siajn loĝejojn, ankoraŭ videblajn. Ankaŭ tie ili ne povis resti, sed vojaĝis laŭ akvovojo, nome Düna, tra Ruslando. Tiom longe ili vojaĝis, ke fine ili atingis Greklandon. Tie ili vivis kaj ankoraŭ vivas, kaj eĉ nun ili posedas en sia lango iom de la sveda lingvo.

La ruino de Sankta Katarino.

Sur la monteto ankoraŭ nomata »Torsburg» (»fortikaĵo de Tor») oni povas vidi restaĵon de kastelo, kie la forpelitoj de Gotlando penis sin kaŝi de siaj samlandanoj. La altaĵo, pratempa fortikaĵo de Tor, estas vasta kaj kovrita nun de arbaro. Mejlolongaj muregoj estis konstruitaj el nehakitaj, malregulformaj ŝtonoj. Kolosa estas ĝia grandeco kaj malfacile estas trovebla io komparebla. La muregoj enhavas kelkajn centmilojn da kb.metroj da ŝtono. Oni kalkulis,

ke estis bezonataj almenaŭ 3.000 laboristoj dum unu tuta jaro por konstrui tiun muregon aŭ fortikaĵon — konstruitan supozeble ne en tempo de danĝero sed de trankvilo kaj paco, por protekto kontraŭ atakoj de malamikoj; alie en la tempo paca en la lando oni tute ne uzis ĝin.

Ankoraŭ kuŝas la fortikaĵo de Tor — la malnova dia figuro de pagana tempo — en la mezo de sovaĝa arbaro, for de homaj loĝejoj! La frosto kaj sunvarmo kune disfandis ĝin, kaj ĝiaj nuntempe tute disfalintaj muroj ne havas plu la saman altecon kaj rektecon, sed alie ĉio restas tia kia ĝi estis. Jen tie ĉi ankoraŭ vivas iom de la nekonata historio de la forgesitaj jarcentoj, kaj »tiu, kiu havas orelojn por aŭdi, perceptas en la flustrado de vento, kiu plenigas la silenton en la arbaro, la eĥon de la glavokunpuŝiĝoj kaj la sibladon de pafarkaj sagoj — entute la militfaron de la pratempuloj kaj la malĝojkriojn de iliaj patrinoj, edzinoj kaj filinoj, pro la ruinigitaj kaj forlasitaj hejmoj.»

Oni ne scias, kiel okazis tiuj akcidentoj pri kiuj rakontas la »Gutasaga», pri la migrado de la forpelitaj homoj de Gotlando. Oni nur povas diveni pri la pratempaj loĝantoj de Gotlando laŭ la multaj eltrovaĵoj, kiuj atestas pri ili. Grandskala migrado okazis tiom frue kiom 600 jarojn antaŭ Kristo, en la komenco de la ferepoko, kiam la klimato en la nordaj landoj rapide fariĝis pli kaj pli malvarma ol ĝi estis antaŭe; kaj sekve greno ne povis kreski, kaj malsato estis ofta. Asertas la arkeologoj prijuĝante la eltrovaĵojn, ke en la tria jarcento antaŭ Kristo, la insulo eble fariĝis preskaŭ senhoma. Sed la popolo kreskis poste.

En la tempo de la vikingoj, inter la sesa kaj oka jarcentoj, la insulo estis tre dense loĝata. La cetera Eŭropo tiam vivis en konstanta timo pro la invado de bravaj vikingoj, kaj almenaŭ kvardek mil vikingaj boatoj surmare vojaĝis al diversaj landoj kaj revenis hejmen kun abundo da riĉaĵoj. Trezoroj el oro kaj arĝento trovitaj en la tero de Gotlando klare atestas pri la faroj de vojaĝintaj vikin-

goj, pri iliaj grandaj sukcesoj kaj en komerco kaj en militiraj venkoj. La revenintaj militistoj kunportis kiel akiraĵojn de milito — ofte oferitajn de la orienta imperio por aĉeti pacon de la teruraj Got-triboj ĉe la pordo de la landlimo — pezajn ujojn, plenajn de ormoneroj kun stampitaj profiloj de grekaj imperiestroj. La vikingoj forlasis siajn hejmojn en gudroŝmiritaj boatoj kun ŝarĝo de sablo kaj kalkŝtono kaj ankaŭ kun produktaĵoj el civilizitaj okcidentaj landoj. Survoje ili akiris aŭ ŝtelis sklavojn. Ili ven-



Gotlando. Kalkŝtona formaĵo.

dis siajn varojn en Novgorod kaj eĉ en la malproksima ĉefurbo de la greka imperio. Ili atingis lokojn en Bulgarujo, Kasano, laŭ la rivero Volga, kaj la havenojn de la Kalifato laŭ la Kaspia maro. Ili revenis hejmen kun feloj kaj ledoj, vakso kaj mielo el Ruslando, kun teksaĵoj, arĝentobjektoj, spicaĵoj kaj manĝovaroj el Oriento, kaj plenaj kestoj de arĝentmoneroj faritaj ĉe Kalifo. Ili vojaĝis al Anglujo kaj Frislando kun varoj el Oriento kaj revenis hejmen kun anglosaksa kaj nederlanda mono. El la akiritaj trezoroj parto forlasis la landon, kaj parton oni fandis je ornamaĵoj, ankaŭ por boatoj, kaj la restaĵo estis parte enmetita en tombojn, parte kaŝita en la tero. Ŝajne

nur tre malmulte el la lasta oni eltrovis dum ĵa lastaj jaroj, kaj eta parto de ĝi venis en la manojn de arkeologoj.

En la jaro 1870 kiel rezulto de elfosadoj kaj esploroj oni eltrovis nur en Visby kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo mil kvarcent sepdek unu monerojn el la bizanca regno kaj tre valorajn ornamaĵojn. El la moneroj kaj arabaj kaj anglosaksaj — entute multdekoj da miloj — trovitaj en Svedlando pli ol duono estis en la tero de Gotlando. Saksaj, sudgermanaj, polaj, bohemaj kaj hungaraj moneroj multaj ankoraŭ estas trovitaj tie; kaj krome oni trovis ĉinan tason kaj konkojn el la hinda oceano en tomboj el la ferepoko, kaj tiu fakto atestas pri la intensaj komercrilatoj kun malproksimaj landoj, kiujn havis la insulo tiutempe.

Iam en la deka jarcento kristanismo faris sian vojon en la insulon. Kaj dume, kiam la konvertiĝo estis en progreso, la komercaj rilatoj kun Oriento ankaŭ ekfinis. En la entombigitaj trezoroj de la posta periodo oni ne plu trovas arabajn monerojn, sed komercaj rilatoj kun Ruslando kaj la bizanca regno daŭris same kiel antaŭe kaj la rilatoj kun okcidentaj landoj fariĝis multe pli viglaj ol iam antaŭe.

La abundaj moneroj, i. a. ankaŭ tiuj de pli postaj periodoj, diversspecaj, estas trovitaj preskaŭ ĉie sur la insulo. Kaj tiu fakto kaj la aliaj montras, ke la komercistoj estis lokitaj en ĉiuj partoj de la lando. En la tempoj de la vikingoj kaj en la komenco de la mezepoko la kamparoj estis la lokoj de komerco, kaj tiam certa urba komunumo ne ekzistis. Iom mirige, sed vere ke malgraŭ la multa komercado la insulo ne havis multajn havenojn. La sola haveno aŭ havenloko, pri kiu oni scias kun certeco, fondita jam en la tempo de vikingoj, estas la loko, kie kuŝas la urbo Visby. En la urbo oni trovis fundamentojn de domoj kaj postsignojn de frua loĝado el tiu periodo. Inter la eltrovaĵoj estas paro da pesiloj por pesi monerojn! Ĝia akurateco parolas pri la komerca industrio de la loko en tiu malnova tempo.

Nun Visby! V i signifas »loko por ofero» kaj b y »vilaĝo» — sekve Visby signifas »la vilaĝo ĉe la oferloko». Tiu loko ŝajnis ludi certan rolon kiel religia centro de pagana kulto por pli malpli granda loĝantaro de Gotlando.

Visby kiel vera urba komunumo kun ĝiaj juraj institucioj kaj privilegioj estis fondata de la alvenintaj germanaj komercistoj. Ĉe la sudbaltaj bordoj, kie loĝis la paganaj vendoj, fondiĝis la unua germana urbo Lübeck en la jaro 1143, sed kiam la saksa duko Henriko la Leono subigis al si la urbon en la jaro 1158 kaj trovis tie apogon por sia komerco, la komercistoj de tie komencis viziti la merkaton de Gotlando. En la jaro 1163 Henriko faris kontrakton kun la komercistoj kaj tiamaniere lasis la germanajn komercistojn ekloĝi en Gotlando, kaj tiel Visby fariĝis konata kiel »la koro de la Balta komerco». De tiu tempo ĝis la jaro 1645, do dum kvarcent jaroj, Visby travivis glorajn epokojn kaj multajn materiajn ŝanĝojn kaj ankaŭ mizeron de historiaj okazintaĵoj, kies postsignoj abundaj kreis tiom intensan intereson eĉ ĉe mi, simpla vizitanto el Oriento, ke mi ne povis ne ekscii iom pri la sorto de la urbo, kaj tial mi priskribas al vi mallonge, por ke ankaŭ vi, kara leganto, havu parton de mia ĝojo, kiun mi spertis dum mia ekskurso tie.

Do Visby fariĝis la centro de aktiveco de germanaj komercistoj. Ili faris leĝon por la urbo, Visby posedis eĉ sian propran marleĝon, kiu validis dum jarcentoj en multaj landoj kaj sur multaj maroj. Kompreneble, kiel oni povas supozi, la enlandaj komercistoj trovis en tio danĝerajn konkurantojn. La komercistoj en Visby sendis siajn komercajn ŝarĝoŝipojn diverslanden kaj gvidis la tutan afernon pli bone ol la izolaj komercaj lokoj tie kaj tie en la insulo. La germanoj estis bone lernintaj la altan komerckonon kaj metodon per sia rilato kun la florantaj meditteraneaj respublikoj kaj vigle faris komercajn rilatojn kun merkatoj en Ruslando, en Baltaj ŝtatoj kaj en venda kaj

sveda bordaj provincoj. Visby fariĝis la plej granda kaj potenca urbo en la Baltaj landoj — »same granda kiel la tiama Londono, pli granda ol Lübeck, kaj multoble pli granda ol la plejmulto de nordgermanaj komercaj urboj — vera metropolo, kompare al la malgranda Stockholm. Multnaciaj komercistoj, artistoj kaj maristoj ofte renkontiĝis en la urbo, kaj la ŝarĝoŝipoj alportis riĉaĵojn al la bordoj, kaj la urbo kreskis, kreskegis.»

En la jaro 1288 Visby, la germana urbo, fariĝis sveda pro certaj okazintaĵoj. La historio estas jena: La germanaj urboj volis nek toleri, nek ludi malpli potencan rolon en la komerca vivo de preskaŭ duonkontinento, kiun regis Visby. La historio pri la kunpuŝiĝoj inter la potencavidaj, komercistaj urboj estas longa. En la jaro 1288 printempe la gotlandaj kamparanoj ribelis kaj armitaj marŝis al Visby. En loko Roma, kie nun kuŝas la postrestaĵoj de granda monaĥinejo, ili renkontis la urban armeon. En furioza batalo la kamparanoj malvenkis. Pacoproponoj estis faritaj sed sen rezulto. Tiam venis la sveda reĝo kiel la arbitracianto, kaj kvankam la ĉefparolantoj de la germana komercasocio ruze prezentis al la reĝo la ribelon de la kamparanoj kiel agon de perforto kontraŭ fremduloj, tamen la venkinto en la batalo estis la tria parto, nome la sveda reĝo. Kaj la kamparana respubliko de Gotlando fariĝis sveda provinco, kaj la societo de germanaj komercistoj, kiu restis en Gotlando, fariĝis sveda urbo Visby. Sekve la du socioj, nome la Gotlanda kaj la germana en Visby, unuiĝintaj akiris la nomon en historio vaste uzata, »la burĝoj en Visby», frazo kiun vi foje renkontos ankaŭ en mia verketo rilate al Visby. En la komenco de la dekkvara jarcento Lübeck akiris potencon kiel la mastro sur la maroj. Sed tamen ŝarĝoŝipoj en- kaj eliris la havenon de Visby. Kaj valoraj varoj kaj riĉaĵoj amase plenigis ĝin. Ĝia graveco komerca ne estis multe malaltigita. La urbo faris sian propran monon, kaj kvankam ĝia komerco fal-

etis jaron post jaro, tamen la kredo regis, ke la bona tempo revenos. La potenco de kamparanoj restis nerompita, kaj iliaj ŝipoj ankoraŭ vizitis eksterlandon. La urbo tamen restis riĉa kaj potenca, sed ĝia falo estis proksima.

La tataroj blokadis komercajn vojojn en Ruslando, kaj la germanaj urboj pli kaj pli gajnis en la konkurenca batalo en alilandaj merkatoj, kaj ĉiam pli malkreskis la ko-

Provo de rekonstruado de "Lojsta slott".

merco de Visby. La fluo de arĝento en la urbon el aliaj landoj pli kaj pli malaltiĝis. Al tiu malbonsorto aldoniĝis detrua brulego en 1314. Teruraj vintroj kaj sekaj someroj sekvis kun pestoj kaj malsato, kiuj senkompate forrabis la vivojn tiel de riĉuloj kiel de malriĉuloj, kaj la tombejoj estis plenigitaj de kadavroj.

Tamen la ŝipoj de Visby moviĝis surmare, kaj la urbo ankoraŭ posedis tiom da riĉaĵo, ke oni esperis kvazaŭ spite pri reveno de pli bona tempo.

Kaj fine venis la tago de la finfalo! — Kiel mi rakontis en la komenco, la dana reĝo Valdemar Atterdag ne povis

toleri la potencon de Visby, kaj en la menciita julia tago li surbordiĝis kun soldatoj. En Västergränd kaj en loko Mästerby apud Visby 600 kamparanaj soldatoj renkontis la pli spertan armeon de la dana reĝo! Malsukcese batalis la kamparanoj tute sangaj kaj vunditaj de la akraj glavoj de la danaj soldatoj, kaj la malamikoj transpaŝis ilin, bruligis la hejmojn kaj marŝis al Visby. Ĉe la urba muro 1800 kamparanoj kun malespero kontraŭbatalis la danan armeon, sed vane. Sama sorto trafis ilin. La pordoj de la urbo estis fermitaj. Forta murego kaj turoj protektis ĝin. Armitaj soldatoj estis pretaj defendi ĝin. Tamen fine la urbo lasis sin senkondiĉe en la manojn de Valdemar. La burĝoj de la urbo jam antaŭe faris sekretan vojon en la murego, laŭ kiu la reĝo eniris la urbon. Valdemar ne detruis la urbon sed devigis la loĝantaron fordoni sian riĉaĵon.

Nun aŭdu! Post la vizito ĉe la kruco sur la tomboj de la falintoj ni komencis iri laŭ la murego denove kaj la gvidanto montris turon, kiu nomiĝis »Jungfrutornet», la turo de virgulino. Jen romantika kaj tragedia historio: Valdemar, kiel komercisto, kun falsa nomo jam la antaŭan jaron vizitis la urbon kaj tie enamiĝis al fraŭlino de burĝa familio en Visby. Lia intenco estis plenumita, ĉar li deziris ekkoni ĉiujn sekretajn vojojn en la giganta muro. La fraŭlino vere amis lin, kaj li malkaŝis sian veran nomon nur antaŭ la forvojaĝo al Danlando kaj diris al ŝi, ke sekvontan jaron li revenos por venki la urbon kaj tiam faros ŝin sia reĝino. La fraŭlino malsana de amo suferis teruran timon, ĉar ŝi antaŭvidis la mizeran tagon de sia hejmurbo. Laŭdire nur antaŭ la tago de la atako en la posta jaro ŝi malkaŝis la tutan aferon al la urbestro. Hejmamo venkis la postulon de persona amo! Kaj tion Valdemar antaŭsupozis, kaj tial li subite atakis la urbon en tute alia direkto.

Valdemar konkeris la urbon kaj poste venĝema serĉis ŝin kaj entombigis ŝin vivanta en la turo, kiu nun portas ŝian nomon kaj rakontas al la vizitantoj la malgajan his-

torion. La rakonto pri la invado de Valdemar ne finiĝis tie. Liaj soldatoj devigis la urbanojn plenigi barelojn per oro, arĝento, entute per riĉaĵoj, kiujn abunde posedis la Visbyanoj. Li ŝarĝis unu ŝipon per tio, tamen ne kontenta li devigis la loĝantaron oferi pli multe, kaj li ŝarĝis alian ŝipon. Pri tiu okazintaĵo troviĝas historia pentraĵo en la

Rekonstruita gotlanda domo el la unua ferepoko.

arta galerio de Stockholm, kaj mi ankaŭ legis pri tiu bildo la interesan priskribon de la sveda verkistino Selma Lagerlöf.

Laŭdire tiu rabado de Valdemar ne portis al li feliĉon. Survoje al Danlando estiĝis granda ventego, kaj unu el la ŝarĝoŝipoj tute dronis kun la trezoroj apud la insulo Karlsö, kaj li nur tre malfacile kaj sen riĉaĵo povis atingi la hejmlandon.

Jen pri Karlsö: Estas du insuloj, granda kaj malgranda, kiuj portas la saman nomon, kaj ambaŭ estas rokinsuloj tre kuriozformaj kun miloj da truoj tute ne loĝeblaj. Kaj nuntempe reĝlando de nordaj marbirdoj! En granda

Karlsö miliono da birdoj havas siajn nestojn en la truoj, kie oni i. a. trovis restaĵojn de homloĝado en tempo minimume kvarmil jarojn antaŭ la nia.

Nu, denove pri Visby. Ĝia potenco ankoraŭ ne estis tute foririnta. En la posta jaro la burĝoj de Visby kun helpo de la germanaj urboj forpelis la danajn agentojn, postlasitajn de Valdemar, aŭ eble igis la germanajn urbojn ĉe la Balta Maro militi kontraŭ Valdemar.

En la jaro 1362 denove fajro bruligis la urbon kaj rapidege ĝia potenco sur la maro venis al la fino. En 1390 piratŝipoj de la »vitalia frataro» el la haveno de Mecklenburg faris teruron sur la Balta Maro, forrabante komercajn ŝipojn kaj tiel detruis la prosperon de Visby.

La fonto de ĝia riĉeco ne povis plu ekzisti. Kun angoro kaj teruro la komercistoj de Visby rigardis la alproksimiĝantajn piratŝipojn, kaj la piratoj alvenis! Fajro, mortigado kaj terurismo sekvis dum kvar jaroj.

En la jaro 1398 lia alta moŝto de la germana ordeno Konrad von Jungen kun siaj nobeloj forpelis la piratojn, kaj la urbo kaj la tuta insulo ĝuis pacon dum dek jaroj. En la jaro 1408 la reĝo de Danlando, Svedlando kaj Norveglando post multa konfuziĝo akiris la urbon de la germanaj nobeloj. La dana reĝo, Erik, konstruis sian kastelon ĉe Visby. De 1437 li restis tie dum dek du jaroj, kaj liaj soldatoj regis la landon, kaj liaj ŝipoj rabante ekveturis sur la Balta Maro. En la dekdua jaro la sveda reĝo sendis siajn trupojn al la insulo kaj ĝin konkeris. La reĝo Erik forkuris, sed venis la dana reĝo Kristian por postuli la urbon al la dana trono, kaj li akiris la urbon, sed sekvis bataloj, sango fluis, kaj la urbo estis denove en brulo.

En 1524 la sveda reĝo Gustav Vasa konkeris la insulon, sed Visby ankoraŭ restis en la manoj de la danoj, kaj tial la svedoj denove devis forlasi la insulon. En la jaro 1525 Lübeckanoj reatakis la urbon kaj ĝin bruligis. La norda parto de la urbo kun la urbdomo kaj ĉiuj dokumentoj pri

urbaj privilegioj brulis ĝis cindro. Poste venis la reformacio! La preĝejaj trezoroj estis forprenitaj. La tegmentoj de la preĝejoj malaperis, kaj de la muroj falis ŝtono post ŝtono. Oni ne plu zorgis pri renovigo de la preĝejoj, kaj fine, laŭ la paca traktado inter Danlando kaj Svedlando inter la jaroj 1644 kaj 1645, Gotlando fariĝis sveda provinco kaj nun estas vera parto de Svedlando. Jen estas la mallonga skizo pri la sortoplena historio de Gotlando kaj de Visby, la urbo de ruinoj kaj rozoj . . .

*

La postan tagon matene mi sola forlasis la urbon per trajno kaj vojaĝis norden al Lärbro. Tie renkontis min esperantisto, s-ro Malmkvist, kun sia ŝarĝaŭtobuso, kaj ni daŭrigis pli norden. Survoje mi haltis en Bunge kaj rigardis tiean belaspektan preĝejon el la dektria jarcento kaj la liberaeran muzeon kaj en ĝi la kolekton de tipaj kamparanaj domoj de Gotlando. La muzeo estas ege interesa, ĉar ĝi donas imagon pri la pasintaj epokoj de Gotlanda civilizo. Poste ni daŭrigis nian vojaĝon — survoje ni devis transiri markolon — al Fårö.

La soleco kaj izoleco dum la vojaĝo kaj en la loko Fårö forte sentiĝis. Blovis forta vento, kaj la vetero fariĝis nebula. Do mi ne povis eliri por rigardi la eksteron. Vespere mi telefonis al mia amiko en Stockholm rektoro Jansson por rakonti pri mia ĝojo de ĉi tiu vizito, ĉar la impresoj ricevitaj en la mallonga tempo estis tiom intensaj, ke mi sentis la bezonon iom elparoli pri tio. Je la oka horo vespere mi faris paroladon antaŭ ĉ. 100 personoj.

Fårö estas la plej norda vilaĝkomunumo de la insulo. Ĝi estas apartigita de markolo, kaj la plej norda parto de ĝi konsistas el grandaj sablodunoj, longaj kvin kilometrojn. La surfaco de Gotlando fakte estas unu platajo, konsistanta el kalkŝtono. De la alta okcidenta bordo la landa tereno deklive malaltiĝas orienten, kie la landroko subiĝis sub la marsurfacon.

La postan tagon unue ni lunĉis, kaj poste la loka esperantisto, s-ro Malmkvist, veturigis min per sia aŭtomobilo laŭ vojo preskaŭ paralela al la orienta bordo al suda urbo Ljugarn. Ĉirkaŭ la sesa horo vespere mi atingis la lokon, kaj oni trovis ĉambron por mi en hotelo tre bele situanta ĉe la marbordo. Mi ne plu eliris tiun vesperon, ĉar mi sentis min tro lacigita — eble ne de vojaĝoj — ĉar dum vojaĝo

Skulptita ŝtono kun bildoj de vikingaj ŝipoj.

mi sentas min ĉiam hejme, sed pro la rapide akiritaj impresoj. Survoje mi nur povis vidi tie kaj tie kamparan hejmon kaj kulturitan kampon, kreskaĵojn kaj arbarojn.

La postan matenon mi leviĝis ĉirkaŭ la deka. La sunbrilo tiris min eksteren. Post la matenmanĝo, kiam mi estis tute preta eliri, venis alia esperantisto, s-ro Hultin, laŭ profesio fotografisto. Kiel ĉarma estas la loko! Tie kaj tie la siringaj arbetoj portis kostumon de abundaj floroj. La fotografisto kelkfoje uzis sian aparaton. Ljugarn estas trankvila loko, sed mezsomere, diris la esperantisto, la vi-

vo tie ĉi fariĝas tre vigla, kiam amase venadas la turistoj. Vespere mi paroladis antaŭ 75 personoj. S-ro Malmkvist komence estis la tradukanto, sed s-ro Hultin devis daŭrigi kaj fininterpreti la paroladon. Post tio ni kune promenis sur la kampara vojo, kaj oni montris kelkajn interesajn kamparajn domojn.

Postan tagon per aŭto returne al Visby. Survoje ni haltis proksime al Visby en loko Roma, kie staras la postrestaĵo de la grandioza Roma preĝejo kaj monaĥejo. Ĉirkaŭ kaj en ĝi estas nur verdaj herbejoj, el kiuj levas sin la muroj kun belaj kolonoj ankoraŭ tenantaj la rondajn belajn arkojn. Ĝi ankaŭ estis konstruita en la dekdua jarcento. Kiam mi rigardis ĝin, la penso kuris vere al Romo.

Mi legis (Wallin, Visby) ke ĉi tiu malgranda insulo posedas multoble pli da lignaj artskulptaĵoj el la mezepoko ol ekzemple tuta Anglujo. Tiaj laboroj atestas, ke la gotlandaj artistoj havis intimajn rilatojn kun tiutempaj famaj skoloj de skulptarto en aliaj landoj de Eŭropo. Eksster Francujo estas malfacile trovi landon en tuta Eŭropo, posedantan arĥitekturon kaj dekoracian skulptarton tiom konsekvencan kaj evoluintan kiel Gotlando. Nuntempe staras preskaŭ 100 belaj preĝejoj sur tiu malgranda insulo. Dum mi meditis pri tiuj aferoj, la aŭtomobilo atingis la celon. La amikoj renkontis min kaj rekte gvidis min al la preĝejo. S-ro Malmgren el Stockholm estis tradukanto. De la prelego rekte al ŝipo returne al Stockholm. Sekvis nin multaj personoj, esperantistoj kaj neesperantistoj, inter ili du ĵurnalistoj, kaj promenante ili faris intervjuon. Ni atingis la kajon, mi premis la manojn de la akompanantoj. Du el ili transdonis donacojn ĵus antaŭ la enŝipiĝo. La ŝipo ekmoviĝis! Maja trankvila vespero kun la krepuska lumo, nekonata ĉe ni, kaj antaŭ miaj okuloj estas la turoj de Visby. Mi staris sur la ferdeko tiom longe, kiom Visby estis videbla. De malproksime la urbo en la lumeto de stratlampoj aperis antaŭ mi kvazaŭ forgesita

lando de iu princino en fabelo, portanta en sia brusto malĝojon pro la kruelaj okazintaĵoj de jaroj pasintaj sed samtempe ankaŭ pacon. Jes, dum la lastaj kvincent jaroj la urbo kaj la insulo ĝuis kaj ĝuas pacon kaj ĝi bezonas tion! Dum tiu ĉi tempo oni ne plu forprenis eĉ ŝtoneton el la muroj de la preĝejoj, male oni bone zorgas pri la memoraĵoj kaj la postrestaĵoj de la antikva kulturo, kiuj parolas pri la gloro de Gotlando kaj altiras ĉiujare en somero multmilojn da turistoj.

Subite mia okulo renkontis la polusan stelon, kiu kvazaŭ fikse rigardis la urbon, kaj al mi ŝajnis, ke la neatingebla stelo de tre malproksime vidis ĉiujn okazintaĵojn en Visby, ne, de la tuta insulo, kaj mi murmuris: Adiaŭ Visby, adiaŭ Gotlando. Kun sento de malĝojo mi malrapide paŝis malsupren en mian kajuton, kie kuŝiĝante sur la liton mi interŝanĝis kelkajn frazojn kun s-ro Malmgren.

Matena lumo vekis min, kaj mi trovis min sub kovrilo! Certe tio estis la faro de la kunvojaĝantoj, kaj oni kriis: »Nynäshamn!» — la havenurbeto ĉe la orienta bordo de Svedlando — ne malproksime de Stockholm.

Vikinga ŝipo.

VÄRMLAND, LA LANDO DE GÖSTA BERLING.

En 1929 mi vojaĝis dum la vintro tra Värmland okaze de mia prelegvojaĝo. La provinco Värmland kuŝas ĉe la norvega limo, norde de la plej granda sveda lago Vänern. Mia ĉefrestadejo estis la urbo Karlstad, kie s-ro Nordling gastigis min en sia hejmo, kaj mi ĉiutage vojaĝis al diversaj lokoj kaj faris prelegojn kaj poste en malfrua nokto revenis hejmen. Värmland estas arbara lando. Estas la akvovojoj de lagoj kaj riveroj, la grandaj valoj kaj densaj arbaroj, kiuj karakterizas la scenojn de la provinco. La plej granda rivero nomiĝas Klarälven. Ĝia supra regiono estas el natura vidpunkto unu el la plej ravaj, kiujn mi vidis. Tre konata estas la longa ĉeno de lagoj, kiuj kune nomiĝas Frykensjöarna. Ĝiaj ĉirkaŭaj regionoj estas la scenejoj priskribitaj en Gösta Berling. Vi ja legis tiun faman verkon, kaj mi nur povas aldoni, ke tiu verko vere malfermas al ni la veran spiriton de vivo kaj naturo de Värmland. Dum mia vojaĝo iun tagon mi vizitis la hejmon de Selma Lagerlöf, la fama Mårbacka, ĉe unu flanko de la lagoj Frykensjöarna. Ŝi afable akceptis min kaj mian akompananton. Ĉe alia flanko de la lago kuŝas »Ekeby», la scenejo de Gösta Berling. Survoje de Mårbacka unue per aŭtomobilo al proksima stacio kaj de tie veturante per trajno ni vidis la reston de »Ekeby». La domo nur kelkajn tagojn antaŭ mia vizito estis forbrulinta. Do ni vidis nur la nigrajn murojn sur altaĵo, kaj tio tuj memorigis min pri la brulokazintaĵo en la verko. Estas ne mirige, ke La-



Karto de Värmland.

gerlöf devenas ĝuste el tiu provinco, ĉar ĝi naskis jam antaŭe multajn geniajn verkistojn kaj poetojn, kies famo de faro transiris la limon de la lando. Esaias Tegnér, la fama aŭtoro de Fritiofs Saga, kaj la plej granda sveda poeto — post Bellman — nome Gustav Fröding, devenas el Värmland, kaj ilia posteulo Selma Lagerlöf eternigis la nomon de sia provinco per sia verko Gösta Berling. Estas la Värmlanda rava naturbeleco, kiu inspiris la grandajn poetojn kaj verkistojn.

Mi vizitis ankaŭ la malgrandan urbon Filipstad. Tie kuŝas bela maŭzoleo de la Värmlanda inĝeniero John Ericsson, la inventisto de pelŝraŭbo kaj »Monitor». La orienta distrikto de Värmland konsistas el ferminejoj. La mineja industrio havas malnovan tradicion jam el la mezepoko, kaj tiom frue kiel en la 15-a jarcento fondiĝis ferfabrikoj,

kiuj ankoraŭ funkcias. Värmland krom fero posedas kiel jam dirite grandan riĉaĵon de arbaro.

Multaj belaj festokutimoj ankoraŭ vivas en Värmland. Tute hazarde la 13-an de decembro mi trovis min en iu vilaĝo, kie dum la vespero la komunumo pompe festis »Lu-

Värmland — la lando de romantiko kaj legendo.

ĉion» — la antaŭfesto de kristnasko. Kaj mi estis tute mirigita, kiam antaŭ la noktofino iu frapis mian pordon, kaj kantante eniris mian dormoĉambron — vera anĝelo en blanka robo, sur la kapo krono lumigita de vivaj kandeloj, kaj en la manoj portante ornamitan pladon kun kafo kaj kukoj! Antaŭe neniam spertinta ion similan, mi demandis al mi mem: »Ĉu mi sonĝas?» Sed tiel okazas la

Lucĉia-festo en ĉiu Värmlanda hejmo, kaj tiel la dommastrino en priskribita maniero regalas la hejmanojn per kafo en frua mateno.

*

La duan fojon mi vizitis Värmland en somero kaj loĝis en la hejmo de gesinjoroj Axelson, en malgranda vilaĝo

Tipa värmlanda pejzaĝo (paroĥo Köla).

nome Dömle. Sinjorino Axelson estas artistino, kiu multe vojaĝis en diversaj landoj, kaj sinjoro Axelson vera värmlandano, kiu dumtage laboras kaj vespere okupiĝas pri studado aŭ interparolado pri filozofio, literaturo k.t.p. La vilaĝo kuŝas en vasta valo apud lago. Tra la valo fluas malgranda rivero en la lagon. Super la rivero oni konstruis ponton kaj unuflanke ĉe la ponto malgrandan elektran stacion el la forto de la riverfluo. Ĉe la kontraŭa flanko kuŝas malgranda lignodometo tre malnova, kie oni

gastigis min, kaj iom malproksime de la elektrejo kuŝas la domo de miaj gastigantoj. Tiu somero estis al mi granda travivaĵo. La tuta valo estas bienkampo, kaj la bienisto posedas ripozhejmon, kie dum somero kolektiĝas multaj gastoj, speciale el urboj.

Rapide la vilaĝinfanoj — knaboj kaj knabinoj — proksimiĝis al mi. Ofte mi sidis en somerkostumo ĉe la riverbordo kun fiŝkaptilo, kaj la infanoj kolektis por tio vermojn kaj laŭbezone enmetis en mian kaptilon. Tiam mi spertis, kiel facile oni interkompreniĝas parolante kun infanoj. Ŝajne la infanoj havas la puran econ aŭ instinkton por kompreni homojn, kiuj ne parolas ilian lingvon. Ofte mi faris ekskurson en la arbaroj kaj montoj, banis kaj naĝis en la lago kaj kolektis manĝeblajn fungojn en la ĉirkaŭaĵo, en belaj vesperoj remis boaton kun aliaj sur la lago, kaj ĉiuj kune kaj laŭvice kantis popolkantojn. —

Vermlando vi belega, vi plej bela land',
vi krono de landoj de Svedlando!
Se eĉ mi venus mezen de l' promesita land',
mi tamen reirus al Vermlando.
Mi tie volas vivi, kaj tie mortos mi.
Se iam el Vermlando knabinon prenos mi
mi scias, ke mi neniam pentos.*

Tio estas la unua strofo de la tre konata Värmlanda kanto. Sendube ĉiu provinco en sia maniero kontribuis al la tutlanda kulturo kaj tial ĉiuj landpartoj estas gravaj, sed neniu sukcesis esprimi sian amon al sia hejmo kaj naturo tiel varme, kiel faris la popolo de Värmland.

---

*) La sveda teksto estas:
Ack Värmeland, du sköna, du härliga land!
du krona för Svea rikes länder!
Ja, om jag komme mitt i det förlovade land,
till Värmland jag ändå återvänder.
Ja, där vill jag leva, ja, där vill jag dö.
Om en gång ifrån Värmland jag tager mig en mö,
så vet jag, att aldrig jag mig ångrar.

Multofte mi aŭdis la Värmlandan kanton, en ĝia melodio vibras la intensa pasio de amo al la lando kvazaŭ inundiga fluo de potenca rivero tra la lando. Eble estas kurioze sed ŝajnis al mi vere, ke multaj trajtoj de la värmlandanoj similas al la bengaloj. La värmlandanoj amas aŭdi muzikon kaj kanti kantojn en ĉiutaga vivo kaj povas paroli pri literaturo, arto, filozofio en senĝena kaj flua maniero. Ĉiu flanko de la homa vivo interesas ilin.



Sunne. Flosado de trunkoj en Fryken.

Dank' al mia mastrino, kiu estas konata en la tuta regiono, mi povis viziti preskaŭ ĉiun hejmon, kaj tiamaniere mi konatiĝis kun multaj vilaĝanoj. Iun tagon sinjorino Axelson gvidis min al la hejmo de la vilaĝa instruistino. Ŝi regalis min per kafo kaj frukto kaj ni kune ludis »Couronne». Survoje hejmen apud rivereto ni vizitis la hejmon de maljunulo, kiu vivtenis sin per ligna manlaboro, nome li el naturformaj trunkoj kaj branĉoj faras diversajn meblojn kaj objektojn. La maljunulo unue montris

sian laborejon kaj poste prenis sian tirharmonikon. Liaj hejmanoj ne ŝatis, ke li elspezis tiom da mono por ĝin aĉeti, sed li diris: »Mi opinias, ke kiam mankas mangxo en la hejmo, oni ja povas sin amuzi per muziko kaj forgesi ĉion alian.» Mi neniam atendis aŭdi tian filozofion, kaj iamaniere la eldiro de la maljunulo tre frapis min. Sed la

La aŭtoro en akompano de värmlanda fraŭlino iros al fiŝkaptado.

värmlandanoj tion povas esprimi en la vivo, ili havas tian kulturtradicion. Mi tuj pensis pri la värmlanda poeto Fröding, kies poeziaĵojn oni tradukis al mi. La poetoj ja esprimas la universalan senton kaj penson de ĉiuj aliaj homoj, kiuj mem ne povas doni liberecon al siaj vivperceptoj, pensoj kaj sentoj en la kadroj de poezio.

Ŝajnis al mi vere, ke en Värmland muziko, arto, legendo, la vivo en bienoj, ĉu grandaj ĉu malgrandaj, floras pli ol en aliaj provincoj. Kiel jam dirite, festaj kaj festenaj kutimoj — la restaĵoj de la primitivaj ritoj — vivas pli forte en Värmland ol aliloke. En tiu somero, iun tagon kun mia

mastrino mi ekskursis per aŭtomobilo al Karlstad por viziti la belan muzeon tie. Ĝi enhavas kulturmemorajojn, malnovajn kaj novajn, el la tuta provinco, kiuj estas ege interesaj.

La trian fojon mi vizitis Värmland antaŭ unu jaro. Tiam mi havis okazon vidi la ferfabrikojn, segejojn kaj krud-



La kafo gustas bone en somera vespero.

paperfabrikojn. Okaze de prelego mi vizitis la internojn de krudpaperfabriko kaj segejo en loko Skoghall apud Karlstad. La fabrikoj en Skoghall laŭdire funkcias en la plej moderna maniero. Tie troviĝas multaj esperantistoj, kaj dank' al ili mi pasigis tre belan tagon tie.

Survoje de Skoghall mi restis unu tagon en Karlstad, kaj tute hazarde estis la 13-a de decembro — la tago de Luĉio-festo. Kun konato mi vizitis vespere iun grandan restoracion, kaj dum ni vespermanĝis laŭ mia peto la muzikistoj ludis la »Värmlandon» kaj aliajn värmlandajn kantojn. Multfoje mi aŭdis tiujn kantojn, sed ili neniam malfreŝiĝas, ĉiufoje ili impresas same kiel je la unua fojo.

De Karlstad mi vojaĝis al Göteborg, sed survoje haltis en Kil kaj Säffle. Kil estas granda stacio, kie kruciĝas ĉefaj fervojlinioj. Tie la esperantistoj varme gastigis min.

En Säffle akceptis min instruistino, nome fraŭlino Magda Carlsson, kiu akiris famon kiel poetino en esperanta literaturo. Mi faris du paroladojn tie. En Säffle kuŝas la hejmo de konata sveda artisto Hasselbom, kiu fariĝis konata unue en Italujo kaj poste en sia hejmlando. Hasselbom speciale pentris la pejzaĝojn de Värmland.

Nun kiam mi memoras pri miaj travivaĵoj kaj la tempo pasigita en Värmland en diversaj okazoj, speciale en kamparo inter naturaj cirkonstancoj kaj atmosferoj, mi foje kantas al mi mem strofojn de la Värmlanda kanto: »Mi tie volas vivi kaj tie mortos mi».

SMÅLAND KUN LA URBO DE ALUMETOJ.

Ĵus mi venis de la urbo Jönköping. Dum mia vizito tie mi memoris pri mia infanaĝo, kiam mi ofte legis la nomon Jönköping sur alumetskatolo nesciante, kie kuŝas Jönköping. La alumetfabrika kvartalo estas granda kaj per si mem formas urbeton.

La urbo Jönköping, dorse ĉirkaŭata de montetoj, kuŝas mirinde bele ĉe la suda bordo de la lago Vättern. La urbo estas ne malpli ol 700-jara, kvankam pro ofta brulo en pasinta tempo nun ne plu restas la malnovaj konstruaĵoj. La esperantistoj tie montris al mi la interesan muzeon kaj la urban domon, konstruitan en 1785. En tiu domo estis multaj gastoj, historiaj personoj, sed mi ne tenas en la memoro la detalojn pri tio.

Somero nun komenciĝis. La grandaj arbaroj kaj multspecaj kreskaĵoj ĉe la lago memorigas min pri sudlanda naturo. Kun amikoj mi promenis supren sur altaĵoj, kie kuŝas liberaera parko laŭ modelo de Skansen, sed kun pli multaj kreskaĵoj. Mirinda estas la vidaĵo al la lago de tie super la urbo. Ni povis vidi de tie malproksiman monton Omberg pli ol 100 kilometrojn malproksime.

Ĉirkaŭ tiu lago mi vidis lokojn, kies beleco ensorĉis min. La kuriozforma monto Omberg kun arbaro sur sia brusto rekte sin levas el la akvo de Vättern en ĝia orienta bordo 260 metrojn alten, kaj de tie belega alta vojo kondukas al Jönköping. Veturante per aŭto laŭ tiu vojo mi spertis tian naturbelecon, ke estus domaĝe forlasi la landon sen sperti

tion. La vojaĝo preter la urbo Huskvarna per fervojo ankaŭ malfermis al mi senliman belecon de la naturo. Huskvarna estas floranta industria urbo kun 8.000 loĝantoj. Tie oni fabrikas biciklojn, kudromaŝinojn, motorbiciklojn, fornojn, pafilojn kaj multajn aliajn objektojn, kiuj estas aĉeteblaj en merkato de ĉiuj mondpartoj. Bela estas la akvofalo, kiu donas elektran lumon al la urbo kaj

La kastelo de Kalmar. El la 12-a jarcento.

forton al la fabriko. Nenie mi vidis tian belan industrian urbon — kvazaŭ ĝardenon.

La lago Vättern estas la dua laŭ grando en la tuta lando. Ĝia areo estas 1.900 kv. km. — 128 km. longa, dum ĝia plej granda larĝo estas nur 31 km. Malsimile al aliaj svedaj lagoj en ĝi la insularo forestas. Ĝiaj bordoj en ambaŭ flankoj kun densaj arbaroj donas impreson, ke ĝi kuŝas en mezo de montaro. La lago kuŝas tamen 88 metrojn super la marnivelo, sed ĝia plej profunda parto atingas 120 metrojn, do 32 metrojn sub la marnivelo. Ĝia akvo estas kristalklara, kaj oni povas vidi la fundon sub 20 metroj aŭ eĉ

pli. Oni rakontis al mi pri la naturfenomeno de la lago, nome sendependе de ventego aŭ aliaj eksteraj kaŭzoj ĝia tre trankvila akvo subite ŝanĝiĝas al terura ekmoviĝo kaŭze de subfundaj fontoj aŭ fluoj. La vaporo sur la akvosurfaco ofte produktas miraĝon, kaj la popolimago faris multajn rakontojn pri la supernaturaj estaĵoj leviĝantaj el la profundo.

Panoramo super Jönköping kaj Vättern.

Sude de Jönköping kuŝas la monto Taberg, sur kiu oni konstruis sanatorion. De la montopinto la vidaĵo super montaro, arbaroj kaj lagoj estas grandioza. Tiu landparto sude de Vättern nomiĝas Småland, kie mi inter alie vizitis multajn belajn lokojn okaze de peresperantaj prelegoj. La pejzaĝoj de Småland estas tre variaj kun montoj, longaltaĵoj, lagoj, arbaroj kaj marĉoj. En la orienta parto kuŝas historie tre fama urbo Kalmar. Mi restis tie nur por kelkaj horoj kaj vizitis la kastelon, komence konstruitan en la fino de la 12-a jarcento, poste pligrandigitan, kaj dum la mezepoko ĝi fariĝis unu el la plej grandaj svedaj fortik-

Jönköping. Muzeo de antikvajoj

Jönköping. Senplafona trunkodomo en la liberaera muzeo.

aĵoj. La kastelo impone impresas. Sed bedaŭrinde pro manko de tempo kaj okazo mi ne povis viziti la insulon Öland, la dua plej granda sveda insulo. Laŭ tio, kion mi legis kaj aŭdis, ĝi estas ege interesa, ĉar jam en la ŝtona epoko homoj loĝis tie. Restaĵojn de ŝipoj kaj riĉajn trezorojn de anglosaksaj kaj kufaj moneroj, alivorte postsignojn el la vikinga tempo, oni trovis tie. Krom tio la insulo estas interesa pro kreskaĵoj kaj bestaro. Mi vidis bildon, ruinon de malnova kastelo, kaj mi ankoraŭ bedaŭras, ke mi ne povis ĝin viziti.

ÖSTERGÖTLAND KAJ VÄSTERGÖTLAND.

La provincoj oriente kaj okcidente de Vättern respektive nomiĝas Östergötland (Orientgotio) kaj Västergötland (Okcidentgotio).

Omberg kuŝas en la provinco Östergötland, kie mi inter alie vizitis ruinon de malnova monaĥejo en loko Alvastra sur monta deklivo. Iom pli norde sur ebenaĵo kuŝas la urbeto Vadstena, konata al ĉiuj studantoj de kulturhistorio. La urbo enhavas nur 3.000 loĝantojn, kaj kuŝas tie malnova kastelo el la 16-a jarcento nuntempe neuzata (post mia vizito oni ĝin renovigis kaj uzas ĝin kiel lernejon por nenormaluloj).

La nomo de Vadstena ĉiam restos senmorta en la kulturhistorio de la lando, ĉar tie en la mezo de la 14-a jarcento Sankta Birgitta fondis monaĥinejon, kiu en sia tempo fariĝis edukcentro por la tuta lando. Restas malmulte da postsignoj de la monaĥinejo, sed la preĝejo tenas multajn memoraĵojn el la mezepoko. Nun la urbo estas konata pro siaj puntoj kaj manbrodaĵoj.

Mi vizitis la urbon Motala, kies nomon konas ĉiuj radioaŭskultantoj en tuta Eŭropo. Tie mi estis gasto en hejmo de esperantisto. Oni petis min kanti hindan kanton en radio, kaj tion mi ankaŭ faris kun tremanta voĉo. Proksime al la urbo en idilia naturo mi vizitis la ŝtuparforman kluzaron de la konata Göta-kanalo. Ĝi estas artefarita akvovojo inter du grandaj urboj, oriente la ĉefurbo Stockholm kaj okcidente la havenurbo Göteborg. Antaŭ pli ol jar-



La kastelo de Vadstena.



Kluzoj de Göta-kanalo ĉe Borenshult.

cento oni konstruis tiun mirindan akvovojon. La tombo de ĝia fondinto, nome Baltzar von Platen, kuŝas flanke de la akvovojo apud la kluzo.

La inĝeniera laborejo en Motala estas laŭdire la plej malnova en la lando. Tie oni fabrikas lokomotivojn kaj ŝipojn.

En la sama regiono mi vizitis inter alie du belajn urbojn, nome Linköping kaj Norrköping, ambaŭ prosperaj kaj vig-



Linköping. La granda placo kun la "Folkunga-puto".

laj. Kelkajn tagojn mi loĝis en Linköping, kiu enhavas ĉirkaŭ 30.000 loĝantojn. La entuziasmaj esperantistoj montris al mi la interesan katedralon el la 13-a jarcento, la muzeon kaj la preĝejan bibliotekon, kiu posedas 100.000 volumojn da libroj kaj maloftajn manuskriptojn. Krome tie troviĝas tre bela kolekto da artobjektoj. En la urba placo staras grandioza skulptaĵo el bronzo farita de la fama sveda skulptisto Milles pri la mezepoka reĝa dinastio de »Folkungarna».

Norrköping, la grava fabrikurbo.

La urbo Norrköping enhavas ĉirkaŭ 60.000 loĝantojn kaj multajn fabrikojn, inter kiuj speciale konataj estas la teksejoj. La esperanta vivo ĉi tie estas granda, kaj okaze de mia restado oni aranĝis grandan festkunvenon kun bela programo de muziko kaj kantado kaj kompreneble kun la sveda kafo.

*

La provinco Västergötland kuŝas nordoriente de Göteborg ĝis la bordoj de la du plej grandaj lagoj Vänern kaj Vättern. De Vänern al la maro fluas la rivero Göta älv, kiu faras la okcidentan limon de la provinco. Multajn lokojn mi vizitis en la provinco. Ĝi estas interesa el prakultura vidpunkto, ĉar postsignoj el tiu tempo ankoraŭ restas tie kaj tie. Mi vizitis i. a. la urbojn Skövde, Skara, Lidköping, Mariestad kaj Borås.

Skövde estas mezgranda urbo kun 11.000 loĝantoj. Tie staras malnova monaĥeja preĝejo, unu el la plej interesaj,



Kolringo el oro, de la 5-a jarcento p. K., pezanta 823 gr.
Trovita en paroĥo Möne, Västergötland.

kiujn mi vidis en la lando. Ĝi estis finkonstruita en 1250 kaj poste estas renovigita.

Nur unu nokton mi pasigis en la urbo Skara, okaze de peresperanta prelego. La urbo havas ĉirkaŭ 7.000 loĝantojn. Tie mi havis la plezuron konatiĝi kun s-ro Torgny, redaktoro de tiea gazeto kaj iniciatinto de la Excelsior-Asocio, kaj kun lia amiko s-ro Rosenberg, kiu havas »sun-

Kinnekulle. Kalkŝtonaj rokoj kun horizontalaj tavoloj.

kuracejon». Ambaŭ estas grandaj idealistoj kaj apogantoj de Esperanto. La postan tagon matene antaŭ forveturo la afablaj esperantistoj montris al mi la interesan katedralon. Estas interese noti, ke en la tuta lando ĉie staras preĝejoj. Kian grandan rolon la preĝejoj ludas en la spirita vivo de la nuntempa popolo estas malfacile diri, sed estas tute klare, ke en tempo pasinta la preĝejoj ludis gravan rolon kaj en la spirita kaj en la kultura vivo. Kaj tial la preĝejoj ĉie estas vizitindaj same kiel ĉe ni la temploj. Interesis min multe interŝanĝi pensojn kun la pastroj, kaj

mi ankaŭ renkontis multajn, sed ĉi tie ne estas loko okupiĝi pri tio.

Lidköping estas vigla urbo kun ĉirkaŭ 9.000 loĝantoj. Tie kuŝas grandaj alumet- kaj porcelanfabrikoj. Mi intencis viziti la alumetfabrikon, sed oni ĝentile klarigis al mi, ke oni havis malagrablaĵojn kun eksterlandaj vizitantoj, kaj tial mi ne insistis. Ne malproksime de Lidköping, ĉe la bordo de la lago Vänern, tute izola staras 300 metrojn alta monto, kiun oni nomas Kinnekulle. La pejzaĝo ĉirkaŭ la supro de Kinnekulle estas mirinde bela. Nordokcidente de Kinnekulle sur insulo en la lago Vänern staras grandioza kastelo, Leckö. Mi vidis ĝin nur preterpasante, kaj oni rakontis al mi, ke ĝi havas 250 ĉambrojn. Post mia vizito mi aŭdis, ke oni nun renovigas ĝin.

La urbo Borås kuŝas en la suda parto de la provinco inter belaj ĉirkaŭaĵoj. La urbo enhavas 34.000 loĝantojn. Grandaj kotonaj kaj teksaĵaj fabrikoj prosperaj faris la vivon de la urbo tre vigla. Mi restis tie nur unu nokton, kaj tial ne havis okazon multon vidi.

GÖTEBORG, LA DUA URBO DE SVEDLANDO.

La urbo Göteborg (Gotenburgo) estis la unua loko, kiu gastigis min la unuan tagon en Svedlando. La seminario de Nääs kuŝas proksime de la urbo, kaj tial preskaŭ ĉiudimanĉe aŭ sabate dum mia restado en Nääs mi vizitis la urbon kaj kun aliaj seminarianoj migris de muzeo al muzeo kaj ĉiufoje promenis en la bela ĝardeno de »Trädgårdsföreningen» (Ĝardena Societo). Ĝi kuŝas tre oportune tuj apud la stacidomo, kaj tial ĉiam mi trinkis kafon en la liberaera ĝardena kafejo. Entute estas tre interese

vidi la multnombrajn kreskaĵojn kaj speciale la tropikajn en varma vitrodomo, kie troviĝas eĉ plantoj kaj floroj el mia hejmregiono. Somere la ĝardeno ridas kun floramasoj, kaj tio estas bela festo por la okuloj. Nenie en Svedlando mi vidis tiom belajn publikajn ĝardenojn kiel en Göteborg. Iun someran tagon kun esperantistoj mi promenis en la granda botanika ĝardeno, kiu enhavas multegajn tropi-



Göteborg. Idilio en la urba parko "Slottsskogen".

kajn kreskaĵojn kaj interalie nekutiman densan arbaron, kiu havas la karakteron de sudlandaj arbaroj.

Kiel interesato pri slojdo kelkfoje mi vizitis la Rhöss-muzeon de arto kaj manlaboro. Granda estas la kolekto de objektoj, kaj speciale interesa estas la ekspozicio de belaj librobindaĵoj kaj teksaĵoj, eĉ el Ĉinujo. En la urbo troviĝas multaj muzeoj. La artmuzeo posedas trezoron, kiu ĉefe ilustras la modernan svedan arton. Krome la Göteborg-muzeo posedas grandan kvanton da etnografiaĵoj el diversaj landoj, el kiuj speciale interesaj estas la objektoj de la indianoj.

Göteborg. Acidgravuritaj fenestroj el Orrefors en la koncerta domo.

Kiel urbo Göteborg estas sufiĉe juna, fondita en la jaro 1619, kaj nun ĝi enhavas ĉirkaŭ 255.000 loĝantojn, sed la loko havas famon pro tio, ke antaŭ kvarmil jaroj homoj loĝis tie, kaj tiam ĝi estis nomata Lödöse. Nuntempe loko kun tiu nomo troviĝas apud la urbo. Ĝia haveno ĉiam plena de ŝipoj el ĉiuj kontinentoj ludas grandan rolon speciale en la eksportindustrio de la lando. Pri la interesa fiŝisthaveno mi jam skribis. Komence mi ne povis havi imagon pri la vivo tie. Al mi ŝajnis ke la loĝantaro estas pli rapidema ol aliloke en Svedlando, sed poste dank' al Esperanto mi vizitis multajn hejmojn kaj trovis, ke la Göteborganoj estas grandaj hejmamantoj.

Dum la lasta vizito mi trovis novan koncertan domon. Tre bela estas ĝia stilo, kaj ĝiaj fenestroj estas ornamitaj per artaj vitraj laboroj.

SKÅNE, LA GRENEJO DE SVEDLANDO.

Ĝis nun mi skribis nenion pri la sveda terkulturo, malgraŭ oftaj demandoj. La provinco Skåne kaj speciale ĝiaj urboj Malmö kaj Trälleborg akceptas la eksterlandajn gastojn de la kontinento. Mi vojaĝis tra la suda parto nur dum kelkaj monatoj, kaj nur okaze de mia vizito en Svalöv, la internacie konata eksperimenta ŝtatbieno, mi povis akiri iom da kompreno pri la stato de terkulturo. Unue mi penos doni tre malgrandan priskribon pri la bela Skåne. Laŭ naturo ĝi tre malsimilas al la ceteraj partoj de Svedlando kaj eĉ la popolo pli similas al la najbaraj danoj ol al la ceteraj svedoj. Kvankam mi tre malmulte konas la svedan lingvon, tamen mi tuj povas aŭdi la diferencon inter la dialektoj de Skåne kaj la aliaj, speciale ili elparolas la literon å en longa maniero, kaj tio sonas foje tre amuze. La Skåne-anoj laŭtemperamente estas pli viglaj kaj gajaj, kaj tial oni pli facile kontaktiĝas kun ili. La provinco estas dense loĝata, kaj oni nomas ĝin »la grenejo de Svedlando», kaj fakte nur ĉi tie oni vere povas vidi la terkulturan vivon. En la tuta provinco kuŝas densa reto de fervojlinioj, kaj la distanco de unu urbo al la proksima estas tre malgranda. Veturante per trajno mi aŭdis la kunvojaĝantojn vigle interparoli. Tion mi ne spertis en la norda Svedlando. Kasteloj, kamparaj domoj kaj multaj aliaj kulturaj interesaĵoj abundas en la provinco. Mi vizitis Malmö, la tria urbo de Svedlando laŭ grando. Ĝi enhavas ĉirkaŭ 138.000 loĝantojn kaj multajn belajn do-



Karto pri la suda parto de Svedlando.

mojn, parkojn kaj monumentojn. Tie mi estis gasto en hejmo de esperantisto, kiu ofte akompanis min dum miaj vizitoj al aliaj proksimaj lokoj.

Ne malproksime de Malmö kuŝas la fama universitata urbo Lund, kaj kiel oni povas supozi, la studentoj donas al la urba vivo viglecon. Mi estis gasto ĉe juna studento, kies gepatra hejmo kuŝas en loko Höör, kiun mi ankaŭ vizitis. Mi faris prelegon, rigardis la internon de sanatorio kaj eĉ salutis kelkajn pacientojn. Estis tiel, ke en la malsanulejo kuŝis malsana esperantisto, kaj mi volis saluti lin. En la angulo de la ĉambro estis tubo, kaj per tiu malsanuloj de tiu etaĝo interparolis kun tiuj en supra etaĝo. Mia

Malmö. Parto de la haveno.

Tipa pejzaĝo de Skåne.

amiko petis min saluti liajn amikojn en la supra etaĝo per la tubo, kaj tion mi faris, sed returne mi aŭdis virinan voĉon, kaj mi diris, ke mi estas hindo, kaj ke mi salutas ilin. Tion ili tute ne volis kredi kaj petis min veni en ilian propran ĉambron. Ankaŭ tion mi faris, sed kiam mi malfermis la pordon kaj du knabinoj vidis brunan hindon, ili dum longa tempo timis kaj nur poste salutis min. Mi in-

La fruktodona ebenĉjo de Skåne.

terŝanĝis kelkajn vortojn, deziris rapidan resaniĝon kaj forlasis la lokon.

Nun denove pri Lund. Ĝi estas depost pli ol mil jaroj sidloko de la episkopo. Plej interesa estas la tiea katedralo, konstruita en la 11-a jarcento. Ekstere oni renovigis ĝin, sed la interno estas tre interesa, kaj en ĝi troviĝas rimarkinda mezepoka grandega horloĝo, kiu ankoraŭ funkcias. La universitato estas fondita en 1668. Krom tio mi vidis kulturhistorian muzeon, kiu ekspozicias la kulturvivon de la lando, preskaŭ laŭ la modelo de Skansen en Stockholm.

Ĉe la sudokcidenta bordo de la provinco mallarĝa akvokolo, Öresund, nur ĝis 30 km. larĝa, dividas la landon de

Danujo. Ĉe ties plej mallarĝa parto kuŝas unu el la plej belaj svedaj urboj, nome Hälsingborg. La afablaj esperantistoj tie en somera tago regalis min en kafejo sur altaĵo, restaĵo de iama fortikaĵo el la 10-a jarcento. De tie ni povis vidi tre klare ĉe la kontraŭa flanko la danan urbon Helsingör, kie kuŝas la kastelo de Kronborg — la legenda scenejo de Hamleto de Shakespeare. Apud Hälsing-

Pejzaĝo de Skâne.

borg kuŝas bela kastelo en loko nomata Sofiero; tiu kastelo estas la somerloĝejo de la sveda kronprinco. Iom sude kuŝas la urbo Landskrona kun ĉirkaŭ 19.000 loĝantoj. Tie oni konstruas ŝipojn. Proksime de Landskrona sur insuleto Ven loĝis la konata astronomo Tycho Brahe en la 16-a jarcento.

Iom norde de Hälsingborg mi vizitis la lokon Höganäs. Tie troviĝas karbminejo kaj ceramikfabriko. Apud Höganäs duoninsulo eliras de la lando kvazaŭ lango, kaj ĝi estas la konata »Kullen». La akvo sude de ĝi nomiĝas Öresund kaj norde de ĝi Kattegatt. La rokoforma Kullen sin levas el la maro ĝis 200 metroj alte. De la maro ĝi as-

Rokformaĵoj sur la duoninsulo Kullen.

Panoramo de Hälsingborg.

pektas tre kurioza — krudaj ŝtonaltaĵoj kun kavoj, sed la supra parto estas kovrita de fagoj kaj aliaj arboj. Somere multaj ekskursas tien, ĉar la vidaĵo estas tie impona. Norde de Kullen mi vizitis la urbon Båstad, unuflanke la maro, aliflanke montodorso, kaj ĉe la bordo estas bela kaj bona somerbanejo.

Oriente de Skåne ĉe la balta bordo kuŝas la provinco Blekinge. Tie mi loĝis en vilaĝo Torskors kiel gasto en

Grenrikoltado en Skåne.

la hejmo de s-ro Ahnfeldt, entuziasma esperantisto, kaj mi neniam forgesos, kiel oni regalis min en lia hejmo. Okaze de prelegoj mi vizitis multajn lokojn en la provinco. La plej konata kaj granda urbo estas Karlskrona kun ĉirkaŭ 28.000 loĝantoj. La urbo posedas belan panoramon ĉe la marbordo, kie kuŝas la granda marmilita stacio de Svedlando. La idiliaj kamparaj pejzaĝoj de kulturitaj valoj karakterizas la tutan provincon, kaj oni nomas ĝin »la ĝardeno de Svedlando». Mi finis mian vojaĝon en la plej suda urbo de la lando, nome Ystad. Kurioza urbo kun malnovaj duone lignaj, duone brikaj domoj. Tie kuŝas fabrikoj kaj



Ystad. Tipa stratbildo kun interesaj, malnovaj domoj.

speciale la stanlaborejo produktas tre belajn objektojn. Alian sudan urbon, nome Trälleborg, mi ankaŭ vizitis. Ĉe la marbordo apud la urbo staras altega monumento skulptita de la fama sveda skulptisto Milles.

Jen estas la mallonga priskribo pri miaj vizitoj en la plej sudaj provincoj! Kaj nun pri terkulturo. Ĝi ne plu ludas tian grandan rolon, kian ĝi faris en la tempo antaŭ

Karlskrona. La granda placo kun la Urbdomo.

la komenciĝo de la industria evoluo. Tamen interese estas noti, ke la terkulturprodukta do ne malaltiĝis. Tute male ĉiujare ĝi pli kaj pli grandiĝas.

En pasinta tempo troviĝis en la lando multaj grandaj bienoj, same kiel en aliaj landoj. Nun oni dividis la grandajn en multajn malgrandajn bienojn.

Troviĝas en la lando multaj terkulturaj lernejoj, kaj por knaboj kaj por knabinoj, kie oni edukas tiujn, kiuj okupiĝas pri terkulturo kiel vivmetio. Cetere en la popolaj altlernejoj oni teorie instruas la terkulturan sciencon kaj ekonomion. En la lando troviĝas grandaj eksperiment-stacioj. La plej atendinda estas tiu de Svalöv, kie oni atingis

grandan rezulton de diversaj eksperimentoj pri miksitaj grenoj. Ĝi estas fondita en 1886 laŭ privata iniciato de bienistoj mem. Nuntempe la ŝtato grandparte ekonomie subtenas ĝin kaj ankaŭ kontrolas la laboron. La instituto de Svalöv havas ankaŭ 8 substaciojn en diversaj partoj de la lando: la celo estas tiamaniere eksperimenti diversajn grenojn miksitajn sub variaj klimatoj kaj ankaŭ elfari tiajn plantojn per krucigoj de diversaj grenoj, kiuj plej taŭgas en loka klimato. Per tiaj eksperimentoj oni faris multajn novajn specojn da plantoj. La bienistoj ĉiam kun intereso sekvas la rezultojn de Svalöv kaj multe profitas per ĝi. Krom la instituto de Svalöv troviĝas aliaj terkulturaj eksperimentejoj, sed inter ili mi vizitis nur unu en Ultuna, Uppland.

Tritiko kreskas multe en la suda kaj centra partoj de la lando, tamen pro diversaj kaŭzoj por enlanda konsumo oni plejparte importas.

Hordeo, sekalo kaj aveno pli malpli kreskas en preskaŭ ĉiuj landpartoj — en la norda parto tamen plej multe hordeo.

Terpomoj sufiĉe multe kreskas en la tuta lando, kaj ĝi ja formas la ĉefmanĝon. Betoj, tiel por sukero kiel por bestnutraĵo, ankaŭ kreskas — la unuaj plej multe en Skåne.

Bovinejoj troviĝas preskaŭ en ĉiuj bienoj, la laktejoj tamen plejparte funkcias laŭ kooperativa plano, nome bienistoj donas lakton al la laktejo, kie oni el ĝi faras buteron kaj fromaĝon. La bienistoj ricevas pagon por la lakto, kaj krome ili reprenas la senbuteran laktorestaĵon, kiun oni uzas kiel manĝon por la hejmbestoj. Grandan kvanton da butero oni eksportas alilanden.

La svedoj ĝenerale estas grandaj amantoj de floroj kaj tial ankaŭ de la ĝardena kulturo. En siaj multnombraj ĝardenaj somerkolonioj ĉirkaŭ la grandaj urboj la loĝantoj de la urboj kulturas legomojn, kiel brasikon, florbrasi-



Karlskrona. Malnovaj ŝipbekaj figuroj ĉe la milita ŝipkonstruejo.

kon, terpomojn k.t.p. kaj diversajn florojn, kiujn post somero oni metas en ujojn kaj per ili laŭeble ornamas la hejmon.

En la ĝardena eksperimentejo de la sveda terkultura akademio oni atingis bonan rezulton per elektro, nome oni varmigas la teron per elektraj fluoj kaj tiamaniere povas kulturi florojn kaj legomojn dum la malvarma sezono.

SOMERA SEMAJNO EN FIŜISTA VILAĜO.

Mi ĵus venis al Göteborg post dusemajna restado en fiŝista vilaĝo sur insulo en la okcidenta provinco Bohuslän.

Post la longa vojaĝo el Hindujo unue atingante Göteborg, mi vizitis Nääs kaj restis tie nur unu tagon. Nun ĉi tie estas plena somero kaj tial malfacile renkonti amikojn kaj fari laboron. Tial mi kune kun amiko vojaĝis de Göteborg per malgranda ŝipeto al fiŝista vilaĝo Donsjö. La ŝipo veturis inter la nudroka insularo, kiu formas unu kvinonon de la tuta provinco Bohuslän. Entute estis tre interese vidi, kiel la Norda Maro faris vojon inter la insularo al la roka bordo, kiu havas montecan karakteron kun strangaj terpintoj — kvazaŭ nazoj. La malgranda ŝipo post unuhora veturo atingis la kajon de la vilaĝo, kaj ni kun niaj kofroj forlasis ĝin. Mia amiko petis min resti ĉe la kajo kaj poste mem iris en la vilaĝon por serĉi loĝejon por ni ambaŭ. Dum horo mi staris tie tute sola. Sur la bordo la ŝipo lasis grandan lignoamason, kaj la virinoj surdorse portis ĝin al la vilaĝo. Mi trankvile staris kaj rigardis ilin kaj miris, ke la virinoj faras tian laboron. Ĉe la bordo kuŝis multaj boatoj, kaj en unu loko estis amaso da fiŝrestaĵoj. Dum mi cerbumis jen pri unu jen pri alia afero, la amiko revenis kun la novaĵo, ke du ĉambroj troviĝas en iu fiŝista hejmo, kaj ni povas loĝi tie kaj manĝi en proksima pensiono. Ni kune iris en la vilaĝon, kaj promenante inter la dometoj ni atingis la hejmon de la fiŝisto, ĉe kiu ni devis loĝi. La mastrino faris grandajn

okulojn, kiam ŝi vidis la brunan hindon, sed varme bonvenigis nin kaj gvidis nin al la supra etaĝo. Ni metis niajn objektojn kaj lavis nin kaj iom ripozis. Poste ni kune eliris kaj iomete vagadis tra la vilaĝeto. Dum la promenado mi vidis nenie viron, ĉie estis nur virinoj. Mia akom-



Karto pri la provincoj Bohuslän kaj Dalsland.

panantо klarigis al mi, ke la plej multaj viroj de la insulo nun estas sur la maro. Ni eniris en la manĝejon, sed la manĝaĵo ne estis preta, tial ni promenis ankoraŭ unu horon sur la rokomontetoj tie kaj tie tute verdaj. Sur la insulo loĝas ĉirkaŭ 700 homoj. En unu flanko troviĝas bela arbareto kaj eĉ kelkaj bienoj. En alia flanko unu lernejo, kaj iom ekster la vilaĝo proksime al la akvo sta-

ras preĝejo. Post la unua orientiĝo ni eniris en la manĝejon, sed mi miris, ke ĉiuj gastoj, ĉirkaŭ dek, estas virinoj. Fakte mi sentis min embarasita. Tiel pasis la unua tago.

Poste ni ĉiutage, matene kaj vespere, promenis tra la vilaĝo, la arbaroj kaj ĉe la marbordo. En la vilaĝo preskaŭ ĉiu domo estas ĉirkaŭita de kulturita tero. Kaj plej

Vidaĵo de la okcidentborda arkipelago.

multe kreskis terpomoj. La trian tagon la mastrino proponis sin montri al ni la vilaĝon, kaj ni kune vespere eliris. Mi estis demandinta al la mastrino pri produktoj de ŝia ĝardeno, kaj ŝi rakontis, ke krom la someraj legomoj tiom multe kreskas terpomo, ke dum duona jaro ili ne bezonas aĉeti. Survoje ni vidis novkonstruatan domon. La virinoj laboris. Mi iom miris pri la kutimo, sed mi ne havis okazon demandi, ĉar la mastrino parolis kun mia akompananto. Fine ni atingis la alian bordon de la insulo. Apud la bordo tie kaj tie multaj ŝtonoj en la maro staris

kvazaŭ leviĝintaj el la akvo. Mi saltis de unu al la alia kaj tiamaniere atingis sufiĉe grandan rokoinsuleton — iom malproksime de la bordo. Sur ĝia alta pinto staris malgranda turo kun »Aga-lampo», kiu ĉiumomente eklumis.

La suno subiris antaŭ miaj okuloj, kaj ĝiaj lastaj oraj radioj rebrilis sur la ŝtonrokoj. Mia animo estis tute kapt-

Fiŝista haveno (Käringön) en Bohuslän.

ita de tiu vidaĵo, kiel la lumo kaj la ombro ludas sur la trankvila maro. Malfacile priskribi kiel sorĉa estis tiu ludo, kaj mi tute forgesis, ke baldaŭ estos noktomezo, kaj ke ni devas iri hejmen. Mi vekiĝis el mia meditado, kiam miaj akompanantoj vokis min. La suno estis for, kaj la vidaĵo tute ŝanĝiĝis. La krepuska lumo daŭras tiom longe ĉi tie, ke oni ne emas enlitiĝi.

En la kvina tago la mastrino venis kaj frapis nian pordon. Ŝia vizaĝo ĝojbrilis, kaj ŝi informis, ke la edzo frumatene venis hejmen kaj ke la kapto estis bona. Tagmeze

la mastro mem venis, kaj post reciproka saluto kaj manpremo li invitis nin al velboata ekskurso en la posttagmezo. Mi vere estis tuŝita pro lia afableco al mi, tute nekonata hinda gasto.

Posttagmeze la mastro mem vokis nin, kaj ni eliris el la domo al la marbordo. La fiŝisto montris sian fiŝkaptan motorboaton, ĝian internon, la dormoĉambrojn kaj ankaŭ la kuirejon sub la ferdeko. Poste li demonstraciis al mi, kiel oni manipulas la grandan reton. Ankaŭ li montris la maŝinejon. Estas ses aŭ sep fiŝistoj kiuj kune posedas la boaton. Unu estas maŝinisto, unu direktanto, du metas retojn, unu preparas manĝon k.t.p. Per tia ŝipo ili veturas sur vasta maro kaj foje forestas de la hejmo multajn tagojn, eĉ pli ol monaton. Ĉiuj aranĝoj en la motorboato estas tre modernaj kaj modelaj. En antaŭa tempo oni ja ne havis motoron en la boato sed veturis per veloj. La tuta afero al mi tiel plaĉis, ke mi ekpensis fari malgrandan vojaĝon per tiu boato. Sed tuj mi memoris pri mia vojaĝo per multoble pli granda ŝipo de Londono al Göteborg kaj kiel mi suferis tiam pro marmalsano sur la maltrankvila Norda Maro, kaj mi ne plu emis demandi pri ekskurso.

Poste ni kvar kaj duono, nome gemastroj, ilia kvinjara knabo, mi kaj mia akompananto, eniris la velboaton. La mastro fiksis la velon, kaj dum tri horoj ni faris ekskurson de unu insulo al alia, tute senhomaj, nur ŝtonoj glatigitaj de multmiljaraj ondobatoj. La fiŝisto malrapide komencis rakonti pri siaj grandaj aventuroj sur maroj, kaj poste mi direktis min al li kun demandoj pri la fiŝkaptado.

Grava kaj interesa flanko de la sveda fiŝindustrio kuŝas en la fiŝkaptado en profundaj maroj. La Bohusländ-fiŝistoj vojaĝas eĉ al la norda parto de la Norda Maro, kaj tiam ili forestas de la hejmo dum kvar ĝis ses semajnoj. Kutime oni faras tian vojaĝon du- aŭ trifoje inter la monatoj marto kaj julio. Ĉiusomere sepdek fiŝistaj boatoj

kun ĉirkaŭ sescent personoj veturas sur la Norda Maro kaj Atlanto, kaj tiam oni arde penas kolekti la trezoron el la marprofundo. Tia kaptaĵo plejparte konsistas el molvo, sed ankaŭ moruo kaj hipogloso k.t.p. Post la kaptado oni tuj salas la fiŝon sur la boato, kaj kiam oni kaptis sufiĉe, la boato direktiĝas returne al la hejmo.

Ĉe ilia alveno al la hejma haveno okazas granda sensa-

Fiŝistaj boatoj.

cio. Oni tuj interkontaktiĝas kun grandkomercistoj kaj vendas la fiŝamason, kaj dume la virinoj preparas la fiŝon. Oni aŭ salas la fiŝojn en ujoj aŭ dispecigas ilin en du partojn kaj poste pendigas aŭ metas sur rokojn por sekigi ilin. Tiuj sekigitaj fiŝoj — molvoj — estas vendataj en butikoj de la tuta lando, kaj oni nomas tiun preparaĵon »lutfisk», la speciala manĝaĵo dum kristnaska tempo. Dum ni parolis pri tiuj temoj, la velboato ree atingis la hejman bordon.

Ni ĉiuj kune promenis tra la vilaĝo al la hejmo. Survoje mi denove vidis alian konstruatan domon, kaj ankaŭ tie la virinoj laboris. La gefiŝistoj invitis nin al kafo, kaj dum

la kaftrinkado mi demandis al la fiŝisto, ĉu tie ĉi troviĝas virinaj laboristoj ekzemple por konstrui domojn. La fiŝisto klarigis: »Se iu volas loĝi en nia vilaĝo, la loĝantoj senpage helpas en la domkonstruado. Tia estas la malnova kutimo, kaj ĉar la viroj forestas de la vilaĝo, kutime nur la virinoj faras tian laboron.» Poste li haltis kaj rigardis miajn okulojn kaj ridetante daŭrigis: »Se vi volas loĝi en

Rokoj ĉe la maro.

nia vilaĝo, ni senpage konstruos domon por vi!» Tiu kutimo en fiŝista vilaĝo iom mirigis min, kaj mi supozas ke tia kutimo ekzistas de tre malnova tempo.

Dum mallonga restado mi konatiĝis kun multaj en la vilaĝo, kaj la tempo pasis tre agrable inter ili. La senĝena parolmaniero kaj rekta konduto sen multaj ceremonioj tamen tre afabla, tia ŝajnis esti la karaktero de la fiŝistoj, kaj antaŭ ĉio mi trovis ilin tre simpatiaj, kies vivoj estas ne nur nutrataj de fiŝkaptado sed ankaŭ de la grandaj aventuroj sur maro kaj oceano.

Sed la ĉefa fiŝindustrio konsistas plejparte el haringoj, kaj laŭ la oficiala statistiko de 1928 la tuta haringa kapt-

aĵo pezis 49 milionojn da kilogramoj, kaj la malneta enspezo sumis je 8,3 milionoj da kronoj. La haringokaptado okazas en la Norda kaj Balta Maroj. La haringoj de la Balta Maro estas malgrandaj kaj oni nomas ilin »strömming», kiu reprezentas preskaŭ duonon de la tuta haringokaptaĵo. Laŭ la statistiko de la sama jaro entute 5.616 motorboatoj estis uzataj por fiŝkaptado, kaj 50 % el ili apartenas al la fiŝistoj de Bohuslän. La boatoj estas sufiĉe grandaj — de 25 ĝis 50 toneloj — kaj ĉiam movataj per motoroj de 25 ĝis 60 ĉevalpovoj.

Grava fiŝkomerca loko estas Göteborg. La fiŝista haveno ĉi tie estas grava kaj granda. Ĉiumatene la boatoj plenaj de fiŝoj kolektiĝas en la haveno, kaj oni aŭkcie forvendas la fiŝojn sub kontrolo de urba administracio. Tiuj kolektiĝintaj boatoj en la libera fiŝhaveno faras grandan spektaklon.

La rikoltoj en la maroj varias de jaro al jaro, same kiel tiuj sur la tero — iam bona, iam ne tre bona — kaj tial la ekonomia gajno ankaŭ ŝanĝiĝas. En la jaro 1925 la tuta kaptaĵo de marfiŝoj pezis 71,9 miljonojn da kilogramoj, kaj tio donis profiton de 26,3 milionoj da kronoj al la fiŝistoj. En 1922 la dolĉakvaj fiŝkaptaĵoj pezis 7 milionojn kilogramojn, kaj la valoro ankaŭ estis 7 milionoj kronoj.

La provinco Bohuslän ankaŭ alie estas interesa. Ĝi estis loĝata de homoj en tre antikva tempo, kaj la postsignoj ankoraŭ restas. Sur rokoj troviĝas trimiljaraj desegnaĵoj pri homoj, bestoj, ŝipoj, armiloj k.t.p., kaj cetere oni trovis kvinmiljarajn tombojn. De tieaj fjordoj la vikingoj vojaĝis per ŝipoj tra la Norda Maro, kaj ne estas mirinde ke la nuntempaj loĝantoj, plejparte fiŝistoj, ankoraŭ ĉiujare regule per malgrandaj boatoj suriras maron kaj oceanon kaj kolektas la trezoron el la marprofundo. Ili vizitas dum la kaptado la Ŝetlandajn kaj Orkneajn insulojn, eĉ Islandon. Foje ili iras ankoraŭ pli longan marvojon.

NORRLAND LA ARBARRIĈA.

Dum miaj vojaĝoj en Lappland mi aparte skribis pri tieaj cirkonstancoj kaj laponoj. Nun somere en la lumo de longaj, helaj noktoj la lando en ĝia varia naturkolora kostumo aspektas ĉarma. En Lappland somere la noktomeza suno estas videbla de la komenco de junio ĝis la komenco de julio. Tiu somerfenomeno de noktomeza sunbrilo estas ja tute nekonata ĉe ni. Same ankaŭ la malluma vintro, kiam la norda lumo aperas ĉe la horizonto de tempo al tempo kaj lumigas la tutan ĉirkaŭaĵon. Trifoje mi vidis la fenomenon, kaj ĉiam regis min kurioza sento, kiun mi ne povas klarigi sur papero.

En la plej norda parto estas grandaj minejoj. Fakte la minaĵo portis al la lando grandan materian prosperon. La feraĵojn el la minejoj de la centra parto la lando plejparte mem konsumas. Sed la feraĵojn el la nordlandaj minejoj oni plejparte eksportas eksterlanden. Kian grandan rolon ludas la fero en la ekonomia vivo de la lando, vi povas kompreni de la malsupraj linioj.

En normala antaŭmilita jaro 1913 oni ĉerpis 4.342.289 tunojn da ferminaĵo nur el la minejoj en la meza Svedlando. En Kiruna kaj Gällivare la mineja industrio tre rapide kreskis. Inter la jaroj 1896 ĝis 1900 ĉiujare oni ĉerpis meznombre 0,8 milionon da tunoj aŭ alivorte 36 % de la tuto en la lando; sed en 1913 oni ĉerpis el tiuj minejoj 4,9 miljonojn da tunoj, do 65 % de la tuto. En 1926 la cifero altiĝis ĝis 7 milionoj, do 73 %. De tiu tempo laŭ la interkonsento inter la ŝtato kaj la granda ferkompanio

Malnova kampara domo.

Grängesberg oni ĉerpas 9 milionojn da tunoj ĉiujare por grandparte eksporti.

Do ne estas mirinde, ke la sveda ŝtalo aperas same ofte en la literaturo kiel en komerca statistiko: ekzemple kiam oni priskribas la brilantan glavon de Gustav Adolf, kiun la italoj pro liaj orkoloraj haroj kaj bluaj okuloj nomis la reĝon de oro, kaj la glavon de la tragedia reĝo Karlo la XII-a. Oni multe laŭdis la svedan ŝtalon kvazaŭ simbolon de kuraĝo kaj forto.

Krom la ferminejaj trezoroj la alia granda faktoro de nacia prospero kuŝas en arbarkulturo kaj industrio. Eble la arbaro estas la plej grava nacia bonenhavo. Imagu, pli ol duono de la tuta areo de la lando konsistas el produk-

tiva arbaro. Dum miaj longaj vojaĝoj tra Norrland mi vizitis preskaŭ ĉiun provincan ĉefurbon kaj krome multajn segejojn kaj paperfabrikojn. Ofte mi pensis tiam, kiel la naturo eĉ en severa klimato faciligas la vivlaboron por la homoj! La arbaro ja kreskas nature, krom tre malgranda parto kulturita en la plej suda regiono. La arbarindustrio fakte ĝuas grandan avantaĝon de la severaj vintroj,

Härnösand, ĉe la elfluo de Ångermanälven.

kiam ĉio glaciiĝas kaj la tero portas blankan kostumon el neĝo.

Nun sekvu min en mia vojaĝo de Lappland suden. Mi haltis en urbo Luleå, kie juna sinjoro Hjort, studento, akceptis min kaj gastigis min en la hejmo de kamarado, ankaŭ studento, kies patro estas arbarestro.

Luleå komence estis nur havenloko en la mezepoko, sed ĝi akiris urban privilegion en la mezo de la 17-a jarcento. Pro malaltiĝo de la maro la urbo translokiĝis kaj en la malnova parto interalie kuŝas interesa preĝejo, kiun mi vizitis. Ĉirkaŭ ĝi staras multaj lignaj dometoj, ankaŭ malnovaj, kie laŭ malnova kutimo dum la preĝejaj festoj la homoj loĝas. La urbo kuŝas ĉe la plej norda bordo de

Botnia Golfo. Oni montris al mi ĝian havenon, kie kuŝis aroj da ŝipoj, kiujn oni ŝarĝis per ferminaĵo el laplandaj minejoj kaj per lignaĵoj por eksporti alilanden. En la urbo kuŝas granda segejo kaj krome kelkaj aliaj fabrikoj. Mi ankaŭ vizitis kelkajn lokojn ĉirkaŭ la urbo.

De Luleå tra la urbo Sollefteå al Härnösand. Kiel ĉef-urbo de la gubernio Västernorrland Härnösand estas in-



La rivero Faxälven ĉe Österåsen.

teresa. La esperantistoj montris al mi la grandajn segejojn. La ligna industrio ludas grandegan rolon en la ekonomia vivo de la urbo. Kun mia konato mi vizitis la tiean liber-aeran muzeon, unikan en la tuta nordo. En ĝi kuŝas mal-novmodaj lignodomoj, lapontendoj kaj muzea domo, kie oni kolektis kutimajn objektojn de la provinco el la ĉiu-taga vivo dum pasinta tempo. La muzeo situas en bela naturo iom ekster la urbo. Survoje al Härnösand mi trans-iris per trajno la ponton en Forsmo super la potenca nord-landa rivero Ångermanälven. La ponto estas unu el la plej grandaj kaj rimarkindaj en tuta Skandinavio. La vidaĵo ambaŭflanke estas grandioza, sed pli grandioza estas la spektaklo de naĝantaj arbotrunkoj tute nekalkuleblaj.

Ĉirkaŭ 17 milionoj da trunkoj ĉiujare naĝas laŭ la fluo de la rivero, kaj oni kolektas ilin ĉe la segejoj. La plej impona vidaĵo estas ĉe la riverfino en la Botnia Golfo, kie oni kolektas ilin por segejoj aŭ por eksporto. En la urbo Härnösand interesa estas la preĝejo kaj krome la hejmo por la invalidoj. Tie oni kuracas la invalidojn kaj instruas al ili diversajn laborojn. Eble interesos vin aŭdi, ke la ĉefaj gazetoj tie ĉiutage presigas esperantan kolonon.

Flosado de arbotrunkoj.

Mia posta ĉefhaltloko estis Sundsvall. Tie mi restis kelkajn tagojn dum ambaŭ vizitoj. Kaj de tie mi faris vizitojn kaj paroladojn en ĉirkaŭaj vilaĝoj. La urbo kuŝas unuflanke ĉe la bordo de Botnia Golfo kaj aliflanke ĉe la alia granda nordlanda rivero Indalsälven, kiu enfluas la golfon. La urbo estas unu el la plej vivoplenaj, kiujn mi vidis en Norrland. Ĝi estas vere impona kun siaj puraj modernaj stratoj kaj belaj konstruaĵoj. Oni diris al mi, ke ĝi estas unu el la ĉefcentroj de la ligna komerco en la tuta mondo. Ĉirkaŭ ĝi kuŝas 50 grandaj segejoj kaj paper-

fabrikoj, kies produktaĵoj enŝipiĝas en la urba haveno por ĉiuj mondpartoj. Ĉi tie la vigleco respeguliĝas eĉ en la esperanta movado. Kiam mi faris prelegon dum mia dua vizito, oni eĉ ne anoncis en la gazetoj, kaj tamen la salono estis plenplena. De mia loĝejo ĉe amiko en supra etaĝo mi vidis tra la fenestro la grandiozan vidaĵon super la rivero;



Granda papermaŝino de sveda konstruo.

la riverbordoj estas montecaj kaj la riverfluujo estas profunda kaj en ĝi trunkamasoj naĝas en la mezo malsupren laŭ la fluo. Sude de la urbo mi transiris landparton, mirinde belan pejzaĝon, kaj mi vizitis interesan sed nun formortintan akvofalon, kiun lasis la rivero Indalsälven antaŭ unu kaj duona jarcento dum furioza printempa inundo. La akvofalo nomiĝas »mortinta falo» nun tute seka kaj de malsupre aspektas kiel giganta kaldrono.

La urbo Sundsvall komence estis fondita por la metalmetiistoj, speciale por fari pafilojn, kaj ĝi travivis kiel aliaj urboj multajn brulojn — la plej lasta en 1888.

Poste mi vizitis la urbon Söderhamn. Ĝi ne estas tiom impona kiel Sundsvall, sed tamen ludas gravan rolon en la ligna industrio. Ĝia prospero nuntempa dependas de la grandaj segejoj. Historie ĝia sorto kaj evoluo similas al tiu de Sundsvall. En Söderhamn mi estis gasto en la hejmo de konato, sinjoro Fernqvist. Survoje de Söderhamn mi vizitis multajn aliajn lokojn kaj finis la unuan nord-



Iggesund — granda celulozo-fabriko.

landan vojaĝon en ĝia plej suda urbo Gävle. La urbo estas sufiĉe granda kaj entenas ĉirkaŭ 39.000 loĝantojn. Ĉiam mi memoros pri tiu urbo, ĉar fakte tie mi komencis jam en 1929 mian veran studvojaĝon kaj konatiĝis kun multaj esperantistoj. La urbo Gävle estas moderna, kaj ĉirkaŭ ĝi kuŝas multaj interesaj lokoj kaj grandaj fabrikoj. Ne malproksime de la urbo kuŝas en loko Skutskär, ĉe la rivero Dalälven, granda segejo. Ĉiujare enŝipiĝas lignaĵoj el la fabriko en granda amaso. En 1933 la cifero altiĝis al 109.300 kubikmetroj kaj krome el tieaj paperfabrikoj ĉirkaŭ 48.000 tunoj da papero. Apud tiu loko loĝas mia amiko s-ro Ahlstrand, kaj tie mi vizitis la grandan akvofalon, altan je 18 metroj, nomitan Älv-

karlebyfallen. Oni konstruis tie grandan elektran stacion, kiu estas unu el la plej grandaj en la tuta lando kaj i. a. donas elektran forton ankaŭ al la ĉefurbo Stockholm.

Dum la nordlanda vojaĝo parte per trajno, parte per aŭtobuso, parte per aŭtomobilo, ofte aperis antaŭ miaj okuloj la artefaritaj akvokanaloj el ligno por facile transporti la arbotrunkojn el la arbaroj. Entute la funkcio de

Ŝtala lameno, dika 0,9 mm., longa 80 m., fabrikita en Sandviken.

la trunkotransporto el la arbaroj estas ege interesa kaj tamen simpla kaj tre malmultekosta — grava faktoro en la arbara industrio.

La riveroj kaj la akvofluoj portas la trunkojn en amaso al la bordo de Botnia Golfo. La longa akvobordo faciligas la eksporton alilanden.

Dumvintre, kiam lagoj, lagetoj kaj surteraj akvoj glaciiĝas kaj neĝo kovras ĉion kaj faras la tersurfacon ebena, tiam fakte ĉie en la arbaro estas ebleco konstrui vojon por tre malkare transporti la trunkojn per ĉevalsledo al la akvokanaloj aŭ al lokoj por forvendi. Granda reto de

riveroj kaj speciale aranĝitaj akvovojoj tie kaj tie kruciĝas en la vasta arbarlando de Norrland. La riverdirektoj plejparte estas de nordokcidento al sudoriento. Printempe unue la riverglacioj rompiĝas en la malsupro, kaj tial la moviĝantaj glacioj ne faras domaĝon al la akvovojoj. Sufiĉe rapide, tamen plej malkare, oni tiamaniere transportas la trunkojn al la celo. La kuna longeco de

Paŝtejo en la arbaro. (Färila, Hälsingland.)

ĉiu akvovojo uzata kaj reguligita estas ĉirkaŭ 32.000 kilometroj, pli ol duoble pli longa ol la suma longeco de ĉiuj fervojlinioj en la tuta lando. Se oni devus transporti trunkojn per fervojo, tiam tio kostus 30-oble pli multe ol nun. Laŭ la kalkulo pri elhakado de arboj montriĝas, ke ĉiujare oni uzas ĉirkaŭ 1.589 milionojn da kubikfutoj meznombre. El tiu granda kvanto 530 milionoj da kubikfutoj estas uzataj por hejmaj kaj domkonstruaj celoj; ne malpli ol 420 milionoj estas uzataj kiel hejtaĵo. La segejoj absorbas ĉirkaŭ 500 milionojn kaj la paperindustrio postulas ĉirkaŭ 250 milionojn; krome la ferindustrio por fari lignokarbon uzas 177 milionojn da kubikfutoj. La fervoj-

linioj kaj la fostoj de elektraj linioj kune konsumas 14 milionojn. La fervojkompanioj uzas 17,5 milionojn kiel hejtaĵon, la aliaj industrioj krom la segeja 35 milionojn, kaj cetere ĉiujare oni eksportas 25 milionojn da kubikfutoj (laŭ statistiko de 1927).

Oni ja povas pensi, ke se ĉiujare oni dishakas la arbarojn en tiom granda skalo, eble iam la arbaroj ruiniĝos, sed pri tio la ŝtato kaj la popolo estas singardaj, kaj per specialaj leĝoj kaj sciencaj traktadoj oni konstante penas eĉ plibonigi la arbaron.

La arbara industrio ekkreskis antaŭ relative nelonga tempo. Estas ja vero, ke la homoj en la antikva tempo uzis arbojn kaj lignojn kiel domkonstruan materialon kaj hejtaĵon. El ligno oni konstruis akvoveturilojn kaj aliajn necesajn objektojn por la hejma uzado, sed tamen en la pagana tempo oni ne multe kalkulis la valoron de arbaro kiel nun: tute male, oni rigardis la arbarojn kiel loĝejon de malbonaj spiritoj — entute kiel malamikojn, kaj tial oni ofte bruligis kaj dishakis arbaron por terkultura celo.

En la mezepoko oni komencis ekspluati la arbarojn por komerca celo do por eksporto — komence nur en la distriktoj ĉe la marbordaj regionoj. Tiu industrio de tiu tempo kreskis daŭre kaj ekpenetris de sudo al nordo internen. Fakte la arbarindustrio materie plifortigis la homan kulturon en la norda regiono.

En la 19-a jarcento post la eltrovo de maŝinsegilo la industrio komencis ekflori, kaj per tio la valoro de la arbaroj kreskis. Post la unua duono de la 19-a jarcento estiĝis en la lando la paperindustrio, kaj de la komenco de la nuna jarcento la industrio rapidege prosperas. Nun la paperindustrio estas preskaŭ same valora kiel la segeja. La rezulto de tio estas, ke la postulo de trunkoj el arbaro fariĝis multoble pli granda ol iam antaŭe. En la paperfabrikoj oni kutime uzas nur tiajn trunkojn de arboj, kiajn antaŭe oni neniam dishakis pro malbonkvalito

kaj kiuj do estis konsideratajn kiel nevalorajo. Tial la granda postulo de la paperindustrio fakte ne tuŝas la arbarojn por aliaj industriaj celoj. Male, la dishakado de neutilaj arbaroj malfermis novan eblecon por pli racia arbarkulturo en granda parto de la lando, kie tiuj favoraj cirkonstancoj antaŭe mankis.

Do vi povas facile kompreni, ke la arbarkulturo kaj industrio fariĝis tre grava en la ekonomia vivo de la lando. Tiu kulturo postulas lertajn arbaristojn, kaj tial fondiĝis la eksperimenta instituto de arbarkulturo kaj ankaŭ altlernejo. En la unua sciencistoj prilaboras kaj pritraktas ĉiun demandon rilate al kulturo kaj zorgado de la arbaroj, kaj en la lasta oni instruas studantojn, kiuj poste fariĝos arbaristoj. Ĉiujare post kvarjara kurso ĉirkaŭ 25 ŝtataj arbaristoj eliras el la altlernejo, kaj krome 12 lernantoj eliras el la lernejo post dujara studado sen antaŭvido de ŝtata okupo, do kiel privatuloj.

Krom la supre menciitaj institutoj ekzistas ankoraŭ 8 arbarkulturaj lernejoj, kie la lernantoj akiras elementan konon pri tiu scienco, kaj krome unu daŭriga lernejo en loko Kloten, kie oni akceptas ĉirkaŭ 25 lernantojn el la plej bonaj de la elementa lernejo. Por eniri en tiun lernejon oni devas havi ankaŭ unujaran praktikan sperton pri arbarlaboro. En multaj terkulturaj lernejoj oni ankaŭ instruas la temon pri arbarkultura ekonomio.

La ŝtato mem posedas 15,8 % de la tuta arbarlando, kaj ĝi situas plejparte en la ekstremaj nordaj provincoj. La ŝtato ankaŭ havas parte kontrolon, parte respondecon pri la kulturado de multaj komunumaj arbaroj de diversaj distriktoj kaj urboj, kaj ili kune formas 5,8 % de la tuto. 28,1 % de la arbarlando posedas privataj kompanioj, sed la plej grandan parton, nome 45,2 %, posedas la malgrandbienuloj, kaj nur eta parto, 5,1 % de la tuta arbarlando, estas posedajo de grandbienuloj.

Por ke la arbaroj de privatposedantoj ne detruiĝu pro

malbontraktado, la ŝtato per speciala arbarleĝo havas la rajton pri disponado, tiel ke elhakado ne endanĝerigu la rekreskon de la arbaroj.

Estas ja klare, ke kelkcent miloj da laboristoj vivtenas sin pure de la arbarkulturo kaj de arbarkoncernaj industrioj. Cetere la tuta terkultura popolo pro severa klimato kaj nefavora tero en la norda kaj meza Svedlando parte devas vivteni sin per arbarlaboro. La terkultura popolo nur en regionoj en la suda parto povas sendepende de arbarlaboro vivteni sin kun profito. Alie la kunligo de arbarlaboro kun terkulturo ankaŭ donis specialan avantaĝon — nome oni faras arbarlaboron en sezono, kiam alie oni ne povas okupi sin pri terkultura laboro.

Krom la konsumo de la arbarproduktoj en la lando, nome por konstruaĵoj, mebloj, aliaj hejmaj objektoj, brulaĵoj, fervojoj, fostoj por telefonlinioj, paperoj, libroj, la aliaj arbaraj produktaĵoj formas duonon aŭ pli precize 49 % de la tuta nacia enspezo el eksportado. (Laŭ statistiko 1923—27). Ĉiujare la eksportvaloro de arbarproduktaĵo sumas je 667 milionoj da svedaj kronoj. Miaj vizitoj en arbarlando kaj en diversaj fabrikoj konvinkis min, ke la ĉiam kreskanta prospero de la popolo kaj la nuna alta vivnivelo grandparte dependas de la landa arbarindustrio, kaj la popolo ĉiam povas kalkuli sian estontan bonstaton en la trezoro de arbaroj.

JÄMTLAND KAJ ĜIAJ NEĜOKOVRITAJ MONTEGOJ.

Antaŭ nelonga tempo mi vizitis la konatan lokon Åre en la provinco Jämtland, la suda kaj interna parto de Norrland. Interesajn spertojn mi havis dum mia unua vojaĝo. Jam en la fino de 1928 mi faris la unuan vojaĝon al la nordlanda urbo Söderhamn. Neĝon mi antaŭe neniam estis vidinta, nek glaciiĝon de lagoj kaj akvofluoj. Sovaĝe mi ludis kun neĝo sur granda lago. En Söderhamn mi estis gasto en hejmo de s-ro Fernqvist, granda idealisto kaj gvidanto de paca movado. Oni konsilis al mi, ke mi nepre vizitu Åre en Jämtland, ĉar alie estus domaĝe kaj nekomplete viziti Norrland. Du tagojn antaŭ la jarfino mi kune kun stokholma konato, kamarado en Nääs, s-ro Thunqvist, forlasis Söderhamn. Survoje ni devis halti en la urbo Östersund. Bela ĝi estas, kuŝanta ĉe la granda lago Storsjön. Pasinttempe oni tute erare havis la opinion ke ĝi kuŝas precize en la meza punkto de la lando. Oni eĉ montris al mi arbon sur insuleto en la lago, kiu precize indikus la mezan punkton de la longa lando. La postan tagon frumatene ni vojaĝis per trajno al Åre. La suno brilis dum unu horo, kaj la montara naturo en neĝo rebrilis en la sunradioj. Tio estis al mi tute nova sperto, sed pli nova estis, kiam en unu stacio oni turnis mian atenton al kolektiĝintaj laponoj. La unuan fojon mi vidis laponojn tie. La trajno haltis, kaj ni eksciis, ke dum 12 minutoj ĝi staros. Do mi forlasis la trajnon kaj scivoleme proksimiĝis al la laponoj, kiuj portis siajn proprajn naciajn kos-

tumojn kaj parolis kuriozan lingvon. Ŝajne mi estis tute kaptita de la intereso, kaj dum mi observis ilin, la trajno ekmoviĝis! Rapide mi turnis min al la trajno, sed vane! Mi kriis la nomon de mia kunvojaĝanto. La konduktoro en la lasta vagono vidis min kun strecĉitaj brakoj en la aero, kaj tuj montris la flagon kaj fajfis. La trajno devis rehalti, kaj la konduktoro saltis el la vagono kaj kuris al

Vidaĵo de la fama turista loko Åre.

mi, levis min en la aero kaj poste metis min en la lastan vagonon. En la stacio estis tumulto pro intereso, kaj neniam mi forgesos tiun ekkazintaĵon. La konduktoro estis dirinta al mi ion, kies senco laŭ interpreto de mia amiko estas tiel: »Kiu estas tiu patrino, kiu kuraĝas sendi la bubeton sola en malproksiman landon?» Vi povas imagi mian embarason, sed mia interno tutkore dankis lin, kaj mia nura bedaŭro estas eĉ hodiaŭ, ke mi ne povis esprimi mian dankon kaŭze de lingva baro.

Ĉirkaŭ la 12-a antaŭtagmeze ni atingis Åre. La unuan fojon en mia vivo mi spertis 16-gradan malvarmon, kaj

mi sentis tion speciale en la vangoj, en la oreloj kaj en la piedfingroj. Kvar tagojn mi restis en Åre kaj pasigis la tutan tempon ĝis malfrua nokto ekstere. Mi penis skikuri, sed ne kun granda sukceso. Malvarmaj estis la tagoj, sed mirinde estis, ke mi tamen ne sentis la malvarmon dum la ludado ekstere pro la seka kaj malpeza montaero — la ĉarmo de la loko, kiu ĉiam altiras multnombrajn turistojn eĉ el malproksimaj landoj.

Multaj hoteloj kaj pensionoj por la turistoj kuŝas ĉe la piedo de la granda monto Åreskutan, 1.472 metrojn alta super la marnivelo. Antaŭ la vilaĝeto kuŝas la longa Årelago kaj aliflanke de ĝi staras montaro, kies nudaj, senkreskaj altaj partoj ĉiam restas sub neĝo.

Iun tagon ni suprengrimpis Åreskutan. Ni kunportis kafon kaj buterpanojn en sako sur la dorso. Tri horojn supren ni piediris, sed kiam ni atingis la limon de la arbarkresko ni devis tute forlasi la intencon daŭrigi ĝis la pinto, ĉar la dikeco de la neĝamaso estis tro granda, kaj ni ne povis piediri en la mola neĝo. Tie ni trovis du stokholmaninojn tute elĉerpitajn pro longa ekskurso. Mi tuj invitis ilin al kafo, sed mi ja havis nur unu tason! Dum mi cerbumis, unu el la knabinoj prenis la tason kaj mem trinkis kaj poste purigis ĝin per neĝo kaj regalis unu post la alia.

Miaj gemastroj ĉiam avertis min, ke neniam ni ekskursu sen gvidanto malproksimen en la montaro, ĉar ĉiujare unu aŭ du tro memfidaj junuloj perdas la vivon en la montaro en neĝamasoj kaj speciale okaze de terura neĝoventego.

Alian tagon per ĉevalsledo mi kaj mia amiko faris 32-kilometran ekskurson al konata akvofalo Tännforsen. La unuan fojon tiam mi spertis grandan mizeron pro frosto. Antaŭ la forveturo miaj gemastroj vestis min per dikegaj peltoj, sed post unuhora veturo mi ne plu povis paroli, la manoj sensentiĝis, la vangoj tute frostis! Kiam mia amiko komprenis mian mizeron, li tuj haltigis la sledon kaj el-

tiris min en la neĝon, forprenis miajn gantojn kaj frotis min per neĝo! Mi ne povas priskribi, kian doloron mi sentis, sed dum mia krio la amiko montris sovaĝan ĝojon kaj diris: »Nu, ĉio ja estas bona nun, la sango ja revenas.»

Post du kaj duona horoj mi estis tute forgesinta mian doloron, kiam ni atingis la akvofalon Tännforsen. Kia bela vidaĵo! La falo estas 24 metrojn alta kaj ĉirkaŭ 70 metrojn larĝa. La akvo grandparte glaciiĝis en diversaj formoj kaj la glacipecoj tie kaj tie akiris bluan kaj bluverdan koloron pro la trafluanta akvo. Unue ni vidis ĝin de malsupre kaj poste de supre. Ĝi estas unu el la plej belaj akvofaloj laŭdire en la tuta Eŭropo, kaj tion mi emas kredi. Pli grandiozan sovaĝan akvofalon, nome Stora Sjöfallet en Lappland, mi ankaŭ vidis, sed la beleco de Tännforsen pro ĝia formo kaj situo en la sino de rave bela montarbaro posedas propran ĉarmon.

Proksime al la falo la sveda turistasocio konstruis domon, kaj tien ni eniris kaj faris fajron kaj dum longa tempo sidis ĉe ĝi kaj varmigis nin kaj manĝis nian kunportitan buterpanaron kaj trinkis kafon. Kiel bongustis la manĝo post la malvarmumo!

Post la unua vizito en Åre mi ĉiam sopiris revidi ĝin. Tial mi faris mian duan viziton, ĉi-foje rekte de Stockholm per trajno. La vojaĝo postulas 14 horojn. Dum la dua vizito mi flugis per aeroplano super la neĝoplena montaro. La suno brilis, kaj de supre ni vidis la montopintojn kaj lagojn. Estis vere granda festo por la okuloj vidi, kiel la montoj ŝanĝas siajn kolorojn en ĉiu momento! La frenezaj sportamantoj skias ĝis noktmezo. Eĉ dumvintre la regiono estas sufiĉe luma en la nokto kaŭze de la neĝo.

Mi plejparte amuzis min tie per la sportsledkurado, nome oni supreniras per monta trajneto kaj de la supro per sportsledo rapidege veturas malsupren, ĝi rapide varmigas kaj poste oni venas hejmen kaj miras pro granda apetito.

Inter la vidindaĵoj en Åre unu estas la malnova mezepoka ŝtonpreĝejeto. Mi partoprenis la diservon ĉe la jarfino tie, kaj krome ne malproksime de la preĝejo staras malnova trunkodometo. Tie mi trinkis kafon. Interesa estas ĝia interno! La domposedanto estas invalido, sed aŭdante mian intereson pri popolmuziko, li regalis min per violona muziko. La melodioj ankoraŭ vibras en miaj oreloj.

Dum la dua vizito en Åre mi ankaŭ faris ekskurson, sed ĉifoje per aŭtomobilo, al Tännforsen. Bonŝance ke la suno brilis dum tiu tago, kaj de diversaj direktoj ni rigardis la akvofalon. Novaĵo estas, ke en unu flanko de la akvofalo sur monto oni konstruis malgrandan somerkafejon.

Vi povas kompreni, kiel rava estas Jämtland, pro tiu fakto, ke mi malgraŭ du vizitoj faritaj ankoraŭ sopiras al Åre! Se iam oni spertis la sekan, freŝan montan aeron kaj la magian atmosferon de la montaro en ĉiam ŝanĝiĝantaj kolornuancoj, oni ne povas ne sopiri al ĝi.

VOJAĜO AL LAPPLAND.

Jam pasis du jaroj en Svedlando post mia dua alveno. Plejparte mi restis en la ĉefurbo. Tial malgraŭ la griza aŭtuno kaj malrekomendo de amikoj mi faris la longan vojaĝon tien ĉi al Lappland. Post dudekkvar-hora vojaĝo per komforta trajno de Stockholm mi atingis Boden. Survoje multon mi ne povis vidi el la trajno pro mallumo kaj pluvo, kaj cetere nun ja malofte la suno aperas.

Boden estas urbo proksime al la norda bordo de la Botnia Golfo, kaj ĝi estas konata pro la granda fortikaĵo en la montetoj, cetere ĝi situas sur bordebenaĵo.

Dum la lastaj tagoj terure pluvis kaj okazis furioza ventego, tiel ke la telegrafaj linioj en ĉi tiu regiono estis detruitaj. Mi iom timis, ke eble mia intencita vojaĝo tien ĉi ne estus efektivigebla. En Boden mi estis gasto en hejmo de esperantisto, sinjoro Pettersson, kaj laŭ lia aranĝo mi faris kelkajn prelegojn en la urbo kaj en ĉirkaŭaj vilaĝoj. La lasta parolado okazis en la popola altlernejo de Sunderbyn, kie mi tranoktis antaŭ mia alveturo tien ĉi. Tiu lernejo estas la sola de sia tipo en la vasta regiono de Norrbotten. Tre agrablan tempon mi pasigis tie antaŭ kvin jaroj kaj tre ĝojis pro la nuna renkontiĝo kun la tieaj konatoj. La rektoro de la lernejo estis ege afabla, kaj eksciante mian intencon viziti Lappland, li tuj telefone parolis kun konatoj en Kiruna por informiĝi pri la cirkonstancoj.

Dum la vojaĝo de Sunderbyn al Kiruna mi estis ege bonŝanca. Ĉirkaŭ la naŭa matene mi ekveturis, kaj dum la

longa vojaĝo mi spertis kaj ĝuis la grandan silenton de la solena naturo. Ĝi efektive faras homojn meditemaj. La unua stacio, kie la kunvojaĝantoj montris movon, estis tiu de »Polusa cirklo». Stranga sento kaptis min, ĉar la trajno ja portis min norden de la Polusa cirklo! Kelkaj kunvojaĝantoj rapidis poŝti leterojn en la stacia poŝtejo, ŝajne por ekhavi la stampon de »polusa cirklo».



Noktomeza suno, fotografita je intervaloj de 20 minutoj.

Glora estis la tago! Ĉar la neofta, aŭtuna suno forte brilis dum la tuta vojaĝo, kaj la montaro, la arbaro, la marĉo-kampo — entute la tuta naturo sin banis en la sunradioj kaj aspektis solene gaja! Mi dezirus esti poeto por priskribi al vi, kiel aspektas la naturo de la vasta, norda tereno de Lappland. Sed tio ne estas ebla, kaj tial vi devas esti kontenta kun mia proza priskribo.

En la trajno jam de Boden mi ekhavis bonan akompananton, kaj tiu estis la knabo, kiu vendas gazetojn al la vo-



Karto de Lappland.

1. Altmontaro. 2. Eternglacia regiono. 3. Limo de nacia parko. 4. Rifuĝkabanoj por turistoj. 5. Ĉefaj turistvojoj. 6. Vapor- aŭ motorŝipaj linioj.

jaĝantoj. Li parolis esperante kaj ŝajne estis ĝoja renkonti eksterlandan esperantiston. La trajno rapide moviĝis norden kaj iom post iom pli alten. Survoje ĝi restis pli ol duonan horon en Gällivare — unu el la plej malnovaj kaj gravaj nordlaplandaj komunumoj. Tie kaj en apuda urbo Malmberget estas grandaj ferminejoj. Antaŭ kvin jaroj mi vizitis ambaŭ lokojn kaj havis eblecon rigardi la laborteknikon en la subtera regiono de la minejo en Malmberget. Per la plej modernaj teknikaĵoj oni laboras tie, kaj ŝarĝvagonaroj portas la minaĵon al la havenurbo Luleå ĉe la Botnia Golfo. Estas ja la abunda fermineja trezoro, kiu igis la svedan ŝtaton konstrui fervojon al tiu ĉi alie senhoma regiono.

En Gällivare kuŝis abunda neĝo. Fakte la vintro jam komenciĝis tie ĉi. En Stockholm la neĝo ekfalos aŭ kutime ekfalas nur ĉirkaŭ la kristnaska tempo. Dume la trajno haltis. Mi trankvile lunĉis en la stacia restoracio.

Denove la rapidega trajno ekmoviĝis norden. Kutime neniu parolas en sveda trajno, sed foje regis iom da ekscito inter la kunvojaĝantoj pro la videblaj vagantaj boacoj! Dufoje la trajno haltis, ĉar la timemaj boacoj transkuris la fervojlinion antaŭ la lokomotivo. Du boacoj tiamaniere oferis siajn vivojn kaj kuŝis apud la linio.

La gazetvendisto klarigis, ke tiel malsaĝaj estas la bestoj, ke ili kuras antaŭ la lokomotivo, kaj la fervojkompanio devas pagi bonan sumon al la posedantoj de mortigitaj boacoj. Sed oni preferas pagi la mortigitajn bestojn anstataŭ konstrui barilojn.

Ĉirkaŭ la kvina posttagmeze ni atingis Kiruna. Ho, kiom abunda neĝo! Ĉio estas en neĝokostumo. En la stacidomo atendis sinjoro Bengtsson, malnova konato, kiu, post bonvenigo, invitis min esti gasto en lia hejmo. Ho, treege malvarme! Dekdu gradoj sub nulo! La unuan fojon mi spertas tiom da malvarmo en tiu ĉi jaro. Sed antaŭ ol ni ekmovis nin, mi tuj klarigis al li pri mia intenco viziti laponan vilaĝon. Do ni unue iris al aliaj personoj por akiri informojn.

La suno brilis ankoraŭ, kaj la montoj kaj valoj en neĝo rebrilis! Tiom bela povas esti iam la tagoj en aŭtuno! En la hejmo de sinjoro Bengtsson mi estis gasto antaŭ kvin jaroj. Tiam la familio konsistis el nur du personoj, nome li kaj la edzino, sed aperis en la hejmo nova hometo, nun trijara knabo, kaj la hejmo estis multe pli luma kaj viva ol antaŭe.

Antaŭ kvin jaroj, kiam mi vizitis la urbon, ekzistis nur unu esperantisto, instruisto, s-ro Otterfors, sed dume la nombro kreskis ĝis pli ol ducent. Sinjoro Bengtsson rapide informis la esperantistojn, kaj vespere kvindeko kolekt-

iĝis en kafejo. Estis kortuŝe aŭdi tiom da homoj paroli tiel bele kaj varme saman lingvon en tiu ĉi norda parto de la mondo. Kaftrinkado komenciĝis kun bonveniga parolado. Mi sentis ĝojon pro tio, ke ili ankoraŭ tenas en sia memoro mian antaŭan viziton. Eble vi miros, sed vere ŝajnis al mi, ke la homoj en tiu ĉi malvarma regiono havas pli varman temperamenton ol kion mi supozis antaŭe.



La fermonto ĉe Kiruna.

Inter la ĉeestantoj estis fraŭlino, kiun s-ro Bengtsson prezentis kiel spertulon pri laponoj, kaj li sidigis ŝin apud mi. Jes, ŝi laboris dum jaroj pri kolektado de laponaj kutimoj kaj moroj por la »Landsmål»-arkivo (arkivo por svedaj dialektoj) en Uppsala. Ĉu vi povas imagi, kia ĝojo regis min; se vi kredus je providenco, mi dirus, ke ĉio estis antaŭaranĝita. Longe, ĝis malfrua nokto, ni interparolis pri laponoj, laponaj kutimoj kaj moroj, kaj poste interkonsentis kune fari ekskurson al lapona vilaĝo en la proksima mateno.

Je la naŭa kaj duono matene fraŭlino Odstedt, alia esperantisto kaj mi renkontiĝis ĉe la aŭtobusa stacio por

fari viziton al Jukkasjärvi. La suno ne brilis, sed neĝo falis, kiam ni ekveturis. Post tri kvaronhoroj ni devis transiri per prameto riveron fluantan el la lago Torneträsk. Ĉirkaŭ la deka kaj duono ni atingis Jukkasjärvi. Ege malvarma tago, sed la aero estas freŝa. La vilaĝo kuŝas ĉe rivervalo sufiĉe vasta. Sur la alia flanko de la rivero staras arbaraj montoj kun neĝokostumo. En la

La akvofalo Stora Sjöfallet.

vasta vilaĝo domoj kuŝas tie kaj tie tute aparte. Unue ni promenis de la aŭtobuso al hejmo, kie maljuna sinjorino malfermis la pordon. F-ino Odstedt bone konis la loĝantaron, kaj ŝi pruntis de la maljuna sinjorino ŝlosilon de la preĝejo, kaj ni daŭrigis nian promenon al la preĝejo, kiu kuŝis iom flanke de la vilaĝo. La preĝejo posedas ĉirkaŭbaritan korton kun enireja pordego kun alta turo. Oni unue konstruis preĝejon en la sama loko 1607, kiam kristanismo estis propagandata inter laponoj. Sed okdek jarojn antaŭ tiu tempo la loko estis konsiderata

kiel sanktejo por la laponoj. La nuna preĝejo estis konstruata en 1780.

Post la eniro ni vidis nur tombojn en la korto. F-ino Odstedt turnis mian atenton al sole staranta pinarbo apud tombo. Oni nomas la arbon »Kova» — finna vorto signifanta »malmola». Kial oni nomas ĝin Kova? Jes, la historio estas jena: Antaŭ jaroj lapono kun nomo Kova mort-

Stora Sjöfallet, 670 m. larĝa, 40 m. alta, vidata el distanco de 6 km.

igis sin pendigante sin je branĉo de pinarbo sur monto. Poste oni entombigis lian kadavron en tiu ĉi korto, kaj sur lia tombo kreskis la arbo, kaj oni certigis al mi, ke la arbo havas precize la saman formon kiel tiu sur la monto, kaj tial la arbo portas la nomon Kova.

La preĝejo, el ligno, ne estas granda, sed en ĝi estas interesa kolekto de malnovaj lokaj objektoj, kaj inter ili interesa estas ligna tabulo, sur kiu staras frazo signifanta, ke en la jaro 1681 tri francoj, mondvojaĝantoj, kiuj i. a. estis vizitintaj Afrikon, Valon de Gango kaj landojn de

la eŭropa kontinento, ankaŭ vizitis tie ĉi la finon de la mondo. Interesa legaĵo! Oni povas kompreni, kiel izolita estis tiu ĉi regiono en tiu tempo.

Poste ni vizitis la laponlernejon. Unuvice staras tri lignaj konstruaĵoj laŭ la stilo de laponaj tendoj kaj en ambaŭ flankoj du ordinaraj domoj, kie la instruisto loĝas

La montegara ĉeno de Kaskassatjåkko.

dum la tempo, kiam la laponoj alvenas de la altmontaro en aŭtuno kaj lasas siajn infanojn en la lernejo. Dum mia vizito ili ankoraŭ ne estis venintaj, sed ĉiutage oni atendis ilin. En la tendosimilaj dometoj loĝas la laponinfanoj dum la lernado. Poste ni vizitis laponhejmon por gemaljunuloj. La hejmo estas konstruita en 1932. Belega domo, en kiu estas dek sep dormĉambroj apartaj kaj meze vasta halo. La afabla estrino permesis al ni rigardi la internon kaj gvidis nin tra la meza koridoro al la halo, kie sidis en

komfortaj seĝoj naŭ laponaj gemaljunuloj. Kelkaj el ili aspektis pli maljunaj, ol ili estis. La laponoj post certa aĝo rapide maljuniĝas. Mi laŭvice premis al ili la manojn. Tri el ili havis respektive naŭdek ok, okdek kaj sepdek kvin jarojn. La mastrino montris la dormoĉambrojn. Ili estas belaj kaj tre puraj. Poste ŝi gvidis nin al la kuir-

La Latjo-valo ĉe Kebnekaise.

ejo, kie ŝi estis preparinta fiŝon, manĝaĵon por la maljunuloj.

Krom la ĉefkonstruaĵo kuŝas, ambaŭflanke de ĝi, malgrandaj dometoj, kie loĝas du maljunulinoj ankoraŭ povantaj sin movi ekstere. Unu el ili venis al mi kaj montris siajn manfaritajn laboraĵojn — saketojn el boaca felo, kiujn la laponoj uzas kiel tabakujojn. Mi aĉetis du saketojn de ŝi por tri kronoj, kaj poste mi kun mia akompananto eksidis ĉe la tablo en la bela, vastspaca halo. F-ino Odstedt daŭrigis la rakontadon pri la laponaj kredoj je gigantoj k.t.p., kaj mi surpaperigis ilin.

Dume la maljunulino revenis al ni kaj sidis apud mi. Ŝi demandis, de kie mi venas kaj kio estas mia nomo. F-ino Odstedt klarigis, sed tre verŝajne ŝi ne klare perceptis, ke mi estas hindo. Iom naive natura kaj simpatia estis ŝia konduto. Post ioma babilado ŝi forlasis nin kaj iris eksteren. Miaj okuloj sekvis ŝin. Ŝi iris al la lignejo kaj mem dispecigis brullignon kaj portis al sia loĝejo.

La turista hotelo de Abisko.

Post horo ni lasis la domon kaj vizitis la maljunulinon en ŝia loĝejo en unu el tiuj du malgrandaj domoj. Ŝi faris fajron en la forno, kaj en sia buŝo ŝi tenis pipon. Mi proponis iom da tabako el mia sako kaj ŝi tion akceptis kun ĝoja mieno. Mi demandis, kiel ŝi fartas ĉi tie. La respondo estis mallonga sed pozitiva: »Bone!»

Post nia vizito en la maljunulhejmo mia respekto al la popolo sveda pligrandiĝis. Admirinda estas la homama faro de la svedoj pri la sistema zorgo kaj eduko pri laponoj.

komfortaj seĝoj naŭ laponaj gemaljunuloj. Kelkaj el ili aspektis pli maljunaj, ol ili estis. La laponoj post certa aĝo rapide maljuniĝas. Mi laŭvice premis al ili la manojn. Tri el ili havis respektive naŭdek ok, okdek kaj sepdek kvin jarojn. La mastrino montris la dormoĉambrojn. Ili estas belaj kaj tre puraj. Poste ŝi gvidis nin al la kuir-

La Latjo-valo ĉe Kebnekaise.

ejo, kie ŝi estis preparinta fiŝon, manĝaĵon por la maljunuloj.

Krom la ĉefkonstruaĵo kuŝas, ambaŭflanke de ĝi, malgrandaj dometoj, kie loĝas du maljunulinoj ankoraŭ povantaj sin movi ekstere. Unu el ili venis al mi kaj montris siajn manfaritajn laboraĵojn — saketojn el boaca felo, kiujn la laponoj uzas kiel tabakujojn. Mi aĉetis du saketojn de ŝi por tri kronoj, kaj poste mi kun mia akompananto eksidis ĉe la tablo en la bela, vastspaca halo. F-ino Odstedt daŭrigis la rakontadon pri la laponaj kredoj je gigantoj k.t.p., kaj mi surpaperigis ilin.

Dume la maljunulino revenis al ni kaj sidis apud mi. Ŝi demandis, de kie mi venas kaj kio estas mia nomo. F-ino Odstedt klarigis, sed tre verŝajne ŝi ne klare perceptis, ke mi estas hindo. Iom naive natura kaj simpatia estis ŝia konduto. Post ioma babilado ŝi forlasis nin kaj iris eksteren. Miaj okuloj sekvis ŝin. Ŝi iris al la lignejo kaj mem dispecigis brullignon kaj portis al sia loĝejo.

La turista hotelo de Abisko.

Post horo ni lasis la domon kaj vizitis la maljunulinon en ŝia loĝejo en unu el tiuj du malgrandaj domoj. Ŝi faris fajron en la forno, kaj en sia buŝo ŝi tenis pipon. Mi proponis iom da tabako el mia sako kaj ŝi tion akceptis kun ĝoja mieno. Mi demandis, kiel ŝi fartas ĉi tie. La respondo estis mallonga sed pozitiva: »Bone!»

Post nia vizito en la maljunulhejmo mia respekto al la popolo sveda pligrandiĝis. Admirinda estas la homama faro de la svedoj pri la sistema zorgo kaj eduko pri laponoj.

De la lapona hejmo ni kune promenis al la unua domo por transdoni la preĝejan ŝlosilon. La sama maljunulino malfermis la pordon kaj petis nin eniri kaj eksidi, kaj tion ni faris. Ŝia aspekto kaŭzis al mi scivolemon pri ŝia deveno, kaj laŭ sciigo ŝi estas miksa tipo, sveda-laponafinna. Ŝiaj okuloj estas eŭropidaj kaj brunaj, sed la ka-



Gelaponoj antaŭ sia tendo.

poformo kiel ĉe la laponoj ronda kun protrudaj vangoj. Ni demandis al ŝi, ĉu kafo estas ie ricevebla kontraŭ pago en tiu ĉi vilaĝo. »Jes», ŝi respondis, »vi povas trinki ĉe mi.» Gaja simpatia sinjorino iom ampleksa preparis por ni kafon kaj scivoleme faris demandon al mi. En ŝia hejmo estas la telefonstacio por la vilaĝo. Do ofte ŝi devis interrompi la interparolon kaj kuri al la aparato. Ŝia hejmo estas bela kun du vastaj ĉambroj krom la kuirejo. Dum

la kaftrinkado mi demandis al ŝi, kiel ŝi fartas en tiu ĉi malvarma regiono — »tre bone». Ŝi neniam estis ekster Lappland sed legas ĉiutagajn ĵurnalojn, kaj laŭ iliaj informoj ŝi aŭdis pri oftaj murdoj kaj malpaco en la ekstera mondo, kaj ŝi pensas, ke la homoj en ŝiaj hejmregionoj estas la plej bonaj kaj honestaj! Mi murmuris al mi mem: Certe tio estas vera. Tre ŝercema virino kun rid-

Laponoj kun boacoj.

antaj okuloj daŭre direktis sin al mi kaj fine demandis: »Ĉu vi estas edzo?» — »Ankoraŭ ne». — »Jes, venu tien ĉi denove, kaj mi elektos por vi ĉarman laponknabinon, jes, vi scias, ili estas tre amindaj.» Kaj mi pensas: La ideo estas ja bona kaj bela, kaj diris al ŝi, ke mi certe iam volus reveni tien ĉi. Do ŝi tuj skribis sian adreson sur papereton kaj transdonis ĝin al mi kun aldono: »Skribu al mi antaŭ ol vi venos.»

Dume la tempo de reveturo alproksimiĝis. Ni pagis por la kafo kaj antaŭ la foriro premis ŝian manon kaj dankis. Poste ni iris rekte al la aŭtobuso, kiu ĉirkaŭ la dua

horo posttagmeze reportis nin al Kiruna. Forlasinte la aŭtobuson, mi vizitis la hejmon de mia malnova konato, s-ro Otterfors, kiu telefone estis invitinta min tagmanĝi ĉe li. Antaŭ kvin jaroj li estis solulo, sed nun li loĝis en propra hejmo kun edzino. Granda estis la ĝojo de rerenkontiĝo, kaj ambaŭ varme akceptis min kaj regalis per bona, solida tagmanĝo, kiun mi manĝis kun granda apetito pro la ekskurso kaj malvarmo.

Je la sesa vespere mi devis fari paroladon antaŭ esperanta publiko en la urba lernejo. Post la parolado je la oka horo laŭ invito de f-ino Odstedt mi sekvis ŝin kun kelkaj aliaj geesperantistoj al ŝia hejmo. Ŝi regalis nin ĉiujn per vespermanĝo kaj montris multe da laponfaritaj objektoj. Ĝis la tria matene ni interparolis, kaj mi kolektis de ŝi multajn informojn kaj rakontojn kaj ilin notis. De ŝia hejmo, en akompano de tri esperantistoj, rekte mi iris al la stacidomo. Unu el la junaj esperantistinoj donacis belan objekton laponan, kaj post kora adiaŭ mi envagoniĝis kaj preskaŭ tuj ekdormis pro la strecoj dum longega tago.

* *
*

Kiruna kuŝas ĉe la piedo de Kirunavaara, la plej granda »fermonto» en la lando kaj eble la plej riĉa en la tuta mondo. La urbo fondiĝis antaŭ nur ĉirkaŭ dudek kvin jaroj, sed rapide ĝi kreskis, kaj nun la loĝantaro nombras dekdu mil. La minejo estas unika, ĉar oni ne laboras en la subtera regiono sed prenas la ferajon de la montosupro, pecon post peco. Laŭ kalkulo, la monto posedas 1000 milionojn da tunoj da ferajo aŭ eble eĉ pli. Bela kaj pura estas Kiruna kiel moderna urbo. La loĝejaj konstruajoj estas plejparte lignaj. Interesa estas ĝia preĝejo en lapona stilo. Simbolaj skulptajoj dekoracias ĝin kaj en ĝi la altaro estas bele pentrita de unu el la plej konataj svedaj artistoj, nome princo Eugen.

Dum la lasta vizito mi faris paroladojn krom en Kiruna ankaŭ en Abisko kaj en la norvega urbo Narvik.

* *
*

Abisko kuŝas ĉe la lago Torneträsk, unu el la plej belaj montolagoj, kiujn mi vidis. Ĝi altiras tiel dumvintre kiel somere multegajn turistojn, kaj monta stacio de la sveda turista klubo kuŝas ĉe la bordo de la bela lago. De tie la turistoj povas fari multajn ekskursojn al la altmontaro kaj la eterna glaciaro. Unu el la plej belaj momentoj de mia vivo mi havis apud Abisko, kiam la suno dum mallonga tempo subite montris sin tra la nubaro kaj brilis super la lago ĉirkaŭita de montaro, kaj mi sentis min kvazaŭ en iu fabela mondo de fantazio.

Inter miaj kunvojaĝantoj en la trajno al Abisko estis kvar laponoj, kiuj sidis apud mi. Ili forlasis la trajnon en la stacio antaŭ Abisko. Dum la vojaĝo mi povis pli proksime vidi ilin en iliaj propraj kostumoj. Al Abisko la laponfamilioj venadas ĉiujare por paŝti siajn boacarojn sur la montaj deklivoj. Sur la montaro kreskas nur malgrandaj, etaj betuloj. La vagantaj laponoj kun siaj boacoj vere tre harmonias al la ĉi tiea naturo.

Feliĉa mi estas, ke mi povis fari dufoje vojaĝon al Lappland, sed malfeliĉa mi ankaŭ estas pro tio, ke la tempo ne permesis al mi viziti pli multajn lokojn en la vasta provinco.*

Se vi iam vizitos Skandinavion, nepre vizitu Lappland, la landon de noktomeza suno, kaj vi povas havi imagon, kiom da varieco kaj beleco posedas nia tero.

---

*) La areo de Lappland estas 118.650 kv.km. kaj nur iom pli ol 113.000 homoj loĝas tie. Se oni dekalkulas la nombron de loĝantaro en urboj, troviĝas sur ĉiu kv.km. nur 0,8 loĝantoj.

LA LAPONOJ — POPOLO, LINGVO, LITERATURO.

Malmulton oni scias, kiamaniere la laponoj alvenis en tiun ĉi nordan regionon de la tero. Ni nur scias laŭ la asertoj de sociologoj, ke la laponoj estas la unuaj loĝantoj de la laplanda teritorio. La laponoj formas branĉon de la mongola raso. Oni supozas, ke komence ili venis de iu parto en meza Azio al tiu ĉi regiono, sed pri tio sciencan konkludon ni ne havas. La laponoj venis en kontakton kun la najbara kulturo antaŭ relative nelonga tempo. En Svedlando politike kaj geografie tio okazis en la jaro 1290 dum la tempo de la sveda reĝo Magnus Ladulås, kiam oni kunligis Lappland kun la cetera sveda regno. Estu menciite ankaŭ tie ĉi ke en la plej ekstremaj regionoj de Norveglando, Finnlando kaj Ruslando ankaŭ loĝas multaj laponoj. Iam la laponoj multe suferis en la manoj de la najbaraj landoj. Tie ĉi mi tamen okupas min nur pri la svedaj laponoj. Ilia nombro estas iom pli ol sep mil, oni dividas ilin en du grupojn. Unu grupo jam fikse loĝas en domoj, precipe ĉe river- aŭ marbordo, kaj vivas per fiŝkaptado kaj terkulturado. Sed la alia, preskaŭ duono de la tuta nombro, laŭ la kutimoj de prapatroj ankoraŭ estas nomadoj. La sveda registaro faris kaj faras multajn laborojn pri la eduko de la laponoj kaj samtempe penadas trovi la plej bonan manieron por ne detrui ilian sendependan nomadvivon.

Neniu scias, kiel la vorto »lap» estiĝis. La laponoj mem konsideras la vorton preskaŭ kiel insulton. Ili sin nomas

Interne de lapontendo.

(Pentraĵo de Höckert en la Nacia Muzeo.)

»Sameh». La svedoj ofte nomas ilin »fjällfolket» — montara popolo.

La laponoj neniel similas al la svedoj. Ili estas malaltaj, sed iam mi vidis ankaŭ altkreskan laponjunulon. En tiuj kazoj oni supozas ilin miksitaj. Kutime la laponstaturo estas tre gracia, harmonia kaj eĉ bela. Pri la lapona rastipo skribas doktoro Nordenstreng: »La raso lapona estas malalta stature, ĉirkaŭ centkvindekdu centimetroj, kaj tre larĝkapa. Tio estas vera ankaŭ pri la samojedoj, sed tiuj havas vizaĝon forte mongoloide stampitan, dum la laponoj proksimiĝas al la tipo vizaĝa eŭropoida, krome per ilia nazo tre malgranda kaj obtuza. La tipo lapona stampita estas brunokula, kun haroj hirtaj, malhele brunaj aŭ preskaŭ nigraj, haŭto pale flava, kelkfoje kun nuanco iomete bruna, barbokresko malforta, pometoj protrudaj, mentono longa, pinta, kaj formo vizaĝa ova, la parto larĝa

supre, la parto pinta malsupre, membroj mallongaj, maldikaj, kaj konstruo osta, malfortika. Malgraŭ tio ĝi estas raso eksterordinare persista kaj harda, kapabla de penado kaj strečado korpa, longtempa kaj fortega, tute ne »degenerinta», kiel kelkaj rasbiologoj senkritike akcep-



Manfaritaj iloj laponaj.

tas. La kapablo pensa de la lapono estas viva kaj rapida, li estas bonnatura kaj gajema, pleje honesta, kvankam iom ruza — ne pli ol ke la komercisto povas lin trompi — kaj forgesema pri aferoj negravaj el lia propra vidpunkto. Lia sento de beleco estas sendisputa, la produkto de lia manlaboro montras guston delikatan, precipe koncepton certan de koloro. Se laponoj ĉesintaj la nomadadon kaj loĝiĝintaj fikse ofte estas malsanemaj, tio dependas parte

de la aero malutila en la dometoj malofte, se iam, aerumataj — estas tute alie en la tendoj — parte de tio, ke tiu raso ankoraŭ ne estas alkutimigita al la nutraĵo pleje grena, pano kaj kaĉo, kiu estas sekvaĵo de la vivo loke fiksa.»

Laŭ mia observo la laponoj havas kutime larĝan buŝon kaj maldikajn lipojn kaj la haroj estas nigraj. Dum mia vojaĝo per trajno al Abisko mi vidis laponojn kun barbo. Ĝi estis tre maldensa kaj ankaŭ mallonga, preskaŭ kiel ĉe la ĉinoj.

En tri lokoj mi vidis laponfamiliojn. La virinoj en junaĝo estas ĉarmaj, foje eĉ tre ĉarmaj, laŭ mia kompreno; sed ili rapide maljuniĝas. Laŭdire la vizaĝoj sulkiĝas antaŭ ol ili atingas la aĝon de 40, sed tio dependas de la influo de la severa malvarma norda klimato kaj la nomada vivo.

La nuraj posedaĵoj, per kiuj la nomadlaponoj vivtenas sin, estas la boacoj. Ili ne havas ejon por la bestoj. Sur montaro kaj en arbaro la boacoj sendepende sin movas, sed la ŝtato faris specialan aranĝon pri la paŝtado de la boacoj, ke ili ne perdiĝu kaj ne intermiksiĝu. Ĉiu familio havas sian propran signon, kiun oni entranĉas en la orelojn de novnaskita boacido. La signoj estas tre diversaj, kaj ĉiu familio posedanta boacojn registras en la loka juĝejo sian insignon, por ke la leĝo povu protekti ilin en malfacilaj okazoj. Multaj el la laponoj estas riĉaj, kelkaj el ili posedas mil aŭ eĉ pli grandnombran boacaron, kaj la valoro de mil boacoj povas esti ĝis 60.000 kronoj. Mezgranda familio bone povas vivteni sin per tricent boacoj, sed eĉ la plej malgranda familio bezonas havi minimume cent boacojn por la ekzistado.

La laponoj, kiuj ne plu posedas boacojn aŭ kies boacoj perdiĝis, kutime ekloĝas fikse. Multaj el ili kulturas teron kaj faras komercon de boacoj kaj krome okupas sin pri fiŝkaptado. La sveda ŝtato instigas tiujn laponojn en iliaj novaj entreprenoj tiamaniere, ke ili bezonas pagi tre mal-

altan aŭ preskaŭ nenian imposton. Sed eĉ tiuj ĉi laponoj preferas vivi en hejmoj similaj al tiuj de nomadlaponoj.

La nomadlaponoj neniam restas longe en unu loko. Ŝajne ili ŝatas vagadi sur la altmontaro kaj en la arbaraj regionoj kun siaj boacoj. Kiam la printempa vento ekblovas, la boacoj mem ekmovas sin supren al la montaro kaj dum griza aŭtuno malsupren en la arbaron. Tie kreskas specoj de musko — likenoj — manĝaĵoj de la boacoj. Kiam neĝo glaciiĝas kaj kovras la muskon, la boacoj rompas la glacion per la hufoj kaj tiamaniere akiras sian manĝ-

Lapono kun boacoj travadanta riveron.

aĵon. En 1930 dum mia vizito en Lappland oni rakontis al mi, ke pro la severa vintro pasinta mortis multaj boacoj pro manko de nutraĵo. Se la temperaturo multe falas, la glacio povas fariĝi tiel malmola, ke eĉ por la boacoj estas malfacile rompi ĝin per la hufoj. La brutaro movas sin laŭdezire, sed la laponoj ĉiam observas ĝin, por ke la brutoj ne iru tro malproksimen kaj fariĝu viktimoj de lupoj. Ĉiujare la nomadlaponoj vagadas meznombre kvincent kilometrojn. Ĉiu familio tamen sin movas laŭ certa vojo kaj eĉ paŝtas la boacojn en deciditaj lokoj. Ĉiu nomadlapono estas tre singarda por ne flankeniĝi de la vojo dum la migrado, ĉar ofte neĝoventego tiel ekkovras la teron, ke estas tre malfacile trovi la vojon. La laponaj hundoj multe helpas ilin dum la irado en neĝoventega tempo kaj ankaŭ en la paŝtado de boacoj.

La nomadlaponoj dum vagadtempo manĝas kaj dormas sub la ĉiela plafono. Ili havas sledboaton, t. n. »keris», en kiun oni metas la infanojn kun varmaj kostumoj kaj felkovriloj, kaj la grandaj virboacoj tiras la sledojn sur glacio kaj neĝo. Unufoje en la jaro ili bezonas halti en iu loko por kelka tempo, kaj tiam lasas la boacojn libere vagadi, kaj nur tiam ili konstruas siajn tendojn aŭ tendo-

Somere la laponoj vagas sur la altmontoj.

similajn hejmojn el betulbranĉoj kaj kovras ilin per sakospeca ŝtofo facile enpakebla kaj forportebla. Ekzistas tamen fiksaj lokoj, kie ili kolektiĝas kaj en somero kaj en vintro. Tiam oni pli firme konstruas sian loĝejon. Tiuj konstruaĵoj estas faritaj el betultrunkoj dense fiksitaj en tendoformo, kaj oni kovras ilin per ŝtofo, torfo kaj tero. En la pinto de la konusforma konstruaĵo estas valvo por eligi la fumon kaj lasi la lumon internen. La simpla terfundamento formas plankon, kaj ĉirkaŭ la forno en la mezo oni metas molajn betullignaĵojn kaj kovras ĝin per bo-

acofelo. En la enirejo estas lignokadro, kovrita de forta sakospeca ŝtofo; ĝi funkcias kiel pordo, kiun oni povas flankenmovi dum en- kaj eliro. En la kontraŭa flanko de la pordo kuŝas la pormastrumaj objektoj kaj ujoj. La spacon dekstre de la pordo okupas la mastro kun familio kaj maldekstre la servisto. Oni akceptas la ordinarajn gastojn en la maldekstra flanko kaj nur la honorajn en la dekstra flanko. Super la fajro pendas kaldrono ligita per ferĉeno al la supra punkto de la konstruaĵo.

La modernaj ideoj ankaŭ enpenetris ĉe la laponoj en ilian konstruarton, kaj foje oni vidas tian torfan lapontendon kun vitraj fenestroj. Kelkaj eĉ komencis uzi kudromaŝinon, horloĝon, speciale tiuj kiuj loĝas apud staci-domo, kaj similajn objektojn. Dum la vintro la neĝoamasoj ofte tute kovras la teron kaj ankaŭ la tendojn, kaj tio fakte faras la internon sufiĉe varma. Krome oni kompreneble ĉiam aparte faras fajron en la tendomezo kaj sur ĝi en la kafopoto akvo preskaŭ ĉiam bolas. Laponoj ofte trinkas kafon kun salo kaj sukero. Ili mem faras fromaĝon el boacolakto. Laŭdire ĝi estas bongusta, kaj oni povas akiri tian fromaĝon kiel bongustaĵon eĉ en ordinaraj vendejoj. Sed la ĉiutaga manĝaĵo tamen ĉefe estas preparaĵo de boaca viando. La nomadlaponoj malgraŭ la vivado en libera aero kaj severa klimato estas pli fortaj kaj sanaj ol tiuj, kiuj jam fiksiĝis sur la tero. Sed pri la kaŭzo mi jam menciis la diron de doktoro Nordenstreng.

Unu boacino donas da lakto kutime ne pli ol unu tason, sed tia lakto enhavas grandan kvanton da graso, kaj tial ĝi estas fortiga. La boacino donas lakton ne en ĉiuj monatoj dum la jaro, kaj tial la mastrino konservas lakton por la cetera tempo de la jaro en speciala sako farita el la stomako de boaco.

La laponaj kostumoj estas belaj kaj interesaj. La ĉefkostumo estas la survesto. La vintra survesto estas el boaca felo, kaj en ĝia malsupra parto oni alkudras strion

de longhara felo aŭ de boaco aŭ de ŝafo. Oni metas ornamitan zonon ĉirkaŭ la talio kaj tiel fiksas la veston. La zonornamaĵoj kutime konsistas el vitraĵoj sed foje eĉ el arĝento. La virinoj fiksas la zonon iom pli malsupre ĉirkaŭ la talio ol la viroj. La survesto estas sufiĉe vasta kaj en ĝin oni enmetas ĉiujn tiajn objektojn, kiujn ni aliaj portas en poŝo.

Boaca grego naĝanta trans riveron.

Somere ili uzas surveston el ordinara ŝtofo, griz- aŭ blukolora, ĉiam malfermita ĉe la brusto kiel nokta ĉemizo, tiel ke oni facile povas forpreni la veston trans la kapon. La vira survesto portas rigidan kolumon kun fortkolora rubando aŭ brodaĵo. La virina similas al la vira sed malhavas kolumon. La formo de la kostumoj iom varias en diversaj lapondistriktoj.

Laponviro kaj -virino ambaŭ portas striktan pantalonon — vintre el ledo kaj somere el ŝtofo. La vintraj ŝuoj ankaŭ estas el felo de boacaj piedoj aŭ frunto kun longa

pinto ronde turnita supren, iom similaj al tiuj, kiujn uzas niaj nordhindanoj. Samformaj ankaŭ estas la someraj ŝuoj, sed nur el ordinara ledo.

Kaj viro kaj virino portas ĉapon. La vira ĉapo estas pinta. La virinoj portas diversformajn kaj kolorajn ĉapojn.

*

La lapona lingvo apartenas al la finn-ugra familio kaj iom similas laŭdire al la finna lingvo. Estona, finna kaj hungara, jen la lingvoj, kiuj formas la grupon de la finn-ugra familio. Malmultaj estas la laponoj en nombro, sed tamen ili ankoraŭ ne forlasis sian gepatran lingvon. En sveda teritorio ĉiuj laponaj gejunuloj scipovas paroli la svedan lingvon kaj laŭbezone ankaŭ faras tion. Sed ili esprimas ĝojon, se alilandulo salutas ilin en ilia propra lingvo, kaj tial mi estis lerninta la salutvorton »puoris».

La lapondistriktoj dividiĝas per la riveroj kaj tial interrilatoj inter laponoj de diversaj distriktoj estas maloftaj. Pro tio formiĝis multaj dialektoj en la lapona lingvo, kaj laŭdire laponoj de malsamaj distriktoj ne facile povas kompreni unu la alian.

La laponoj ankoraŭ preskaŭ ne posedas literaturon, sed kelkaj el ili pro eduko komencis okupi sin pri tio. Lapono, nomata Johan Turi, kies ĉefverko »Muittalus Samid birra» aperis en la jaro 1910, akiris grandan famon kiel verkisto. Mia amiko rakontis, ke la enhavo de tiu verko rilatas al la pensmanieroj de la lapona vivo. Kompreneble mi mem ne povas legi ĝin. Nuntempe sufiĉe multaj libroj kaj broŝuroj aperas en lapona lingvo, sed la plej multaj el ili estas nur tradukoj.

Preskaŭ ĉiuj laponoj en sveda teritorio scipovas legi kaj skribi dank' al la klopodo de la sveda ŝtato, sed antaŭ nur unu jarcento malmultaj laponoj povis skribi siajn nomojn. En 1930 la ŝtato faris leĝon, kies senco estas, ke oni eduku laponojn nedetruante iliajn sendependajn vivon

kaj vivmanieron. Dum jaro ĉirkaŭ kvar monatoj, kiam la nomadlaponoj en aŭtuno forlasas la montarajn regionojn, ili devas lasi la infanojn en la lernejoj. Kaj en printempo ili kunportas la infanojn returne al la montaro. La sveda ŝtato tute aŭ preskaŭ tute pagas por la edukado de lapon-infanoj, kaj eĉ la aliaj loĝantoj en Lappland ne bezonas pagi por tio.

Skikurado sur la laplandaj altmontoj en la somermeza tempo.

La nomadlaponoj, malgrandaj en nombro, malmulte kontribuas al la ekonomia vivo de la sveda ŝtato. Oni tamen entute povas dubi, ĉu estas eble al iu alia popolo vivadi en tia senfrukta montara tereno, kie regas, krom dum la someraj monatoj, nur malvarmo kaj mallumo. La vagada vivo dum longaj vintromonatoj en danĝera neĝovento kaj malvarmo nur kun la boacoj kiel vivrimedo estas multe pli severa ol la mallonga hejma vivado en la arbaroj dum kelkaj someraj monatoj.

Oni multe cerbumis, ĉu la laponoj ŝatus kiel la aliaj homoj loĝi en fiksaj hejmoj. Mi legis kaj aŭdis diversajn opiniojn pri tio. F-ino Odstedt rakontis al mi, ke nun estas kriza periodo en la lapona vivo, ĉar montriĝas, ke ili nun inklinas iom post iom al fiksa vivo. Sed pri la laponoj profetas doktoro Nordenstreng, ke »certege ili en tempo venonta postlasos signojn pli grandajn ol nun en literaturo kaj arto, eble eĉ en scienco».

La svedoj prizorgas la intereson de siaj laponoj kun granda homa simpatio kaj kompreno, eĉ kun amo.

KUTIMOJ DE SVATADO.

Tre interesaj kaj variaj estis, precipe en la pasintaj tempoj, la kutimoj uzataj en la lapona socio kiel junulo akiras al si edzinon. Kiam lapona knabo fariĝas junulo, li kompreneble serĉas vivkunulinon. En tiu okazo la ĝenerala kutimo estas, ke komence la junulo serĉas por si svatiston (en sveda lingvo »böneman»), kiu povas paroli kaj trakti ia aferon kun la gepatroj de la junulino, kiun li amas. Kun la svatisto li unue vizitas la tendon de la junulino. Enirante en la tendon oni salutas unu la alian kaj sidas kelkan tempon trankvile sen ia parolo. Poste la junulo laŭ antaŭa interkonsento faras ian signon al la svatisto, kiu tiam ekparolas jene: »Ĉu estas permesite ĉi tie prepari kafon?» La kutima respondo estas: »Jes, jes, kompreneble. Ĉiu rajtas prepari sian kafon.» La laponjunulo tiam elprenas sian kafkuirpoton, tason el la sako kaj plenigas la poton per pura neĝo kaj metas ĝin sur la fajron. La akvo bolas kaj dume oni parolas pri diversaj

aferoj, sed eĉ per unu vorto ne tuŝas la demandon pri edziĝo. Dum li parolas, la junulo elprenas unu post la alia sukeron, fromaĝon kaj panon el sia sako. Kiam la kafo estas tute preta, la junulo unue eltrinkas unu tason kaj poste regalas la mastrinon kaj la mastron. Se la gemastroj akceptas, tio signifas, ke ili komprenas la aferon kaj havas plenan konsenton pri la propono. Nun la junulo kun permeso de la gemastroj regalas la filinon, kaj se la filino akceptas la tason el la mano de la junulo, tio signifas, ke la amo estas reciproka, kaj poste la gejunuloj kune vizitas la proksiman registrejon kaj anoncas sian gefianĉiĝon. Poste la pastro faras finceremonion de geedzigo. (Laŭ la priskribo de la ĉefo de lapona hejmo en Lannavaara, kaj akirita de f-ino Odstedt.)

Ankaŭ okazas tiel, ke la laponjunulo mem ne vizitas la hejmon de la gepatroj de la junulino, sed sendas sian svatiston tien. La svatisto informiĝas, ĉu la gepatroj havas kaŭzon de kontraŭstaro al la propono. Kutime la gepatroj postulas informon pri la posedaĵo de la junulo, nome kiom da boacoj li havas, kaj kia estas lia karaktero. Se la respondoj estas kontentigaj, oni aranĝas festenon en la tendo de la gepatroj. Partoprenas en tiu festeno la estonta edzo kaj multaj parencoj kaj konatoj de ambaŭ flankoj, kaj ĉiu kunportas objektojn, eĉ tre valorajn, kaj donacas al la gefianĉoj.

Rakontis 50-jara lapono: »Kiam mi estis juna, okazis granda foiro en Jokkmokk. Tie junulo renkontis junulinon, kiun li amis. Post la unua persona renkontiĝo la junulo tiris la zonon de la junulino. Tio estis la unua signo de ampeto, kaj se la amo estis reciproka, tiam la junulino staras antaŭ la junulo kaj poste mem per du manoj tiras lian zonon. Tiel la junulo komprenas, ke ŝi ankaŭ amas lin. En tiu okazo li serĉas svatiston, kiu povos paroli por li al la gepatroj de la junulino. Kaj tiel okazis!

Mia avo estis tiaspeca proponanto, kiun fidis ĉiu homo.

En ĉiuj grandaj okazoj en nia vilaĝo oni vokis lin, kaj li kutime helpis ĉiujn.

Nu, iun tagon mia avo kaj la gepatroj de junulo kun multaj donacobjektoj vizitis la gepatran hejmon de la junulino. La svatisto de la junulo montris la tutan kalkulon pri liaj posedaĵoj. La gepatroj de la junulino konsideris la aferon kaj konsentis doni sian filinon al la junulo. Postan jaron denove okazis granda foiro en Jokkmokk, kaj tie oni festenis la geedziĝon. En tiu festeno la gejunuloj ambaŭ buĉis boacojn kaj mem preparis sian festomanĝaĵon kaj regalis la parencaron de ambaŭ flankoj. Kaj mi memoras, ke dum tiu festeno junulo preparis festomanĝon kaj regalis la gepatrojn de la junulino. Poste okazis la geedziga ceremonio, kaj post tio la novedzino regalis la tutan ĉeestantaron per siaj propraj preparaĵoj.»

La manpeto al junulino okazas ankaŭ en alia maniero. Se junulo enamiĝas al junulino, li serĉas okazon por renkonti la gepatrojn de la junulino, kaj kiam la okazo venas, la junulo vizitas ŝian gepatran hejmon kun malgranda ujo. En la ujo li metas unu- aŭ dukronan moneron kaj plenigas ĝin per brando kaj kun solena kaj respektplena gesto regalas la familiestron per ĝi. La patro tuj komprenas la intencon de la junulo, kiam li vidas la moneron, kaj se li trinkas la brandon, tio signifas, ke li konsentas doni sian filinon al la junulo.

Kompreneble okazintaĵoj en la lapona vivo, socia kaj individua, estas relative tre malgrandaj kompare al tiuj de kulturpopolo. Pri la pureco de la morala vivo ĉiuj asertas la samon, kio jam antaŭe estas menciita.

En pasinta tempo, se iam laponjunulino naskis infanon antaŭ edziniĝo, ofte tiu patrino mortigis la infanon kaj sin mem.

Inter la lagoj Suorvajaure kaj Stora Sjöfallet staras monto, kaj en ĝi troviĝas profunda abismo dekliva; la laponoj nomas ĝin Ähparas. Laŭdire iam needziĝinta lapon-

ino naskis infanon kaj ĵetis ĝin en la abismon, kaj tiaĵ la loko ricevis tiun nomon. En la malhelaj, grizaj aŭtunaj tagoj — kutime en vespero — oni aŭdas tie ploradon kaj ĝemadon de infanoj. Pri tiu loko kaj afero fariĝis multaj rakontoj, kiuj estas vaste konataj inter la laponoj de Svedlando kaj Finnlando.

Laŭ la rakonto de lapono el la vilaĝo Koutokeino oni ekscias, ke el tiu Ähparas-loko eliras terure malagrabla sono kaj ĉirkaŭiras la homojn kaj poste eniras en la homojn. Tio kaŭzas grandan suferon al la atakito, kaj por liberiĝi de tio oni devas eldiri multajn blasfemajn vortojn, kaj por tute liberiĝi oni devas doni nomon al la spirito de la mortigito: »Se vi estas knabo, do via nomo estas Adamo; se vi estas knabino, do via nomo estas Evo.» Oni ankaŭ vokis pastron en antaŭkristana tempo, kaj li per sorĉ-arto liberigis la atakitan homon de tiuj spiritoj de mortigitaj infanoj.

LANDO DE SLOJDO KAJ ARTINDUSTRIO.

Mi sidas en ĉambro de kastelo, iama hejmo de August Abrahamsson, kiu donacis sian tutan bienon kaj ankaŭ la kastelon al la slojdseminario en Nääs. La kastelo kuŝas sur insulo ĉirkaŭita de longa lago, Sävelången. Ponto kunligas la insulĝardenon kun la tereno de Nääs. Ĝi kuŝas en rave bela naturo, kaj ĉirkaŭ ĝi estas montetoj kaj arbaroj, kaj nun en la longaj somervesperoj estas io sorĉa, preskaŭ ne ebla priskribi. Ĉifoje mi venis nur por rigardi la finlaborajojn de la kursanoj. Mi ja sinsekve partoprenis kvar somerajn kursojn en diversaj slojdfakoj tie ĉi en Nääs — la hejmo de slojdo! Nun pri slojdo en Svedlando.

En la mezo de la lasta jarcento estiĝis la nuna slojdmovado, origine politika kaj socia, sed fine ĝi transformiĝis en puran edukan demandon. Pri tiu ĉi movado la iniciatinto kaj fondinto de la seminario en Nääs, Otto Salomon, skribas jene:

»En la landoj de Nordo la longaj, malhelaj vintraj vesperoj sekvas la helajn, mallongajn somermonatojn. La terkulturistoj, ĉirkaŭ 60 % de la tuta popolo, ne povis dumvintre labori en kampoj, sed laŭ tradicio kaj pro neceso devis fari konvenan laboron por vivtenado inter la hejmaj muroj, kaj tial ĉiu membro de la familio, eĉ la servistoj, kolektiĝis ĉe la ŝtona forno, kaj dume, kiam ili aŭdis rakontojn aŭ nordajn legendojn de maljunulo aŭ kune kantis baladojn aŭ himnojn, iliaj fingroj estis okupataj en laboro. La viroj faris tablojn, benkojn, hakiltenilojn

kaj diversajn aliajn necesajn objektojn, aŭ por la hejmo aŭ por la bieno aŭ por ambaŭ, simplajn sed ofte bele ornamitajn; kaj la virinoj ŝpinis kaj kudris kostumojn aŭ por si mem aŭ por la viroj kaj ankaŭ laboris per teksiloj. Tiaj laboroj estis pure hejmaj, kaj dum multaj jarcentoj tiuj hejmaj laboroj vivis sub la nomo slojdo.

Sed pro la subita kresko kaj evoluo de industria meĥaniko kaj la sekvaj progresoj tute naturaj de kooperativaj movadoj en Svedlando, la heredita kapablo en slojdlaboro

Altara teksaĵo de Atelier Licium.

iom post iom malaltiĝis kaj en kelkaj lokoj eĉ tute malaperis. La variaj specoj de slojdlaboro, kiuj antaŭe estis faritaj en la hejmoj, estis transprenitaj de la fabrikantoj. La daŭre plibonigitaj sistemoj de komunikado, kiel fervojoj, kanaloj k.t.p. facile kaj rapide liveris al kamparaj hejmoj tiujn necesajn objektojn, kiujn oni antaŭe faris per propraj manoj. Sed tia progreso — natura ĝi estas — tamen ĉiam kunportas certajn malavantaĝojn kaj danĝerojn preskaŭ ne eviteblajn. Estas tutcerte, ke kiam la laboro en familio transiras en fabrikon, oni povas kalkuli je granda tempoŝparo; kaj la tempo ŝparita fariĝas gajno, kiam oni profite utiligas ĝin. Male, se tiel ne estas, tiam la tem-

po antaŭe utiligita en produktiva aktiveco fariĝas tiu de malaktiveco aŭ — kio estas certe plej malbona — en malbonfaro, la tempo ŝparita fariĝas tempo perdita, kaj tio ne nur el morala sed ankaŭ el nacia vidpunkto.»

Brodita kolskarpo de la 18-a jarcento, el Äl, Dalarna.

La verkisto de la supraj linioj, la slojdhistoriisto Salomon, estis la persono, kiu ellaboris la slojdon por pedagogia celo kiel grava faktoro de eduko. Klarvida estis Salomon kaj pionira estis lia laboro, kiu metis lin en altan

rangon de la edukhistorio. Bonŝanca estis ankaŭ la pedagogo en sia granda entrepreno. Lia grandanima riĉa onklo, kiu posedis la kastelon kaj la bienon, disponigis sian tutan havaĵon al sia nevo, kaj tiel fondiĝis la seminario, kie oni sisteme instruis kaj instruas pedagogian slojdon. Dum mia lasta travojaĝo en Svedlando mi interalie viziti adis centon da lernejoj. Malgraŭ tio ke slojdo ne estas deviga fako, ĝi tamen tiel penetris la svedan kulturvivon, ke preskaŭ senescepte mi vidis en ĉiuj lernejoj bonajn aranĝojn por slojdinstruado.

La historio de eduka movado rakontas al ni, kiel dum jarcentoj pasintaj preskaŭ ĉiuj grandaj edukistoj esprimis ĉiu en sia maniero la opinion, ke la eduko de kapo kaj koro devas kreski harmonie kun tiu de la mano, kaj Svedlando estas la unua, kie tiu teorio transiris al praktiko kun bona rezulto. Al la fondaĵo de August Abrahamsson en Nääs, kun la nun mortinta Otto Salomon kiel ĝia unua estro, venadis kaj amase kolektiĝis instruistoj kaj edukistoj el ĉiuj partoj de la terglobo, kaj iom post iom Nääs fariĝis internacia centro por ili. Jen ankoraŭ vibras ĉi tie la granda amika spirito, kun kiu ĝi fondiĝis. Nääs nun estas ŝtata instituto sed tamen tenas sian originan, sendependan karakteron. Dum la lasta duonjarcento pli ol tri mil eksterlandaj instruistoj, krom la multe pli granda nombro de enlandaj instruistoj, partoprenis en la kursoj de Nääs, kaj inter ili pli ol 900 estis el Anglujo kaj Skotlando.

Dum kvar someraj kursoj mi ĝuis tie ĉi grandan helpon kaj amikecon en mia laboro. Jes, la svedoj estas ege afablaj al la fremduloj, sed komence tamen mi havis malfacilaĵojn. Oni ja diris al mi en Hindujo, ke per la lingvo angla oni ĉien povas vojaĝi kaj interkompreniĝi, kaj pri tio ankaŭ certigis min la svedoj, kiujn mi rekontis en Hindujo. Vere mi estis terurita en la komenco! Neniu el miaj instruistoj parolis angle, kaj tre malmultaj inter du



Teksaĵo el Skåne.

cent partoprenantoj — el kiuj la plej multaj estas instruistoj en ŝtataj lernejoj — krom kelkaj el Anglujo, Ameriko kaj Skotlando parolis la anglan lingvon. Ofte mi su-



Litkovriĵo (laŭ modelo "Krabbasnår") el Rättvik, Dalarna.

feris je miskompreno nur pro la lingva malfacilaĵo, sed foje tio kaŭzis ankaŭ komikajn akcidentojn.

Mi hontas vin informi, sed tamen mi devas, ke mi tie ĉi lernis fumadon kaj ankaŭ lernis manĝi viandon. Jes, en la unuaj tagoj mi ne facile povis toleri eĉ vidi viandpecon

sur la tablo, sed mi devis lerni manĝi viandon, kaj mi povas diri al vi, ke la viandmanĝado tiel efikis al mi la unuan fojon, ke poste dum semajno mi kvazaŭ aŭdis la kriadon de bovino en mia stomako.

Unu sabatan vesperon mi trovis, ke restas nur unu cigaredo en mia skatolo. En dimanĉo, La Sankta Tago, oni ne povas aĉeti cigaredojn. Do mi zorge konservis ĝin por fumi post la speciale bona dimanĉa tagmanĝo. Dimanĉo venis, kaj post la tagmanĝo mi elprenis mian cigaredon el la skatolo, sed mankis al mi alumeto, kaj rigardante ĉirkaŭen mi iris al sinjoro, kiu pumpis sian biciklan tubon. Mi montris mian cigaredon kaj angle petis lian alumetujon, sed kion li faris? Li klinis sian kapon kaj digne prenis mian cigaredon el miaj fingroj. Ekregis min sento de amuzo, kaj mi premis lian manon kaj dankis lin pro tio, ke li solvis la problemon de alumeto.

Nun eble vi komprenas, kial mi tiom vigle interesiĝis pri la flanka laboro lerni Esperanton. Kaj dank' al Esperanto, dum mia tutjara vojaĝo malfermiĝis ĉie la svedaj hejmoj kaj ebliĝis al mi konatiĝi kun sveda hejma vivo kaj kulturo. Kaj estas ankaŭ interese por vi aŭdi, ke preskaŭ neniam mi trovis svedan hejmon sen manfaritaj objektoj, kaj rimarkinde ankaŭ estas, kiel la tradicia slojdkaraktero influis la nunan svedan industrian produkton en stranga, sed tre harmonia maniero.

En Stockholm mi ofte vizitis la Nordan Muzeon, kiu fondiĝis iam en la lasta jardeko de la pasinta jarcento — signifoplena tempo, kiam la svedoj montris profundan respekton al siaj historiaj tradicioj, kaj dum tiu tempo okazis ankaŭ gravaj historiaj esploroj. Oni vigle kolektis restaĵojn aŭ memoraĵojn de pasinttempa norda kulturo. Tie en la Norda Muzeo oni kolektis amasojn da kamparkulturaj memoraĵoj. La samon oni ankaŭ povas diri pri la fondiĝo de Skansen, la liberaera muzeo, apud kiu staras la bela konstruaĵo de Norda Muzeo. Dufoje laŭ mia peto



Tapiŝo farita laŭ "flossa"-metodo.

iu oficisto montris al mi la pasinttempajn laboraĵojn, speciale la teksajn. Inter la kolektoj de diversaj manlaboraĵoj la plej pure svedaj kaj rimarkindaj estas ja ankaŭ la teksaĵoj. Ili estas ordigitaj laŭ tempo kaj provincoj. Nun mi tiom vidis la svedajn teksaĵojn en diversaj lokoj kaj provincoj, ke ofte senerare mi povas diveni laŭ desegnoj kaj koloroj, en kiu provinco la teksaĵoj estas faritaj. Ĉiu provinco havas sian propran koloron, eĉ teknikon kaj komponadon.

Malnovtipa tapiŝo el Vemmenhög, Skåne.

En la provinco Dalarna, kiu estas konata kiel la koro de Svedlando, ŝpinado kaj teksarto ankoraŭ vivas en hejmoj kiel libertempa laboro. Mi penos doni al vi priskribon de hejmo, kiun mi ofte vizitis. La mastro estas instruisto kaj verkisto kaj loĝas en mineja vilaĝeto, kiu konsistas el ĉirkaŭ 100 personoj entute. La duetaĝa domo izole situanta sur monteto, kie ili loĝas, estas tipe sveda. La ĉambroj en la supra etaĝo apartenas al instruistino. Li kun sia edzino loĝas en la ĉambroj de teretaĝo. Ili ambaŭ havas intereson pri diversaj kulturaj aferoj. La edzino pri-

zorgas la hejmon, kaj ilin ofte vizitas iliaj amikoj kaj konatoj. Al ilia dispono estas tri ĉambroj, grandaj kaj vastaj, krom la kuirejo. Kiel vi povas supozi, la mastrino havas multajn ĉiutagajn zorgojn pri la hejmo kaj kuirado, sed en sia libertempo ŝi teksas. Dum mia dua vizito tie mi konstatis kun certa surprizo, ke ĉiuj tapiŝoj, kiuj kovras la plankojn, la litkovriloj kaj la tablotukoj, estas faritaj de ŝi mem. Ĉio estas farita kun granda gusto. Ŝi montris al mi afable sian centjaran malnovan teksilon en ĉambro de la supra etaĝo. En diversaj festotempoj ŝi donacas al parencoj kaj amikoj belajn teksaĵojn, kiujn kompreneble plej ofte ŝi mem faras. Tia kutimo estas ĝenerala preskaŭ en la tuta lando.

Kiel mi diris, el ĉiuj manlaborartoj tie ĉi la teksa estas tipe sveda, kaj mi povas bone kompreni, kial ĝi akiris grandan famon en diversaj mondekspozicioj pro la alta kvalito kaj bela komponado de koloroj kaj tekniko.

Fondiĝis jam en la jaro 1873 la Asocio de l' amikoj de manlaboro (Handarbetets vänner), kiu komence akcelis konservi formortantan teks- kaj brodaĵkulturon de la lando, sed post ne longa tempo la asocio entreprenis la disvastigon de laboro pli originala kaj krea. En Stockholm la asocio posedas lernejon kaj propran oficejon, malfermitan al ĉiu, kaj tie oni povas vidi specimenojn de ĉiuspecaj manlaboroj en Svedlando.

En diversaj muzeoj en la lando kaj speciale en la fama Norda Muzeo oni konstante penas kolekti kaj konservi la restaĵojn de formortintaj kaj mortantaj laboraĵoj. En la fino de la lasta jarcento estiĝis nova movado, kiu transprenis la ĉeftaskon de la asocio de l' amikoj de manlaboro. La celo de tiu movado estas bone kaj sisteme traesplori la malnovajn desegnojn kaj teknikajn metodojn kaj samtempe antaŭenpuŝi la nunan manlaborproduktaĵon por vendado en la merkato. Tiu movado transformiĝis en grandan tutlandan organizon sub nomo La nacia ligo de



Manteksita tapiŝo.

Svedaj Hejmslojdasocioj, fondita en la jaro 1899. Al tiu ligo kun ĝia centra oficejo kaj vendejo en Stockholm apartenas 27 provincaj asocioj. Dufoje mi vizitis speciale aranĝitajn ekspoziciojn de tiu ligo en Stockholm, kaj krom tio multfoje mi faris vizitojn en la konstanta vendejo ĉe

Tapišo ("rödlakan") el Skåne.

Gravuritaj artvitrajoj el Orrefors.

Kungsgatan (la Reĝa strato) apud la stokholma alta turo »Pagod». La plejmulto de la teksaĵoj — tablo- kaj murtukoj, tapiŝoj kaj drapiraĵoj — estas faritaj laŭ malnovaj modeloj, ofte en koloro de aparta provinca karaktero

Arte gravurita flakono el Orrefors.

kaj komponado. En tiu popola metio la arto kaj manlaboro estas nedisigeblaj unu de la alia, kaj ĝuste tio portas al la sveda slojdo internacian famon. Nun kiam mi skribas pri sveda slojdo, mi ne povas ne senti certajn ĉagrenojn, ĉar en mia penso kaj antaŭ miaj okuloj aperas

la mizera stato de nia hinda hejmteksarto, kiu kompreneble en tempo pasinta atingis altan nivelon. Mi vere ne sentas ĝojon, kiam mi vidas belajn hindajn objektojn en muzeoj en Eŭropo. Se nia popolarto pro neatentemo de la portantoj de nia kulturo tiel kiel nuntempe formortas, eble iam ni devos vojaĝi al Eŭropo por vidi belajn objektojn el Hindujo, faritajn en pasinta tempo. Kaj nenio estas pli hontiga ol tion supozi.

Mia intereso pri slojdo gvidis min al renkonto kun gvidantaj personoj de diversaj slojdorganizoj ĉi tie en la lando de la slojdo. Iama gvidanto de la Asocio de l' amikoj de manlaboro, f-ino Karin Vesterberg, kiu estas konsiderata kiel la plej lerta gvidantino de tiu asocio, rakontis al mi pri la organizo kaj ankaŭ pri la intereso, kiun la popolo mem montris al ĝi. Kaj la nuna gvidantino, aŭdante mian intereson, donacis diversajn valorajn teksaĵojn tipe svedajn por la muzeo en Santiniketan.

Mi ankaŭ vizitis f-inon Fick, la estrino de la oficejo de la hejmslojdasocio, kaj de ŝi mi akiris multajn informojn rilate al la provincaj labororganizoj kaj produktoj. Tie ĉi mi citas el la raporto de la ligo la jenon: »En la jaro 1929 laboraĵoj de pli ol 2.500 slojdistoj kolektiĝis, kaj la valoro de la tuto estas 2.000.000 svedaj kronoj». Sed memoru, ke en tiu kalkulado la kutimaj hejmaj produktaĵoj estas tute ne kalkulitaj, kaj cetere la raporto temas nur pri la laboro farita de profesiaj slojdistoj de la menciita organizo.

Oni ne povas dubi, ke la nuntempa altranga sveda teksaĵarto staras plej proksime al la malnova popolarto de la lando, kaj mi emas pro miaj spertoj aldoni, ke la malnova estas la funda bazo, el kiu la moderna konstante ĉerpas forton. Impulson donis eble ankaŭ la belaj tapiŝoj de orientaj landoj kaj la alilandaj mezepokaj brodaĵoj. Sed tamen la ĉefa forto, nome stabileco, multflankeco kaj freŝeco, estas konstante akirataj el la sveda arto

mem. Se la hinda teksaĵarto revivigas, kaj tion mi certe esperas, ĝi kompreneble ne devas kopii modelojn aŭ motivojn de aliaj landoj. Sed la evoluhistorio de la sveda teksarto certe povas doni impulson kaj esti modelo ne nur por ni en Hindujo, sed por ĉiuj aliaj landoj.

Belajn teksaĵojn mi ankaŭ ofte vidis en svedaj preĝejoj. La muraj, altaraj kaj foje ankaŭ plankaj tapiŝoj en la svedaj preĝejoj estas karakterizataj de belgusto, respekto al la tradicio kaj historia scio. En Stockholm troviĝas speciala laborejo (Atelier Licium), kie oni teksas nur por la preĝejoj.

En Nordiska Kompaniet, la plej granda magazeno en la ĉefurbo, mi vidis maŝinteksaĵon, kaj kun certa miro mi aŭdis, kiel grave influitaj tiuj teksaĵoj estas de popola manteksa arto. Kaj ŝajne la urbanoj, kiuj mem ne havas multan okazon teksi, ofte uzas tiajn fabrikteksaĵojn.

La moderna arto de librobindado en Svedlando ankaŭ sin bazas sur la malnova tradicio de tre alta karaktero, kaj same kiel la moderna teksarto ĝi trovis sian renesancon en la revivigo de la popola tradicio. La librobinda arto kompreneble iatempe estis influita de la angla, kaj pli poste kelkaj firmoj sekvis pli puran tipografion en la maniero de la modernaj germana kaj itala librobindarto. Sed tamen tradicio ĉiam regis la arton. La grandaj libroeldonejoj havas sian propran departementon de arta librobindado sub gvidado de specialisto, kaj la belaj simplaj stiloj atingis tian nivelon, ke eĉ la neriĉaj legantoj facile kaj malkare povas aĉeti librojn por plenigi siajn modestajn hejmajn libroŝrankojn. Certe en tiu ĉi lando la legemo de la amaso estas granda. Kaj eĉ en la plej modestaj laboristaj hejmoj mi vidis ŝranketon plenan de libroj. Mi ne malofte kontrolis, ĉu la libroj estas nur por ornami la hejmon aŭ alie. Sed estis tiel, ke eĉ la plej simplaj svedoj havas intereson en iu aŭ alia kulturmovado, kiun ili sekvas per la koncernaj literaturaĵoj, kaj tio mon-

Gravurita kristala pokalo el Orrefors.

tras la altan nivelon de la popolamaso, dank' al la malfermo de edukinstitutoj kaj ŝtataj zorgoj. Pri la librobindarto mi ne povas skribi pli multe ol tion, ke kiam mi vidas la lukse binditajn belajn librojn en la fenestroj de librovendejoj kaj en la ŝrankoj de miaj konatoj, tiam mi ofte deziras, ke niaj junuloj venu tien ĉi por lerni tiun arton. Mi ne hezitas diri al vi laŭ mia sperto kaj kom-

Fruktopiado komponita de Wilhelm Kåge (el Gustafsberg).

paro, ke la bindarto en malmultaj landoj estas tiom altevoluinta kiom en Svedlando. La atingaĵo en tiuj artoj tie ĉi estas rezulto de sistema laboro, pri kiu la svedoj montris specialan kapablon ankaŭ en multaj aliaj kulturaj fakoj. Oni povas atribui laŭdon kaj respekton al la sveda trajto de konstanteco en la progresaj laboroj ĝeneralaj.

Dum mia vojaĝo mi interalie vizitis kelkajn vitrofabrikojn. Arta vitrofarejo aŭ fabriko ekzistis en Svedlando jam en la jaro 1741. Mi vizitis la vitrofarejon Orrefors.

Ĝi estas konata pro siaj artproduktaĵoj. Unu konato kiel interpretisto akompanis min. Antaŭe mi telefone estis akirinta permeson viziti la fabrikon en decidita tempo. Unu el la estroj montris la internon kaj unue gvidis nin en laborĉambron, kie oni faris simplajn objektojn por ĉiutaga uzado en simplaj hejmoj. En alia ĉambro ni vi-

Porcelano el Gustafsberg. Komponita de Wilhelm Kåge.

dis belajn modernajn laboraĵojn en diversaj koloroj, kaj fine oni montris al mi la ĉambron, kie artistoj estis okupataj enlabori belajn dekoraciojn sur grandajn vazojn diversformajn, kaj la desegnoj kuŝis apud la artistoj. Ho, kiom da belaĵoj la homa mano povas produkti! Poste ni vidis finlaboritan aron da tre artaj objektoj preparitaj por la granda slojdekspozicio, kiu nun malfermiĝis en la ĉefurbo. Mi ĵus venis de tie, kaj kiel vi povas kompreni, mi sentis min tre bonŝanca, ke ĝuste dum mia restado tio okazas. Jes, por la svedaj vizitantoj la ekspozicio

estas interesa, ĉar eĉ la laikoj tie povas vidi la atingaĵojn de sia propra lando en manlaborarto, kaj por mi eksterlandano ĝi estas ne nur interesa sed ege instrua. La gvidanto de Orrefors rakontis al mi, ke vitra globeto farita de unu el la artistoj en tiu fabriko estis donacita al la sekretario de la Ligo de Nacioj, kaj globeton faritan de

Porcelana telero el Gustafsberg. Komponita de Wilhelm Kåge.

alia granda artisto donacis la sveda reĝo al la kronprinco de Japanlando je lia edziĝa festo. Jes, la artproduktaĵoj estis tiom belaj, ke mi spontane devis admiri, kaj ŝajne tio estis videbla en miaj okuloj. Jen aŭdu, kio okazis poste. Post la vizito mi promenis kun la akompananto, kaj revenante hejmen mi trovis en mia loĝejo tri belajn fruktopelvojn kiel donacojn de la fabriko al la modesta vizitanto el Hindujo! Tio ne estis la sola okazo. Kolektiĝis ĉe mi ricevitaj kiel donacoj kelkaj belaj tipe nordaj teksaĵoj, tablotukoj, kusenkovraĵoj kaj similaj belaj objektoj

dum miaj vizitoj en diversaj laborejoj en la tuta lando. La svedoj komence ŝajnis al mi treege trankvilaj kaj eĉ timemaj montri sian senton al fremda gasto, sed pro la menciitaj agoj kaj la donacoj kaj nun ankaŭ pro la pli proksima konatiĝo kun la popolo mi povas senhezite diri al vi, ke tie ĉi oni estas ĝentilaj, tamen montras sian senton multe pli multe per agoj ol per varmaj parolgestoj. Mi ĉiam sentis min tute sekura en la manoj de svedoj. Povas esti, ke la landa naturo kaj klimato multe respondas al la formiĝo de la popolkaraktero. Nun mi ja travivis du jarojn tie ĉi. Dum la vintra sezono la lagoj glaciiĝas kaj la tero kaj la arbaro portas blankan, foje tre dikan neĝokostumon, speciale en altaj regionoj. Vi eble ne povas imagi, kiel aspektas la lando dum la vintro. Sed sub la glacio la akvo ĉiam kompreneble fluas kaj sub la neĝo restas la varmo. Kredeble tiu naturfunkcio ankaŭ faris la popolon tia, kia estas la sveda. Kaj eble ne pli malmulte signifas la grava fakto, ke dum pli ol jarcento la sveda popolo ne havis militon. Do la kulturo en la lando en ĉiuj direktoj evoluis etape kaj nature sen grandaj tumultoj.

La porcelana laboro sveda ankaŭ meritas mencion. Mi fakte vizitis nur unu laborejon, en la sveda urbo Lidköping (kie mi interalie la unuan fojon en Svedujo manĝis hindan manĝaĵon ĉe pastro, kiu kun sia familio loĝis en Calcutta dum multaj jaroj). Mi konfesas, ke mi ne kapablas prijuĝi la artan valoron de la sveda porcelana laboro pli multe ol tion, ke multaj produktaĵoj ŝajnis al mi ege belaj.

En Nääs mi partoprenis du kursojn de metallaboro, ĉefe fera, kupra kaj latuna kaj ankaŭ iomete stana. Malaltpreza metallaborarto stana estas relative nova aŭ plej ĝuste dirite renovigita. Sed tamen la stana artindustrio, kaj mana kaj maŝina, estas tre disvastiĝinta. Senescepte en ĉiuj svedaj hejmoj mi vidis vazojn por floroj kaj fruktoj aŭ kandelingojn aŭ inkujojn aŭ pladojn aŭ aliajn sur-

tablajn objektojn kun certa grado de artlaboro. La plej alloga flanko de stana laborarto sveda estas tamen ĝia naturkulturo. En stanlaboraĵo la sveda gusto ne toleras efekton de pli forta metalo, ekzemple tiu de arĝento.

Fera kaj kupra manlaborartoj estas tre malnovaj. Kaj tio estas nur natura, ĉar la lando ja tenis kaj ankoraŭ te-

Gisfera urno el fabriko Näveĸvarn.

nas sian famon pro siaj neelĉerpeblaj ferminejoj kaj ankaŭ tiuj de kupraj en pasinta tempo. Tamen kaj feraj kaj kupraj manlaborartoj travivis renesancon en la komenco de tiu ĉi jarcento. Krom en la metia lernejo nuntempe metalslojdo estas instruata en certa grado ankaŭ en la altaj klasoj de multaj popollernejoj, speciale la urbaj — kie oni komence lernas trakti metalon per mano kaj martelo, kaj por hejma uzado oni faris seriojn da objektoj, laŭgrade de facilaj al pli kaj pli komplikitaj objektoj, laŭ sistemo ellaborita de edukistoj. Laŭ mia scio tiu ĉi lando

estas la unua, kiu enmetis metallaboron en popoledukan planon.

La metallaborarto mana tamen trovis sian plenan esprimon rilate al la sveda artkulturo de modernaj loĝejoj kaj belaj publikaj konstruaĵoj, kiel ekzemple en la famaj urbodomo, koncerthalo, teknologia altlernejo, ĉiuj en la



Stanlaboraĵoj komponitaj de Nils Fougstedt.

ĉefurbo Stockholm, kaj multaj aliaj en provincaj urboj. Bela metallaboro ankaŭ estas ofte videbla en ĝardenaj ujoj, barilpordoj, bariloj kaj speciale en fontanoj.

En Svedlando la elektro estas tre vaste uzata. En la aranĝoj de elektraj lampoj stano kaj aliaj ne altvaloraj metaloj kaj kompreneble bronzo kaj latuno, ofte kombinitaj kun vitraĵoj, estas preskaŭ universale uzataj. Laŭ mia sperto pri cirkonstancoj en diversaj landoj mi povas diri, ke la lamparanĝoj en Skandinavio, kaj speciale en Svedlando estas ege riĉaj kaj pompaj, kaj mi fakte ne povas pensi pri sveda hejmo sen elektra lampo.

Pri la svedaj arĝentlaboroj mi bedaŭrinde ne povas informi vin multe, ĉar mi neniam profunde okupis min pri tio. Laŭ tio, kion oni hazarde montris al mi en vizitataj hejmoj kaj kion mi aŭdis, la artornamaĵoj arĝentaj estas faritaj laŭ historiaj stiloj kaj sufiĉe influitaj de laboro en najbara kaj frata Danlando.

Nun mia rakonto fariĝis tre longa, sed espereble ĝi donas al vi imagon aŭ superrigardon en certa grado pri

Stanlaborajoj el Ystad.

slojdo kaj artlaboro sveda, sed antaŭ ol tute fini mi devas informi vin ankaŭ pri la sveda ligna slojdo. Fakte, kiel vi povas kompreni, la ligna estas la unua kaj la komenca fako enkondukita en la lernejan programon. En niaj hindaj hejmoj ni ne bezonas tiom da mebloj kiel en hejmoj de nord-eŭropaj landoj. Tie ĉi en la plej simplaj hejmoj oni bezonas skrib- kaj manĝotablojn, ŝrankojn kaj seĝojn, kaj la lando estas ege riĉa je arbaroj, kaj tiel estiĝis diversaj stiloj por la hejma meblaro. Ĉiu historia periodo havis sian propran stilon, sed tiu temo estas tro vasta por priskribi. La nuntempan modon tie ĉi oni tamen povas karakterizi tiel, ke en la meblofarado oni konstante tendencas kombini utilon kaj komforton, adapteblajn en

la novaj cirkonstancoj. Mi tamen observis, ke la svedoj havas respektplenan senton por la malnovstilaj dekoraciaj mebloj pasinttempaj. Unu el la plej konataj nuntempaj membloarkitektoj estas Carl Malmsten, kiu iam estis instruisto en Nääs. Pli poste li mem kiel pedagogo ankaŭ ellaboris planon por lignoslojdo, nuntempe parte uzata en lernejoj. Li ankaŭ fondis sian propran lernejon kaj interesaj edukprovoj estas faritaj tie. Kiel mebloarkitekto Malmsten laboras por grandaj meblofirmoj, kaj meblaro laŭ lia stilo libera de rigideco kaj monotoneco tiamaniere trovis vojon al multegaj svedaj hejmoj. Stile kaj kiel desegnisto li kaj liaj sekvantoj kunligas la tradicion kun la nova stilo »funkciismo» — stilo forte reganta nuntempe kaj en moderna arkitekturo kaj en aranĝo de novspecaj svedaj hejmoj.

Kelkajn liniojn ankaŭ pri kartonlaboro. Jes, eĉ en Hindujo ni ja ofte aĉetas produktojn de svedaj paperfabrikoj. Kartonlaboro estas instruata en lernejoj, kaj en tiu laboro la ornampaperoj ofte estas faritaj de la lernantoj mem.

SVEDAJ KUTIMOJ KAJ MOROJ.

Longe mi estis en tiu ĉi lando, kaj dank' al Esperanto multaj hejmoj de ĉiuj sociaj tavoloj malfermiĝis al mi, kaj kiel gasto mi ankaŭ iom spertis pri la hejma vivo ĉi tie.

Kiel vi povas kompreni, la vivnivelo tie ĉi estas tre alta — eble unu el la plej altaj en tuta Eŭropo. Krom la svedaj laponoj, kiuj mem formas tute apartan socion kun siaj propraj moroj kaj kutimoj, la sveda popolo estas homogena, kaj tial la sociaj diferencoj sin bazas pli en la ekonomia stato, ol ekzemple kiel ĝi estas ĉe ni en Hindujo. Rasproblemojn oni ne havas, kaj homoj el aliaj landoj, kiuj venis en Svedlandon en antaŭa tempo, fariĝis tute svedaj. Geedziĝoj povas okazi kaj ne malofte okazas inter membroj de alta kaj malalta klasoj. Mi ne povas procente esprimi tion, sed mi imagas, ke tiaj rilatoj estas pli malpli dependantaj de ekonomia stato, ŝajne same kiel en ĉiuj aliaj landoj. Tamen pri la popolo sveda oni tutcerte povas diri, ke ĝi estas tre homogena.

Kutime la svedoj estas altstaturaj kun pli malpli blondaj haroj kaj bluaj okuloj — tute tiel kiel mi imagis pri ili pere de literaturaĵoj antaŭ mia vizito, kaj ŝajne tio tre konvenas al la koloro de la naturo tie ĉi en la Nordo.

Multaj svedoj ja vivas relative tre izole, speciale en la norda regiono de la lando. Tiam la diferencoj en la vivkutimoj inter diversaj regionoj ne estas grandaj. Nuntempe radio, telefono — aparato uzata en preskaŭ ĉiu sveda hejmo — kaj vigla trafiko en la tuta lando preskaŭ nuligas la izolecon kaj la ekzistintan diferencon. Diferenco

estas nur en tradiciaj kutimoj aŭ kutimoj de apartaj provincoj parte nun revivigitaj.

Pri kostumoj en la tuta lando estas same kiel en ĉiuj aliaj eŭropaj landoj, alivorte la plej modernaj modoj, ĉu parizaj, londonaj aŭ aliaj, penetris la plej izolitajn lokojn. En antaŭa tempo en ĉiu provinco la viroj kaj virinoj portis belajn kostumojn manlaboritajn, sed nuntempe oni uzas ilin okaze nur en la tempo de somerfestoj kaj simile.

En Nääs je mia granda ĝojo mi vidis partoprenantojn porti siajn naciajn kostumojn, pli bone dirite siajn proprajn provincajn kostumojn, en la ĉiutaga vespera popoldancado. La desegnoj kaj kolorkomponado de la naciaj kostumoj estas tre variaj, sed ili estas belaj. Dum mia vojaĝo tra la lando mi trovis nur en lokoj ĉirkaŭ la lago Siljan en la provinco Dalarna kelkajn sinjorinojn en naciaj kostumoj. Cetere dum la granda somermeza festotago — la tago de Sankta Johano — multaj gejunuloj portas naciajn kostumojn. Estetike ili estas pli belaj, almenaŭ al miaj okuloj, ol la modernaj kutimaj kostumoj. Ekzistas asocio, kiu laboras por revivigi la uzadon de naciaj kostumoj en la somero, speciale en la liberaeraj somerfestoj. La samon oni povas diri ankaŭ pri la popoldancoj en akompano de malnovaj popolkantoj. Mi partoprenis ĉiuvespere en la popoldancado en Nääs.

Alie en la ĉiutaga vivo tute ne ekzistas diferenco de kostumo inter la diversaj klasoj. Eĉ la laboristoj tie ĉi same bone kaj zorge sin vestas kiel la aliaj, sed kompreneble ne dum laboro. Senescepte ĉiu virino portas ĉapon kaj ĉapelon krom kelkaj tre maljunaj, kiujn mi malofte vidis en malgrandaj kamparaj lokoj porti pecon de kolorita tuko sur la kapo. Ŝuojn kaj botojn ja portas ĉiuj krom kelkaj laboristoj, kiuj en hejmo kaj dum laboro en minejoj portas lignajn ŝuojn. Mi estis gasto en hejmo de karbmineja laboristo, kiu ĉiam portis lignajn ŝuojn en la hejmo. Mi petis lin montri al mi la subteran regionon de la

minejo, kaj tiam li vestis min per speciala kostumo kaj donis al mi lignajn ŝuojn. La sama kutimo trovigas en sudlandaj bienoj kaj ĉe la bienaj laboristoj.

Interesos vin aŭdi ke en tiu ĉi lando oni malofte havas plurajn servistojn en la hejmo kiel ĉe ni. Kutime oni havas servistinon por la kuirado kaj zorgado pri infanoj dum la foresto de la gemastroj. Tamen en la plej multaj hejmoj la mastrinoj kun helpo de la mastroj faras preskaŭ ĉion.

Krom en la popoldancoj kaj portado de naciaj kostumoj speciale svedaj kutimoj kaj manieroj estas videblaj nur okaze de festoj kaj ĝentilaj kondutoj.

Kiel ĉe ni ankaŭ tie ĉi oni festas la ŝercan nokton inter la 30-a de aprilo kaj 1-a de majo, sed la festo tie ĉi okazas en iom alia maniero. En Stockholm — la ĉefurbo — kaj en Uppsala — la universitata urbo — mi vidis la spektaklon de tiu festo, en kiu amase partoprenas la gajaj studentoj. Sur diversaj altaĵoj oni faras grandiozan fajron kaj miloj da homoj lasas la hejmon nur por rigardi la spektaklon. Sed la plej pompa festo dum la somero tamen estas tiu de somermezo en la 23-a kaj 24-a de junio, kiam la suno atingas la plej altan punkton en la supro. Ŝajne tiu ĉi festo estas unu el la plej antikvaj. Per betulbranĉetoj kun folioj oni bele ornamas la domojn, eĉ la ŝipojn, kaj en kamparaj lokoj oni starigas en libera aero stangon, kiun oni ornamas en sama maniero per girlandoj de betulbranĉoj, folioj kaj floroj. Ĉirkaŭ ĝi junuloj kaj junulinoj, viroj kaj virinoj, ofte en naciaj kostumoj, manmane faras rondon kaj kantas kaj dancas popoldancojn. Ĉar en tiu nokto neniam mallumiĝas, la festeno daŭras ĝis la 2-a, 3-a aŭ eĉ pli malfrue en la venonta mateno. Sinsekve mi partoprenis tiun festenon en du jaroj en Nääs.

En la urboj, kiam la tagoj rapide mallongiĝas kaj fariĝas pli kaj pli grizaj en la aŭtuno kaj oni venas hejmen post la somerripozo, kutime ekstere en la kamparo, tiam

vekiĝas la hejmsocia vivo. La lampoj brilas en la hejmoj, kaj oni reciproke invitas amikojn al tagmanĝo, supeo aŭ kune vizitas teatron aŭ muzikejon aŭ bonan kinon. Oni neniam kiel ĉe ni hazarde vizitas amikojn en la urbo sen antaŭa informo aŭ invito. Oni vizitas hejmon nur kiam oni estas invitita, kaj se oni akceptas tian inviton, oni ankaŭ devas ree inviti la invitinton, kaj tiamaniere dum la malhelaj vintraj monatoj la invitoj rondiras. Sed mi ĝuis multajn tiajn invitojn sen la devo pri reinvito, do mi foje invitis la invitintojn viziti min en Hindujo. Sed aŭdu kiel oni regalas en hejma tagmanĝo dum tiaj invitoj! En preciza tempo la gastoj alvenas kaj la gemastroj akceptas ilin en antaŭ- aŭ sidĉambro kun kutima bonvenvorto »välkommen» kaj kun varma manpremo.

Do oni eniras la manĝosalonon, kie en la mezo de la ĉambro la tablo staras bele preparita kaj en unu angulo pli malgranda tablo plenplena de diversspecaj bongustaĵoj por la buterpanoj. Oni nomas ĝin »smörgåsbord» (buterpana tablo) — tute speciala manĝokutimo sveda. Sur la tablo kuŝas abunde la panaro, brunaj kaj blankaj, molaj kaj malmolaj — la lasta estas nomita »knäckebröd», ankaŭ ĝi sveda specialaĵo, krome fromaĝoj, haringoj, pizoj, salatoj, kaviaro, anĉovo, sardinoj kaj multaj aliaj malvarmaj kaj varmaj viandaĵoj kaj saŭcoj kaj multspecaj miksaĵoj (delikataĵoj), ho, mi ne scias la nomon de ĉiuj specoj! Tiu antaŭmanĝaĵo estas ege bongusta kaj la komencantoj povas trovi sin en embaraso pro troa manĝo. Mi memoras pri mi mem dum mia unua tagmanĝo en sveda ŝipo, kiam oni regalis nin per »smörgåsbord». Ne sciante pri la venonta menuo mi tiom manĝis, ke poste mi ne povis tuŝi la veran tagmanĝon. Cetere tiu ĉi »smörgåsbord» estas konsiderata kaj manĝata kiel apetitdonanto. Nun mi estas tiel alkutimiĝinta, ke foje mi mem miras pro mia apetito okaze de tiuj tagmanĝoj. En la komenco de la manĝado tiuj, kiuj kutimas, en malgrandaj glasetoj

trinkas ian alkoholaĵon. La procedo estas jena: La gemastroj unue prenas la glason en sian manon kaj ĉiuj aliaj sekvas ilin, kaj tiam ili diras »bonvenon» klinante la kapon kiel gesto de ĝentileco en solena maniero, kaj poste ĉiuj aliaj faras la samon kaj oni diras »skål» (sanon!). La vorto »skål» estas vaste uzata en la tuta lando kaj estas unu el tiuj vortoj, kiujn la eksterlandanoj tuj eklernas. Post la santrinko oni rerigardas la okulojn reciproke kaj denove iom sin klinas unu al la alia kaj daŭrigas la manĝadon.

Kiam la regalema mastrino observas, ke la apetito de ŝiaj gastoj vere komenciĝis, tiam oni forlasas la malgrandan tablon »smörgåsbord», kaj laŭ decido de la mastrino ĉiu prenas sidlokon ĉirkaŭ la ĉefmanĝotablo. Kutima nombro de manĝaĵoj estas tri, foje eĉ kvar. Dum la manĝo oni interparolas kaj en la fino la mastro aŭ en la foresto de li la mastrino faras paroladon kaj esprimas ĝojon pri la plezuro vidi la gastojn ĉe tagmanĝo. En tiu okazo unu el la gastoj ankaŭ faras paroladon kaj dankas per belaj frazoj pro la invito, ne mallofte en ŝerca humoro kaj kun ridantaj okuloj aldonante ke espereble tiu ne estas la lasta fojo. En la fino la gastoj stariĝas kaj ĉiuj proksimiĝas al la mastrino kaj la mastro kaj laŭvice premas la manon de ili kaj dankas pro la manĝo. La unua frazo, kiun mi kiel ĉiuj aliaj eksterlandanoj devis eklerni, estis »tack så mycket», signifanta laŭvorte »dankon tiom multe». Unu dankas kaj la alia redankas pro la danko kaj mallongigas ofte la frazon je nur unu vorto »tack». En butiko, en hejmo, en ĉiutaga intertraktado oni reciproke ĉiam uzas la vorton »tack» kiel signon de gracia ĝentileco.

Post mia trijara restado en Skandinavio, kiam mi estis en Londono returne al mia hejmo, mi renkontis parencon, al kiu mi estis diranta »dankon por hieraŭ». Li estis tiom surprizita pro la ŝanĝo de mia konduto! Sed tiel estas en sveda vivo, ke oni ĉiam dankas por ĉio. Tiuj kutimoj tiel

influis min, ke nun ili ŝajnas esti tre naturaj al mi, sed ĉe ni, eble kiel en aliaj landoj, tia kutimo de dankado preskaŭ ne ekzistas, aŭ oni esprimas tion en alia maniero.

Infano en familio post la finmanĝo kuras al la patrino kaj diras: »Dankas vin multe pro la bona manĝo, patrino» kaj kisas la patrinan frunton, kaj poste la infano ankaŭ dankas la patron. Ne pensu ke tiuj kutimoj estas sensignifaj, aŭ ke oni malbonuzas la vorton »tack» — male ĝi estas tiel eldirita, ke oni tuj sentas en tio la esprimon de sincera dankemo kaj respekto al la gepatroj. Fakte tiu ĉi malgranda vorto »tack» portas grandan signifon pri bonkonduto en ĉiutaga sveda vivarto.

Post la fino de la tagmanĝo kun manpreno kaj danko ĉiuj kolektiĝas ĉirkaŭ la kafotablo, kaj interparoloj iom pli vigle kaj intime okazas. Sed oni bezonas kutimiĝi al la sveda maniero de alparolo al persono, ĉar oni neniam komence diras »vi» sed »la adjunkto» aŭ »la direktoro» aŭ, se titolo mankas, »sinjoro Andersson». Tiu kutimo devigas komence limigi la interparoladon. Malgraŭ tio mi komence sentis min iom ĝenata. Feliĉa estas tiu fremdulo, kiu povas akiri intimajn konatojn, ĉar en tiu okazo oni forlasas ĉiujn titolojn kaj alparolas »ci» kaj per antaŭnomo.

Post la kaftrinkade la mastro demandas kaj invitas la gastojn kune viziti operon aŭ teatron aŭ ion similan. Laŭ la kutimo neniu rifuzas. Biletojn oni antaŭmendas telefone kaj sidlokoj restas rezervataj. Post la amuza vespero en 9-a aŭ 11-a horo nokte oni promenas kaj la mastro gvidas siajn gastojn al bela kafejo aŭ restoracio, kie li regalas per supeo kaj oni ĝuas tie bonan noktan muzikon. Ĉirkaŭ la 1-a horo matene oni prenas aŭtomobilon kaj revenas hejmen. Tiu urba kutimo kompreneble varias. Sed kutime oni ne vizitas ion ekstere, sed restas hejme kaj babilas aŭ kartludas kaj finas la tagon per noktomanĝo kun

trinkaĵo aŭ per teo. Do vi komprenas, ke en svedaj hejmoj oni tre arte kaj solide regalas la gastojn.

En la kamparo la kutimoj estas iom aliaj. Post la tagmanĝo kaj sekva dankado ĉiuj kolektiĝas ĉirkaŭ la kafotablo ĉe la ŝtona forno. Tiu kampara kutimo ĉiam ŝajnis al mi ege bela kaj gracia! Dum la fajro brulas, oni malhelumigas la elektran lampon, kaj en la lumo de la forna fajro oni trankvile sidas kaj tre ripozeme interparolas ĝis la malfrua nokto aŭ frumatene antaŭ ol oni eniras sian liton. Foje la gemastroj regalas per muziko, plejofte piano, kaj kantoj. Multajn tiajn vesperojn mi travivis kaj ege ĝuis, ĉar tiam estas okazo senĝene interŝanĝi pensojn kun oftaj bonhumoraj ŝercoj. Pro tia granda gastameco en svedaj hejmoj mi ofte sentis embarason pro la elspezo de la gastiganto. Aliflanke tio montras, ke kvankam grandriĉuloj multaj eble mankas en ĉi tiu lando, tamen la nivelo de popolprospero estas multe pli granda ol, eble, en iu ajn lando en Eŭropo.

Sed la plej pompa kaj hejma festeno sveda, kiel mi supozas ankaŭ en ĉiuj kristanaj landoj, estas la kristnaska! Dum semajnoj antaŭ la kristnaska vespero la mastrino komencas hejman purigadon, kaj oni tiel bone faras la laboron, ke la hejmo aspektas tute renovigita interne. En urbo oni multe ornamas per pinbranĉoj kaj lampoj la stratojn kaj kompreneble la vendejojn, eĉ la stacidomojn. En la hejmo oni ornamas la internon per kristnaska arbo, en kiu oni pendigas diversajn belaĵojn kaj metas sur la branĉojn kandelingojn. Oni provizas la hejmon antaŭe per abunda manĝaĵo kaj trinkaĵo, tiel ke oni tute senĝene povas ĝui la festajn tagojn kaj ankaŭ ripozi.

En la kristnaska vespero komenciĝas la hejma festo kun abundega manĝado. La manĝaĵoj estas variaj. La ĉefa specialaĵo estas ia fiŝpreparaĵo; oni nomas ĝin »lutfisk». Mi bezonis kutimiĝi al tiu manĝaĵo por ŝati ĝin. Alia estas rizkaĉo preparita el lakto. En ĝi oni metas nur unu

migdalon, kaj tiu kiu ricevas ĝin en sia porcio povas atendi, laŭ la bela superstiĉo, la grandan vivokazon, nome edziĝon (kompreneble tio koncernas nur la solulojn). Oni ankaŭ trinkas biersimilan kristnaskan trinkaĵon. Al la manĝo apartenas granda kuirita kaj rostita porcio de porkoviando, kiun oni tranĉas en pecoj kaj manĝas kun pano aŭ terpomoj. Post la granda tagmanĝo, kiu ofte okazas en la kuirejo, ĉiuj kolektiĝas en la festoĉambro ĉe la kristnaska arbo, kaj oni lumigas ĉiujn kandelojn sur tabloj kaj arbobranĉoj. Solene sed gaje oni sidas ĉirkaŭ la granda tablo kaj trinkas kafon. Se estas infanoj en la hejmo, venas tiam la blankhara kristnaska maljunulo (»jultomten») kun barbo kaj surdorse portanta grandan sakon plenan de donacoj. Kun streĉa eĉ ekscitiga ĝojo la infanoj akceptas la donacojn el la mano de la bona maljunulo. Ĉiu donaco portas poeziaĵon pri la ricevanto. Ankaŭ alie oni multe donacas en tiu okazo reciproke, sed en hejmoj sen infanoj la kristnaska maljunulo forestas. Radias la vizaĝoj de la ricevintoj dum ili malfermas la pakaĵon, kaj kiam oni fine malkovras la objekton oni preskaŭ krias pro ĝojo. La festeno finiĝas per trinkado de kafo aŭ de speciala varmigita vino, kiun oni nomas tie ĉi »glögg». Tiel la gaja festeno finiĝas, kaj oni malfrue iras en la liton. La postan tagon matene tiuj kiuj deziras partoprenas en impona frua diservo en preĝejo, kiun oni speciale bele ornamas pro tiu okazo.

Alia pure sveda kutimo estas la kaftrinkado. Kiam oni vizitas hejmon, la mastrino senescepte regalas la vizitantojn per kafo kaj kukoj, kaj ofte tiajn kukojn la mastrino mem hejme preparas.

SVEDAJ HEJMOJ EN KAMPARO KAJ URBO.

La hejmoj en la sveda kamparo postulas apartan priskribon pro ilia speciala karaktero. Dum miaj longaj vojaĝoj en la lando per trajnoj kaj aŭtomobiloj ofte aperis

antaŭ miaj okuloj preterpasante la ruĝkoloraj tipaj svedaj lignaj domoj, kiuj donas impreson de ekstere, ke ili estas varmaj interne. Estas tiel, ke la severa klimato de la lando necesigas konstrui domon kiel eble plej solida kaj ankaŭ tia, ke la interno estu varma. En ĉiu loĝoĉambro do devas esti forno por varmigi la internon ĉiutage dum longaj vintraj monatoj, kaj krome en ĉiu domo la vintraj fenestroj devas esti duoblaj; inter la vitraj kadroj oni metas kotonon kunvolvitan, por ke la malvarma aero ne enpenetru en la ĉambron. Krom la urbaj konstruaĵoj kaj tre maloftaj aliloke, la svedaj domoj preskaŭ ĉiam estas konstruitaj el ligno. En urbo oni devis limigi lignajn konstruaĵojn per leĝo pro pasintaj spertoj de detruiga brulo. Nur en esceptaj urboj kiel ekzemple Kiruna, norde de la polusa cirklo, kutime la konstruaĵoj estas lignaj, kaj krome dum mia vizito en Gotlando mi vidis kaj ŝtonajn kaj lignajn kostruaĵojn preskaŭ egalaj en nombro. Alia escepto estas la suda provinco Skåne, kie same kiel en Danlando la kamparaj domoj plejparte estas konstruitaj el ŝtono kaj briko.

Eĉ la eta unuetaĝa dometo en la kamparo konsistas el enira vestibleto, kie oni pendigas la surtuton kaj lasas la galoŝojn, dormoĉambro, sidĉambro kaj malgranda kuirejo. En iom pli granda kampara hejmo troviĝas kroma ĉambreto aŭ je sama nivelo aŭ en la dua etaĝo. En bienaj hejmoj, speciale en la norda Svedlando, troviĝas kromaj konstruaĵoj, nome provizejoj, iam kaj tiam kun loĝoĉambro por la servistoj. Oni kutime nomas la kamparan hejmon en sveda lingvo »stuga». La bienaj konstruaĵoj en Skåne laŭ dana maniero estas longaj, unuetaĝaj. La bienkonstruaĵoj, nome apartaj loĝejo, provizejo, bovin- kaj ĉevalejo, staras tiel ke ili formas unu korton. Ĉiu bieno posedas kaj kulturas pli malpli grandan ĝardenon, kie inter alie ankaŭ kreskas almenaŭ kelkaj pomarboj. Somere la bienhejmoj kun ĝardenoj aspektas tre idiliaj, kaj ofte en la ĝardenoj en artefaritaj lagetoj cignoj ripozeme naĝas.

La karakterizaj trajtoj de svedaj urboj kuŝas en tiu fakto, ke ili neniam estas tre grandaj, tial oni bone zorgas ilin, kaj la naturaj ĉirkaŭaĵoj ĉiam donas ĉarmon al la urbo. Mi nenie spertis tiom grandan purecon, ĝenerale dirite, kiel en tiu ĉi lando, kaj tiu sola fakto parolas multon pri la popolkaraktero.

Stockholm — urbo el granito sur granitaj rokoj — kun ĝiaj nekalkuleblaj insuloj kaj grandaj belaj publikaj arkitekturaĵoj ankaŭ postulas apartan priskribon, sed ĉarmegaj tamen estas la vila-vilaĝetoj nomataj »antaŭurboj», kiuj kuŝas en la vasta naturo ĉirkaŭ Stockholm. Estis tempo, kaj mi kredas ke ankoraŭ estas, kiam la mezaklasa loĝantaro ne povis akiri propran hejmon en la urbo, ĉar la urbaj konstruaĵoj estas plejparte por luado. Tial tiuj freŝaeraj vila-urbetoj ekkreskis. Imagu en belega arbara naturo inter montoj kaj montetoj, lagoj kaj lagetoj, kuŝas tie kaj tie kutime duetaĝa domo, propra posedaĵo de la loĝanto, ĉirkaŭita de natura arbaro kaj bela ĝardeno. Mi ofte promenis dum horo, sed tamen mi aŭdis eĉ ne unu homan voĉon en tia vila-urbeto. Tiuj urboj kun siaj belaj ondaj stratoj aspektas kvazaŭ labirinto — for de la urba maltrankvilo kaj bruo de trafiko! Tia vivmaniero ŝajnis al mi esti tre ideala, ĉar unuflanke la loĝantoj vivas en paco kaj trankvilo en la mezo de la naturo, kiu mem netakseble nutras la animan vivon, kaj aliflanke oni havas ĉiun avantaĝon de la proksima urbo, kiun oni facile povas atingi per tramo aŭ aŭtobuso.

La vilaoj en la antaŭurboj, kiuj nun nombras ĉirkaŭ kvindek, estas kutime duetaĝaj, plejparte el ligno sur granita fundamento. La unua etaĝo konsistas el sidĉambro, manĝoĉambro kaj kuirejo krom la antaŭĉambreto, kie oni lasas supervestojn kaj galoŝojn. En la supra etaĝo estas la dormĉambroj kaj ŝtuparo de la antaŭĉambro kunligas la du etaĝojn. La nombro de la ĉambroj varias laŭ la nombro de la familiaj membroj de kvar ĝis kvin, eĉ dek du ĝis

dek kvin. Tiuj vila-hejmoj pro samaj kaŭzoj estas ankaŭ idealaj, kiam oni pensas pri la bonfarto de la infanoj.

La grandaj urboj, speciale la ĉefa, ankaŭ transformis eksterurbajn naturterenojn en multajn malgrandajn ĝardenetojn. Ili estas malkare luataj al la laboristoj, kiuj mem konstruas malgrandajn somerdometojn. Dum la tuta somero laboristo kun sia familio povas loĝi tie, kaj dum li laboras en fabriko aŭ en alia simila loko tage, la mastrino zorgas la ĝardenon. Antaŭ la foriro al la laboro matene kaj post la reveno posttagmeze li helpas la edzinon en la ĝardena laboro. La svedoj estas grandaj floramantoj, tial krom la legomoj por manĝocelo oni ankaŭ kulturas abunde florojn. Kelkajn tiajn somerhejmojn de laboristoj mi sola aŭ kun amikoj vizitis. Ĉiam la gemastroj regalis nin per hejmepreparita fruktosuko kaj fragoj el propra ĝardeno. Tiu aranĝo ankaŭ plibonigas la sanstaton de la infanoj, kiuj libere en freŝa aero povas sin movi dum la somermonatoj. En fino de la somero la mastrinoj konservas la fruktaĵojn kaj legomojn el la propra ĝardeno en boteloj aŭ aliaj ujoj kaj la edzo zorgas la florojn. Tiuj laboristaj somerdometoj en ĝardeno estis grandskale konstruitaj en la malhela tempo dum la lasta mondmilito, kiam la popolo suferis pro manko de certaj nutraĵoj kaj pro tro alta kosto de manĝovaroj. La malfacila tempo forpasis, sed tiuj malgrandaj »bienetoj» pruvis sin ege utilaj al la bonstato kaj sano de laboristaj familioj. Tiaj malgrandaj ĝardenoj alportis belecon al la urbaj ĉirkaŭaĵoj. Tiom multe mi vidis kaj vivis en la lando, ke mi senĝene povas diri sen troigo, ke nenie oni vidas kolekton de malpuraĵoj en la urbaj flankoj, male la verdaj kreskaĵoj, fruktarboj kaj floroj donas paradizan aspekton en la someraj tagoj al la urba ĉirkaŭaĵo.

ENHAVO.

	Paĝo.
Enkonduko	5
Ĝeneralaj informoj pri Svedlando	8
Stockholm, la ĉefurbo, kaj ĝia ĉirkaŭaĵo	14
Ĉirkaŭ la lago Mälaren	26
Gotlando, la reĝino de Balta maro	35
Dalarna, la koro de Svedlando	57
Värmland, la lando de Gösta Berling	76
Småland kun la urbo de alumetoj	85
Östergötland kaj Västergötland	90
Skåne, la grenejo de Svedlando	100
Somera semajno en fiŝista vilaĝo	111
Norrland la arbarriĉa	119
Jämtland kaj ĝiaj neĝokovritaj montegoj	131
Vojaĝo al Lappland	136
La laponoj — popolo, lingvo, literaturo	150
Lando de slojdo kaj artindustrio	164
Svedaj kutimoj kaj moroj	189